

REGO



RUSIA ESPERANTO-GAZETO



komuna eldono de REU kaj REJM

Nº 5 (12) oktobro 2002



RET-02:

post multaj jaroj renkontiĝis ni!

*sur la fotoj: Ĵomart kaj Nataŝa,
Anatolij Radajev, Vladimir Soroka*



*en la numero impresoj kaj fotoj pri RET-02, OkSEJT-42, UK-87, IvERo-3
legotrovaĵoj de Anatolo Gonĉarov
kial oni kabeas?
Avo Frosto respondos ankaŭ Esperante
“Bulteno de REU” kaj “REJM-info”
“Libra revuo”, literaturaj paĝoj kaj multo alia*

Moskvo, 2002


RET-02: komuna foto



... kaj kelkaj triopoj



Nikita Demjašev, Mikaelo Bronštejn, Viktoro Arolovič



Nataša, Andrej, Aleksandr Grigorjevskij



Nataša Gerlah, Irina kaj Sveta Gončarova



Griša Arosev, Sergej Bozin, Paša Korotenko

Ĝeneralaj informoj: en RET-02 (Rusiaj Esperanto-Tagoj, 15-25-a de aŭgusto 2002) partoprenis 137 personoj el 45 loĝlokoj de 6 landoj (Rusio, Belorusio, Finnlando, Svedio, Ukrainio, Uzbekio). Averaĝa aĝo de la partoprenintoj estas 32 jaroj, averaĝa jaro de esperantigo – 1991, averaĝa alto – 167 cm, averaĝa pezo – 66 kg. Laŭ decido de REU-Estraro RET-03 okazos en la sama loko ekde la 14-a ĝis la 24-a de aŭgusto 2003.

POST MULTAJ JAROJ RENKONTIĜIS NI

Antaŭ ĉio mi diru, ke mia lasta partopreno en E-aranĝo enlande okazis en 1991 (tio estis OkSEJT apud Niĵnij Novgorod).

Dum postaj jaroj mi tiel aŭ alie estis ligita al Esperanto – aktive okupiĝis pri korespondanta kurso, vojaĝis private eksterlanden, partoprenis en UK, eldonis la revuon “Komencanto”, sed laŭ volo de la sorto mi ne partoprenis enlandajn E-aranĝojn.

Do, RET-02 iĝis por mi rusia E-aranĝo, kiun mi vizitis post 11 jaroj. Certe min ekinteresis mencio en la informo de REGo, ke RET-02 servos speciale por la esperantistoj de mia aĝo kaj sperto. Certe min allogis ankaŭ bela okazo persone aŭskulti kantadon de Ĵomart Amzejev kaj Nataŝa Gerlaĥ, kies voĉojn mi multe aŭdis sur kasedoj. Inter ceteraj allogaĵoj de RET-02 estis ankaŭ eblo renkonti tie malnovajn konatojn kaj kvazaŭ mergiĝi en la esperantistan junecon.

Kaj jen la 15-an de aŭgusto ni (mi kaj mia edzino Raja, kiu ankaŭ estas esperantistino de la 80-aj jaroj) atingis la ripozejon “Berjozka”. La unuaj impresoj pri la loko – nin tuj ravis la pitoreska naturo, ĉirkaŭa arbaro, la apuda rivero Kljazjma kaj belaj pejzaĝoj. Estis bona, suna, vere somera vetero kaj aero plena de kvieto kaj harmonio.

Tre gravis, ke la ripozejo dum la tuta RET-02 apartenis nur al esperantistoj, neniuj kroma ripozanto ĉeestis. (Por komparo: en tiu mia lasta E-tendaro apud Niĵnij Novgorod en la bazejo samtempe ripozis multaj neesperantistoj, kiuj fakte per sia ĉeesto nuligis la Esperantan etoson.) Ĉi tie ekde la unua tago ni mergiĝis en vere somerripozantan etoson de Esperanto-tendaro.

Unue mi notu kelkajn gravajn organizajn momentojn.

La organizantoj sukcesis trovi bonan lokon kun ĉiuj eblaj oportunaĵoj – en nia dispono estis granda halo kaj kelkaj malpligrandaj salonoj por diversspecaj programoj; kafejo kun kafo, teo kaj biero – tre taŭga por amika babilado; kaj eĉ granda balkono, kie ĉe bona vetero pasis kursoj, diskuttrondoj, kunsidoj; funkciis salono por videofilmoj, komforta duŝejo kaj eĉ saŭno.

Ni ĝuis trifojan manĝadon (kontraŭ nur 90 rubloj!) – ĉiam bongustan, varian, kun fruktoj, salatoj kaj непра “Приятного аппетита!” (Bonan apetiton!) de la kuiristoj.

La loĝkondiĉoj taŭgis por ĉies monujoj: de “duonluksoj” por du personoj, 3-4-5-litaj ĉambroj, litoj en someraj dometoj, ĝis loĝado en propraj tendoj kaj kuirado ĉe lignofajro – senpage. Estis vere oportune kaj demokratie! Eble konsiderinte tiujn oportunaĵojn la organi-



zantoj de RET-02 decidis lasi la saman lokon por la sekva RET.

Kaj nun pri la programo, kiu estis sufiĉe varia kaj konsistis el seriozaj kaj lernigaj partoj kaj diversaj kulturaj, amuzaj kaj distraj aranĝoj.

El seriozaj aranĝoj estas nepre menciinda la Supera kurso de Nikolao Gudskov. Ĝi estis



veteranoj rememoras la pasintecon, de maldekstre – Garik Kokolija, Mikaelo Lineckij, Nataŝa Ivanova, Mikaelo Bronŝtejn, Ljuba Malej

bone preparita kaj vere utila por aŭskultantoj. Ĉiutage la voĉo de Nikolao aŭdiĝis de sur la balkono kvazaŭ murmuro de bone funkcianta motoro de la renkontiĝo.

Tute novan eltrovon en la sfero de Esperanto-instruado proponis Vladimir Soroka, fama kantisto kaj komponisto el Poltava (Ukrainio). Lia kurso “Septima” instruas pa-

roli en Esperanto per la fama rekta metodo, sed akompane de tre konataj melodioj, kiujn elektis Vladimir kaj mem verkis instruajn tekstojn.

Kiel kutime, funkciis seminarioj de aktivuloj, kiujn gvidis Andrej Grigorjevskij. Oni diskutis pri Esperanto-informado, laboro de E-klubo, sektismo en E-movado, eventuala UK en Rusio. La diskutoj estis sufiĉe viglaj, foje eĉ akraj, sed ne enuaj.



Ĵomart neformale

Same interese pasis la diskuttrondoj kaj prelegoj “Ĉu fina venko en 2020 aŭ definitiva formorto en 2040?”, “Esperanto kaj nehindeŭropaj lingvoj”, “Naciismo en E-movado”, “Praktika utiligo de Esperanto”, “Esperanto-servocentro”.

Estis interesaj la kvizoj pri E-literaturo, farita de Valentin Melnikov, kaj pri E-historio, farita de Viktoro Aroloviĉ, kvankam ne multaj kuraĝis kontroli siajn sciojn.

Okazis prezentoj de la novaj tradukoj de klasikaj verkoj en Esperanton. Grandan intereson elvokis rakonto de Mikaelo Bronŝtejn pri la tradukoj de la poemo de A. Puŝkin “Узник” (“Malliberulo”). Ankaŭ V. Melnikov prezentis sian tradukon de “Eŭgeno Onegin”.

En la kadro de Somera Universitato okazis kelkaj seriozaj prelegoj ne ligitaj al Esperanto, sed sciencaj: “La lingvo HTML”, “Lingvo de biomolekuloj”, “Ragtimo”.

Se kompari ĉi tiun “seriozan parton” de la programo kun la tendarprogramoj de “mia tempo”, mi povas noti, ke la nuna estis pli enhavriĉa, altkvalita kaj instrua.

Multis programeroj, ne ligitaj rekte al la lingvo, sed interesaj de la kultura kaj kleriga vidpunktoj. En tiu vico estis majstroklasoj de Sergej Bozin pri etna kaj tranca muzikoj; danco-kurso kaj lecionoj pri pentrado de Daŝa Dolmatova; kurso de origamio kaj Teatra ludo de Konstantin Malasajev; en la kadro de Internacia tago okazis rakonto de Rimma Roganova

pri nacia tatara kulturo; multaj kun plezuro partoprenis ĉuvaŝajn popoldancojn, organizitajn de ĉeboksaraj esperantistoj.

Estis interesa la literatura prelego de Grigorij Arosev pri Vladimir Nabokov kaj lia literatura heredaĵo. Nataŝa Gerlaĥ kaj Ĵomart Amzejev rakontis pri vivo en Svedio kaj Mikaelo Bronŝtejn – pri vivo en Vorkuta.


Ĉiu partoprenanto havis eblon viziti la antikvajn rusiajn urbojn Vladimir kaj Suzdal kaj promeni laŭ la rivero Kljazjma per motora ŝipeto. Ambaŭ ekskursoj al mi tre plaĉis.



enĉambraj kantadoj estis ne malpli popularaj ol la koncertoj

Mi volas mencii la ideon de la organizantoj pri la teama disdivido dum RET-02. Ĝi sukcesis nur parte, ne ĉiuj teamoj montriĝis vivkapablaj. La ideo pri teamoj ne estas io nova, mi spertis tion dum antaŭaj SEJT-oj, sed tiam oni anticipis komisiis taskojn de la teamestroj al spertaj esperantistoj. Laŭ mi, tiun ĉi nemalbonan ideon necesas iel konkretigi.

Tre popularaj estis diversaj ludoj-konkursoj, ekzemple “Divenu melodion”. Mi mem partoprenis retorikan konkurson, dum kiu oni devis pruvi iun tezon, ekzemple, “Ĉu esperantistoj estas nacio, jes aŭ ne?”. Por interpretesta konkurso sinanoncis multaj spertuloj, partoprenantoj tradukis fragmenton el la verko de Venedikt Jerofejev “Moskva-Petuŝki”. Estis tre gaja amuzaĵo! Aparte mi volas mencii la aranĝon “Unu kontraŭ unu”. La temo de la diskuto estis aktuala – “raŭmisto” V.Melnikov kontraŭ “finvenkisto” G.Kokolija. Al la publiko ege plaĉis ambaŭ rivaloj kaj ilia argumentado.



Mikaelo Bronŝtejn

La vesperoj estis dediĉitaj al koncertoj. La vera evento de RET-02 estis partopreno en ĝi de niaj “muzikaj legendoj” Ĵomart Amzejev kaj Nataŝa Gerlaĥ el Svedio. Fakte tio ĉi estis ilia unua komuna vizito al rusia E-aranĝo post 11-jara paŭzo. Ĵomart kaj Nataŝa ĉarmis la publikon, ne necesis ilin speciale peti por “Amika rondo” aŭ io simila – Ĵomart tuj malpakis la gitaron... Mezperiode sufiĉe granda grupo de la partoprenintoj forveturis, do Ĵomart kaj Nataŝa faris apartan koncerton por ili... Amo inter tiu fabela duopo kaj la publiko estis reciproka.

“Post multaj jaroj” ĉeestis Vladimir Soroka, homo kiun oni ne bezonas prezenti. Mi jam menciis, ke Vladimir sukcese kaj senlace gvidis la kurson “Septima”, krome li kun la grupo de novaj talentaj muzikistoj prezentis siajn malnovajn kaj novajn kantojn.

Al mi tre plaĉis koncerto, preparita de Mikaelo Bronŝtejn, kiu konsistis el tute novaj

kanzonoj, parodioj kaj humuraj komentoj.

Agrablan impreson restigis koncerto de Andreo Obrezkov – tre ĉarma plenummaniero, agrablaj melodioj, bonaj kantoj.

Por la unua fojo mi aŭdis la artistojn Pavel Korotenko, Maŝa Kočetkova, Miĥail Povorin kaj Grigorij Arosev. Ĉiu el ili havas sian propran plenummanieron kaj muzikan stilon, kaj tiu varieco de la koncertoj estis agrabla.

Tute unika por mi estis Sergio Bozin kun sia tranca muziko, neordinaris lia koncerto en nokta mallumo ĉe la kandela aromo, kiam ĉiuj aŭskultantoj plejparte kuŝis komforte surplanke.

Bedaŭrinde, ne faris apartan koncerton Anatolo Radajev, sed li ege multe kantis, gitarludis, akompanis komunan kantadon en vasta kaj malvasta rondoj.



malnovaj amikoj ĉiam revidiĝas kun plezuro

Ne eblas priskribi la koncertojn mem – ilin necesas vidi kaj aŭdi. Dankon al ĉiuj artistoj kaj la organizantoj.

Ankoraŭ kelkaj vortoj pri KGS. La programero estas unu el la plej tradiciaj, gvidis ĝin Mikaelo Lineckij el Kievo. Organizigis du teamoj, tute hazarde unu el ili rezultis junulara, la alia – eksjunulara. Ŝajnas, la publiko ne enuis, venkis kiel ĉiam la amikeco. Interalie, KGS mem respegulis, ke dum la tuta RET-periodo tre komforte kunekzistis fakte du generacioj de esperantistoj, relative malnova (kun esperantista aĝo 20 jaroj kaj pli) kaj tute freŝa kaj juna. Tiu ĉi fakto tre ĝojigis min.

Finante miajn priskribojn mi devas tamen menciigi kelkajn negativajn momentojn. Do, malgranda makulo en bela okulo – ne funkciis lignofajro kiel alloga centro de ĉies atento. Kion fari – estas multe pli komforte



por trimonata Aleksandr Grigorjevskij RET-02 iĝis la unua E-renkontiĝo

aŭskulti koncertojn en agrablaj kondiĉoj kun bonkvalitaj aparaturo kaj sono. Oni rapide kutimiĝas al ĉio bona.

Eble pro sia troŝargeco pri la programo la organizantoj ne ĉiam atentis pri la novalvenintaj homoj – tiel restis senatentaj s-ro Bruno el Finnlando kaj Valentina Rjabĉun el Taŝkento. Ja tre gravas, ke la homoj ne sentu sin fremdaj kaj superflujaj, senatentaj personoj ne plu venos al nia komunumo.

Konklude mi nur povas diri, ke ĉio estis vere bone organizita kaj ni ĉiuj devas danki la organizantojn, kiuj donacis al ni tiujn memorindajn Tagojn. Apartan dankon al Garik Kokolija, sur kies ŝultroj kuŝis granda parto de tiu nevidebla, sed ege grava prepara laboro, al la ĉarmaj gvidantoj de la tuta programo Lena Katajeva kaj Griŝa Arosev, al la familio de Grigorjevskij, kiuj provizis nin per senproblemaj loĝado kaj manĝado, kaj al ilia eta filo Saŝa, kiu estis la plej juna kaj tolerema partoprenanto de RET-02, kaj al ĉiuj aliaj.

Vere dank' al vi, karaj, dum RET-02 okazis “renaskiĝ’ de niaj fortoj kaj humor”!”

Viktor Kudrjavcev (Jekaterinburg)

RET-02: MUZIKA MEKKO

... Vere ĉi tie kolektiĝis ĉiuj famaj muzikistoj esperantistoj de eksa Sovetio. Sendube grandan signifon por tio havis alveno de Ĵomart kaj Nataŝa (nun – Svedio) – la plej popularaj kaj ŝatataj en Esperantujo plenumantoj de propraj kantoj.

Kaj ili pravigis niajn esperojn. Ĉiutage adorantoj de la muzikistoj povis aŭskulti iliajn belajn voĉojn en la halo, aŭ en la barda kafejo, aŭ en ilia ĉambro, kien Ĵomart kaj Nataŝa ĉiunokte invitis geamikojn-esperantistojn. Ili prezentis ne nur siajn malnovajn kantojn, sed ankaŭ la novajn el nun preparata disko – laŭ versaĵoj de Mikaelo Bronŝtejn. Ĝojigis ĉiujn la kantado de Karina – filineto de Ĵomart kaj Nataŝa.

Trifoje koncertis kun diversaj programoj alia patriarko de Esperanto-kulturo – “Vladimir Soroka kun ensemble” – el Poltavo. Dum RET-02 li prezentis sin duflanke: kiel instruisto de kanta Esperanto-kurso “Septima” kaj kiel gvidanto de muzikgrupo. La muziko estis sufiĉe bona kaj originala: interesaj melodioj, aranĝaĵoj, tekstoj... voĉoj, gitaroj, flutoj. Juna muzikisto de la poltava ensemble Slava Bondarjkov prezentis kun la geamikoj propran programon, dediĉitan al movo de homa animo al Dio, naturo kaj ĉio bona en homo ... belega voĉo, agrablaj kantoj kaj gitarludo. Ĉi-jare Slava unuafoje koncertis kun esperantlingvaj kantoj (tradukitaj de Vladimir Soroka), miaopinie li estas “malkovro de la jaro” inter muzikistoj de rusia, ukrainia kaj belo-



koncerto de Ĵomart kaj Nataŝa – senduba perlo de RET-02



Pavel Korotenko – stelulo el Slavjansk

rusia E-movado. Krom Slava bone kantis kelkajn proprajn kantojn ankoraŭ unu nova esperantisto el Poltava – Maksim Ŝabala.

Kiel kutime je bona nivelo trapasis halaj koncertoj de Mikaelo Povorin, Andrej Obrezkov, Maŝa Kočetkova, Mikaelo Bronŝtejn, Pavel Korotenko, Grigorij Arosev kaj Sergej Bozin. La koncerto de Pavel Korotenko kaj Grigorij Arosev sendube elvokis la plej aktivan reagon de la publiko. Homoj entuziasme dancis, kaj en manoj de iuj estis aŝiĝoj kun la vortoj “Ni amas vin” ks. Ili ĉi-foje koncertis triope. La tria estis Sergej Bozin, kiu aldonis energion per tamburo kaj perkutaj instrumentoj.

ADIAŬA KANTO PRI RET-02
muziko kaj vortoj de G.Arosev

Somer’ adiaŭas aŭguste,
baldaŭas aŭtuna rutino,
sed scias mi, scias ĝuste:
revenos aŭgusta fascino...

Refreno:

Ĥoru kune ĝis lasta stelbrilet’:
Ĝis revid’, Kovrov, ĝis revido, RET!

Arbar’ memorigos dumfroste
pri tagoj kaj noktoj fabelaj.
Ni ege atendos, kaj poste
denove varmigis nin steloj...

Refreno.

Amikoj plu vivos en koroj,
en karaj bonkoraj leteroj,
en kantoj kaj rememoroj,
sed poste revenos somero...

Refreno.

Pavel Korotenko vere estas unu el la plej popularaj kantistoj-verkistoj en nia Esperantujo, sed, bedaŭrinde, ne havas studiajn registraĵojn. Feliĉuloj aŭskultis liajn koncertojn kun kantoj (belaj kantoj), verkitaj en tute diversaj stiloj: lulkanto, rokenrolo, bluso, regeo, “kantri” ktp. La koncertaj registraĵoj donas nur proksimuman impreson pri la reala koncerto, ĉar estas registrataj sonoj, venantaj tra sonkanaloj de la mikrofonoj, tial perdiĝas influo de hala akustiko. Kiam sonreĝisoro agordas la aparataron por koncerto, li aŭskultas sonadon de la muziko en la halo, sed tra la tekniko pasas ne la sama sono, kiun ni povas aŭdi dum la koncerto. Rezulte ni povas ĝui koncerton en la halo, sed ne aŭskultante la registraĵon. Nun aperis en vendejoj kompakta bonkvalita aparataro (de japanaj, usonaj kaj germanaj firmaoj, relative nemultekosta) por sonregistrado tra mikrofono al minidisko, kiu ebligas bonkvalite registri koncertojn el la halo.

Estus bone (ne nur laŭ mia opinio), se ni, eĉ ankoraŭ ne elĉerpinte senfinan rezervon de malnovaj kantoj, komencos studie registri

la aŭtorojn (muzikistojn), kiuj popularas ĉi tie kaj nun. Temas unuavice pri Paŝa Korotenko, kiu ne hazarde estis elektita “la sinjoro de RET-02”.

... En la koncerto de “Sergej Bozin kun geamikoj” partoprenis Evelina Sokolova (Krasnojarsk), Vitalij Malenko (Ĵukovskij), Pavel Korotenko (Slavjansk), Maksim Ŝabala (Poltava) kaj Grigorij Arosev (Moskvo) – vere internacia ensemblo. Sonis kantoj en diversaj stiloj, sed ĉefe – blusoj. Al plimulto plej plaĉis “Mallaŭta kanto”, kiun bele kantis Evelina. Onidire tio ĉi estis la plej bona koncerto de “Sergeo kun geamikoj” dum tuta lia Esperanta vivo.

Aparte bezonatas diri pri du koncertoj de “tranca muziko”, kiujn ĉi ensemblo plenumis nokte, ĉe lumo de kandeloj, kiam afrikaj ritmoj kaj orientaj melodioj kondukis en mondon de interna kvieto kaj liberiĝo for de ĉiuj zorgoj... iuj dolĉe dormis, iuj sentis deziron partopreni en ĉi improviza muziko. Rusaj, svedaj kaj ukrainaj muzikistoj enplektis siajn voĉojn kaj voĉojn de siaj muzikiloj en komunan ŝtofon... rezultis interesa muzikado. En kelkaj komponaĵoj mi petis aŭskultantojn enkonduki la muzikon kaj ili taktmezuris per polmoj kaj eĉ piedoj, kantis “rifojn” kaj voĉimprovizis. Komence ni planis nur unu tian koncerton, sed aŭskultantoj petis nin ripeti ĝin kaj kelkaj pesonoj proponis sian partoprenon. Rezulte okazis

ankoraŭ unu koncerto, por kiu ni komponis iom da muzikaĵoj por ni kaj aldonaj muzikistoj. La dua koncerto komenciĝis je la dua nokte, tial, se la unuan eblas nomi “la koncerto de aktiva tranco”, la duan – de la pasiva... La muzikistoj plenumis muzikon, la aŭskultantoj – tranciĝis. La atmosfero de tranco estis tiom intensa, ke kiam la ĉambrom enkuris hundo Kubik, ĝi subite haltis, rigidiĝis surloke kaj falis sur flankon jam dormanta.

Multaj interesaj muzikistoj kantis en la kafejo: Anatolo Radajev, Ĵomart kaj Nataŝa, Pavel Korotenko, Oĉjo Dadaev kun Aleksandr Koval kaj aliaj. Tre bone ili koncertis. Ne-forgeseblaj estas la koncerto kun ukrainaj popolaj kantoj, ludoj de la petolema korpo de Kostik Malasajev kaj, sendube, Internacia tago kun ĝiaj “prikoloj”.

Apartan dankon mi volas esprimi al ĉiuj organizantoj de RET-02, al personaro de la bazejo kaj al la sonreĝisoro Ilja, kiu helpis al la koncertoj okazi, okazi bone. Dankon, Ilja! Dankon al ĉiuj!

Sergej Bozin (Krasnojarsk)

UK-87

Kiel jam estis anoncite por la 87-a UK en Fortaleza aliĝis entute 1483 personoj. El 1483 aliĝintoj reale venis kaj partoprenis 1176. El ili 721 estis brazilanoj kaj 455 reprezentis la ceteran mondon. Inter la nevenintaj 307 la proporcio estas inversa: ne venis 129 aliĝintaj brazilanoj kaj 178 alilandanoj. (Gazetaraj Komunikoj de UEA)

IMPRESOJ DE LA UNIVERSALA KONGRESO

Tamen mi decidis. Mi flugas al Brazilo, al la 87-a Universala Kongreso de Esperanto. Mi ne trovis kunvojaĝanton kaj flugas sola. La flugo estas tra Frankfurt, poste – trans Atlantikon, al Rio-de-Janeiro, sume 12 mil kilometroj, mi pasigis en aero ĉirkaŭ 16 horojn.

Mi venis al Brazilo kvar tagojn antaŭ la Kongreso en Fortaleza, por havi tempon rigardi

Rio-n. Lokon en malgranda hotelo por mi rezervis Saulo Wanderley, kies adreson mi trovis en Pasporta servo. Mi tre dankas lin!

Kvar tagojn mi dediĉis al konatiĝo kun tiu ĉi admirinda urbo, eksa ĉefurbo de Brazilo. Mi supreniris la pinton de la monto Korkovado, kie staras la 38-metra statuo de Jesuo Kristo, de tie mi

vidis la urbon kvazaŭ sur manplato. Mi leviĝis per funikularo sur la monton Sukera Kapo, kie por la rigardo aperas la oceano kaj la fama plaĝo Kopakabana; perpiede mi trairis ne malpli famajn ĉi tie plaĝojn Leblon kaj Ipanema kun mirinda sablo, kvinstelaj hoteloj, ĉiovendejoj kaj restoracioj... Efektive Rio-de-Janeiro estas luksa urbo!

Plena de impresoj pri Rio mi flugis al Fortaleza. Ĝi situas en nordorienta Brazilo, 2 mil kilometrojn for de Rio-de-Janeiro. La urbo estis fondita de portugaloj en 1612 ĉirkaŭ la fortikaĵoj, konstruitaj de la koloniistoj ĉe Atlantiko. Fortaleza estas tropika paradizo, dotita



Valentina Rjabĉun inter brazilaj kongresanoj

de naturo per preskaŭ tutjara suno kaj averaĝa temperaturo 29 gradoj. La ravaj pejzaĝoj, historiaj vidindaĵoj kaj kulturaj riĉaĵoj faras la urbon unu el la plej popularaj brazilaj vojaĝceloj por enlanda kaj internacia turismo.

Ni konatiĝis kun la fama afableco de brazilanoj jam en la flughaveno, kie nin varme renkontis la LKK-anoj en verdaj ĉemizoj, tuj metinte kongresajn ĉapelojn sur niajn kapojn. Ni loĝis en unuaklasaj hoteloj, troviĝantaj laŭlonge de la marbordo, kun bonaj servoj kaj moderaj kostoj.



reprezentantoj de Uzbekio, Litovio kaj Rusio

La 87-a UK de Esperanto okazis en la moderna kongresejo, situanta 7 km for de la hotela urboparto. Tio estis ne tre oportuna, kvankam specialaj busoj, komfortaj kaj klimatizitaj, regule trafikis inter la hoteloj kaj kongresejo.

Kaj nun – iom da sekaj informoj. La Kongreso okazis en Fortalezo de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto kun 1483 aliĝintoj el 58 landoj, la ĉeftemo estis “Diverseco – ŝanco, ne minaco”. El Uzbekio mi venis sola, Rusion reprezentis tri esperantistoj: Galina Belenjuk el Soĉi, Natalja Maksimova el Roslavl kaj Aleksandr Ĵabin el Moskvo. La kongresa laboro startis per la Solena Inaŭguro. Ĉestis kaj diris salutparolojn la guberniestro de Cear , reprezentanto de Brazilo prezidento, reprezentanto de Unesko

kaj aliaj honoraj gastoj. En muzikaj paŭzoj tenoro el Fortalezo dufoje kantis en Esperanto popularan en Brazilo kanton “Akwarelo de Brazil”, kiu kantigis la plen-plenan salonon. La Inaŭguro finiĝis per la tradiciaj salutoj de landaj reprezentantoj kaj kantado de “La Espero”.

Poste komenciĝis la programo, detale preskribita en la Kongresa Libro. El multegaj prelegoj, diskutoj ks mi ŝatus menci la jenajn: tri kunsidoj pri la kongresa temo gvide de Humphrey Tonkin; raporto de la prezidanto de Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo Franz Braun pri la celo kaj taskoj de IKEF; informoj pri spiritismo de Brazilo Spiritisma Federacio; diskuto pri regiona agado; “Kio estas Oomoto”; prelego de Amri Wandel pri inkaa astronomio; interŝanĝo de spertoj pri brodado kaj ĝardenkulturo. Tradicie dum UK okazis Cseh-kurso, Konversacia rondo, Oratora konkurso; ne malpli abunda ol ĉiam estis la Libroservo. Dum unu el la vesperoj estis prezentita la teatraĵo “Amo per proverboj” de Arturo Azevedo, fama brazilo dramaturgo; la rolojn ludis profesiaj aktoroj Vida Jerman el Kroatio kaj Saŝa Pilipoviĉ el Jugoslavio. Impresis nacia vespero, koncerto de brazilaj esperantistoj, la baletto “Du sezonoj”.

En la kongreso mi renkontiĝis kun malnovaj amikoj kaj konatiĝis kun la novaj. Aparte agrablaj por mi estis interparoloj en la rusa lingvo kun brazilanoj, studentaj la rusan en kursoj. Dum la ekskursoj mi konatiĝis kun la naturo kaj vidindaĵoj de Cear  – belaj plaĝoj, lagunoj, tropikaj arboj; ni vizitis tipan vilaĝon.

La gastamo de la brazilo popolo... Naĝado en Atlantiko... La konstelacio Suda Kruco super mia kapo... Neforgesebla gusto de brazilaj manĝoj kaj fruktoj: ananaso, papajo,

kokoso, fiŝo, omaro... Esperanto.

Mi forveturis, sed lasis en Brazilo peceton de mia koro...

Valentina Rjabĉun (Uzbekio)

REMEMOROJ PRI KAJ EN IvERo-3

Mi delonge ne partoprenis E-aranĝojn rusiajn. Tial mi longe hezitis, ĉu veturi al IvERo-3, ĉar komprenis, ke estos ne multe da partoprenantoj. Aliflanke, Ivanovo estas proksime de Moskvo, de kiu “mansvingi” ĝis Kolomna. En Moskvo eblus viziti arkivojn de la ŝtata biblioteko por serĉi bezonatajn materialojn pri unuaj jaltaj E-pioniroj. Kolomna estis loko de mia iama E-aktiveco – tie min atendis la unua familio kaj intervjuo kun neordinara homo, esperantisto Valerij Jerohin (legu baldaŭ rakonton pri li en “Scienco kaj kulturo”). Sed la finan decidon influis la informo, ke la aranĝon partoprenos Leonid Borisov el Kolomna (unu el la unuaj miaj E-lernantoj, kiu en la 60-80-aj jaroj priservis pergitare junularajn E-tendarojn kaj turistajn renkontiĝojn – rigardu lian tiutempan foton) kaj ke Valerija Cvetkova alportos menditajn de mi ruslingvajn rakontojn de N.Borovko, kies sorton mi pristudas. Restis nur unu problemo: kiu gardos la loĝejon dum mia foresto? Ĝuste en tiu tempo telefonis al mi el Pollando esperantistino kun peto helpi al ŝi kaj la edzo pri ripozo en Jalta (mi estas unu el anoj de la “Pasporta Servo”). Mi respondis, ke se ili sukcesos alveturi post du tagoj, ili loĝos en mia ĉambro dum 3 semajnoj kaj gardos la loĝejon. Ili sukcesis, kaj mi ekveturis.

Mia naskiĝtago pasis en la trajno, sed la sekvan vesperon, post la alveturo, mi tuj trafis al la tablego, kiun oni organizis okaze de la naskiĝtago. Mi eluzis la okazon longe babili...

Multaj partoprenintoj de IvERo-3 estas parto de mia E-vivo. De Valerija Cvetkova (kaj V.Nazarov) mi en BET-6 (Vejsesaj, 1964) la unuan fojon ekaŭdis kelkajn E-kantojn. Nazarov alportis ilin el iu bulgara E-renkontiĝo. Krom tio estis originala belsona “Lenin-grada valso”. Rezulte post mia reveno en kolomna junulara E-grupo aperis la unua en la lando E-kantgrupo, kiun gvidis Ivan Davidkin kaj L.Borisov. Ĝuste tiam aperis miaj unuaj kantoj “La tempo somera”, “Terpomo” k.a. Iam poste Miĉjo Bronŝtejn, tiam knabo, sendis al mi sian tradukon de “Kanto de mulisto” (Novella Matveeva), mi ion ŝanĝis, ion aldonis kaj rezulte iĝis la kunaŭtoro. Tanja Loskutova estis animo de aperinta tiam ivanova junulara esperantistaro. Kaj mi rememoris, kiel kolomnanoj organizis en Peski apud Kolomna en 1970 la 4-an Centro-Rusian E-renkontiĝon, kiun partoprenis multaj interesaj E-aktivuloj. Sur la foto estas parto de la partoprenintoj: de maldekstre staras mi, mia edzino Ljuda Ageeva, tuj malsupre sidas Galina Staneŝnikova, apud kiu videblas T.Loskutova kaj la nazo de M.Bronŝtejn, malsupre sidas V.Cvetkova.

Kun Andreo Obrezkov ni rememoris, kiel en la neordinara OkSEJT-20 en Dagestano en 1978 la unuan fojon estis prezentitaj pecoj el la rok-opero “Jesuo Kristo – superstelo”. Li estis tiam knabo. Kiu povis antaŭvidi, ke el li elkreskos tia aktiva esperantisto kaj bonega



juna Leonid Borisov

bardo?!

Bedaŭrinde, mi alvenis post kiam Bronŝtejn kaj Cvetkova jam forveturis. Liaj kontribuoj al la programo estis “super”. Tion diris al mi komencantino, kiu ne komprenis la tekstojn, sed sentis la etoson, kiun li kreis per siaj kantoj. Mi povas imagi, kion sentis la spertaj esperantistoj. Ĉar en la tendaro min jam atendis Leonido; baldaŭ ni komencis rememori la unuajn kantojn kaj provkanti en apuda arbaro, kaj sukcesis koncerti. Iuj el la aŭskultantoj ne aŭdis la kantojn dum 30-40 jaroj, kaj mi vidis larmojn en ies okuloj. Interalie, iuj min tute ne povis



CRER-4 apud Kolomna (1970)

rekonigi, ĉar neniam vidis min senbarba.

Por ne forgesi – bonega manĝado. Eblis preni aldone eĉ viandajn manĝaĵojn. La tendaron priservis ne multaj ivanovanoj, sed tre organizite kaj entuziasme: Tatjana Loskutova kun la filino Maja, Andreo Obrezkov kun la edzino Jelena, Sveta Brovceva, Ira Galicina, Ljuba Malej. Andreo kaj Jelena multe okupiĝis pri la infanaro.

Pri negativaĵoj? Nur unu: estis anoncita renkontiĝo kun la vilaĝanoj, sed ĝi fakte estis ankoraŭ unu koncerto por la partoprenantoj, ĉar venis malmulte da gastoj. Necesis pli serioze anonci. Ja en la vilaĝo eblis viziti la hejmojn kaj inviti la homojn individue. Kiel evidentiĝis, la sola anonco sur la loka kafejo baldaŭ malaperis kaj malmultaj sciis pri la koncerto.

Nu, por mi, dorlotita per la Nigra Maro, la loka rivereto ne plaĉis. Kial? Legu en ĉinuma *Cerbe kaj Kore* la ŝercan rakonton, kiun verkis pri simila situacio mia filo (mi ĝin iom ŝanĝis kaj tradukis en Esperanton).

En IvERo-4 mi penos partopreni malgraŭ la longa distanco de Krimeo ĝis Ivanovo.

Jefim Zajdman (Ukrainio)

Du viroj bierumas. Unu demandas:

- Kio estas logiko?
- Hm... Kiel mi tion klarigu al vi... Jen vidu, iras du viroj, unu estas malpura, la alia estas pura. Kiu iras en banejon?
- La malpura...
- Ĝuste. Li estas malpura kaj tial iras laviĝi. Jen estas logiko.
- Sed kio estas dialektiko?
- Hm... Jen vidu, iras du viroj, unu estas malpura, la alia estas pura. Kiu iras en banejon?
- La malpura...
- Tute ne! La pura! Ja la malpurulo estas tia ĉar li neniam laviĝas. Jen estas dialektiko.
- Bone, sed kio estas filozofio?
- Jen vidu, iras du viroj, unu estas malpura, la alia estas pura. Kiu iras en banejon?
- Diablo scias!
- Jen! Estas ĝuste filozofio.

(esperanto-anekdotoj)

LEGOTROVAĴOJ DE ANATOLO GONĈAROV

(Prepozicioj kaj adverboj rolas prefiksojn)

Tiun materialon eblas uzi en paroligaj (perfektigaj) kursoj kaj dum la klubkunvenoj. Klubestro povas en pluraj kunvenoj legi poparte la ekzemplojn, proponante cerbo-sturme elpensi aliajn same interesajn ekzemplojn. Eblas premii ktp. A.Gonĉarov (Sankt-Peterburgo)

AL

Kion do vi deziras, se vi ne deziras pluresti kun ni? Pilgrimi suden mi deziras, **aljenis** Audun. *(el la islanda)*

Tien li **alĉevalis** kaj ekvidis alkuri kontraŭ si tridek ŝafinojn. *(el la islanda)*

Ĝi konis siajn **alsuprojn**, staginojn kaj falojn depende de la sociaj kondiĉoj. *(originale, ruso)*

Ŝi rigardis ilin de alte, **aletendis** flakonon de parfumo. *(el la franca)*

Preskaŭ senescepte vendistinoj estis malsveltaj virinoj kun fortaj pulmoj kaj Di-donita rajto **alfaŭki** klientojn. *(originale, aŭstraliano)*

Sian nuancitan voĉon, sian senduban fascinon li uzis kiel ŝlosilajn vortojn por malfermi timigajn pordojn, kiujn la tiamaj junuloj ne kuraĝis **alproksimi**. *(originale, italino)*



SamoGono: Anatolo Gonĉarov kun Vladimir Samodaj en OkSEJT-42

jaroj. *(originale, vjetnamo)*

Tiel ankaŭ nun ŝi restos, preparos festenon... aŭ fariĝos birdo. “Fariĝi birdo!” **ĉehaltas** ŝia penso, “jes, fariĝi birdo”. *(el la kroata)*

La sekvantajn tagojn najbaroj festosalute **ĉepasadas** unuj la aliajn... *(originale, ĉino)*

Post gekuna nokt’ de dormo, //ekmateniĝas nun; sufloras //al ŝia subzonaj’, **ĉekuŝa** man’ mentora... *(originale)*

ĈIRKAŬ

Nur tiam li povis apenaŭ **ĉirkaŭokuli**. *(originale, japano)*

Tri soldatoj **ĉirkaŭkordonis** la instituton. Ni jam ne rajtis eĉ veturi hejmen. *(originale, hungaro)*

Komence du el tri lingvistoj tute ne kuraĝis antaŭ Eco (Umberto) rekte alfronti la temon de Esperanto, kaj ili klere **ĉirkaŭparolis** pri Leibnico kaj pri lingvaj malplimultoj, pri aliaj romanoj de Eco. *(originale, italo)*

ANTAŬ

Dum jarcentoj la fantastiko kun brila sukceso plenumis funkciojn de **antaŭscienca** variantumado. *(originale, ruso)*

Ne trovinte la respondon mi rezonis: la psikaj **antaŭemocioj** estas longe kaŝitaj profunde en la koro kaj ne sentataj kiel konkreta sento. *(originale)*

Aperis en la kapo **antaŭdoloro**... *(originale, ruso)*

ĈE

Kion mi povas skribi pri la revuo, kiu estis mia **ĉekusena** legaĵo de 42

– Neniam mi koleros – asertis Don Quijote. – Vi povas paroli libere, Sanĉo, sen ia **ĉirkaŭfrazo**. (*el la hispana*)

Lin tro frue, for de l' hejmo, ili tie ĉi sepultis, //Dum ankoraŭ junaj bukloj, al li blonde **ĉirkaŭŝultris**. (*el la germana*)

Ĉirkaŭkomi la citaĵon. (*originale, ruso*)

DE

... iliaj eternaj litanioj da plendoj bagatelaj, da ŝablonaj asertoj, da ekskluzive monaj **depostuloj**. (*originale, hispano*)

En ĝi troviĝas observejo alta je 39 metroj, sur kiu vizitantoj povos **derigardi** la tutan ekspoziciejon. (*originale, koreo*)

La naturo ne plu tiel verdis, kiel dum la someraj tagoj. Estis veninta la **deverda** sezono, dum kiu la naturo ŝanĝas sian koloron de la verdaj tonoj al la flavaj... (*originale, finno*)

Sed ne okazis la nupto inter la katolika estonino kaj la juda hungaro, kvankam Cseh **deŝtonis** la vojon kaj provis forigi barojn. (*originale, germano*)

La informadiko kaj ties socia produkto “interreto”, la unua fenomeno komunikadi en la historio de la homaro, kiu sukcesis sin **debranĉi** de la politika povo kaj kontrolo, sed ankaŭ ligas la naciojn, vivantajn en diasporo... (*originale, polo*)

EL

Ĉiuj vojaĝantoj **eltuĵas** sur la malvarman, glacian kovraĵon de la Tero. (*originale, kroato*)

Nun oni lasas la fajron **elvastiĝi** kaj la fajrobrigadistoj alvenas, kiam ĉio forbrulis. (*originale, bosniano*)

Kaj senĉese promesasdas la samon: savi la malriĉulojn per forta sana nacio kaj **ellandigo** de ĉiuj nesamnaciaĵoj. (*originale, germano*)

Grandbritio vidis nur unu **elvojon**. (*originale*)

En la ombro de la savboatoj ankoraŭ moviĝis la fantoma figuro, foriranta antaŭ ili. Tiam ĝi **elvidiĝis**... (*originale*)

Kaj paroli, tion Slamina scipovis. Li scipovis tion tiel, ke oni tiun lian ĝibon eĉ ne perceptis kaj liaj **elrulaj** okuloj ŝajnis preskaŭ belaj. (*originale, ĉeĥino*)

Kuŝante en la lito, li pensis pri tio kaj alio ĝis **elkrepuŝkiĝo**. (*el la ĉina*)

Karaktero, ĉe kiu oni **elripozas** kvazaŭ en iu bone ekipita kaj hejtita montokabano. (*originale, sloveno*)

Li kuŝis sub nekonata granda arbo kun kelkaj **ellacigitaj** kamaradoj. (*originale, japano*)

Plie, eventuale, kial ne **elruzi** duonan labortagon per falsa subita aĉiĝo de la farto? (*originale, hispano*)

Inter la ĝis nun realigitaj esperantigoj de Lorca-aj **elplumaĵoj** elstaras propralume la splenda far nia traduk-majstro... (*originale, hispano*)

En 1963 la E-grupo funkciigis E-kursojn kaj **elkulturis** nombron da aktivuloj. (*originale, ĉino*)

– Paĉjo, ĉi tie el trueto io **elskarabis**! (*originale, kvarjara ruso*)

Li enpenetris sian rustan Lancia kaj forbruis lasante ondojn da haladza **elgaso**. (*originale*)

... kiam li komencis **elbobeni** sentencojn kaj konsilojn. (*el la hispana*)

FOR

Baldaŭ li **foraviadilis** en Usonon.

Post fari la plej necesajn aferojn Sonja **fortrajnis** hejmen.

La birdaro rapide **forflugilis** suden.

Li, cetera, ne jam bezonis tiun virinon, post [kiam li] **foramis** ŝin.

Li **forhezitis** ankoraŭ kelkajn tagojn.

ĜIS

Ĝis-malfrua babilado – foje brua – malhelpis profundan dormadon. (*originale, iranano*)

Tiu traduko montras **ĝisdatecon** de Esperanto el teknika vidpunkto.

Jam ĉe la **ĝispaŝo** antaŭ la angulo li pretigis sin... (*el la kroata*)

Fanoro **ĝisfingris** la lastajn vortojn kaj eliris la ĉambron. (*originale; temas pri tajpado*)

INTER

Je la naŭa ili decidis iom promeni kaj forte **interbrakita** la duopo paŝis tra la stratoj. (*el la nederlanda*)

La frazo sonis kvazaŭ magia tondro el feina **interdento**... (*originale, ĉino*)

De tempo al tempo doganistoj **interkaptas** grandajn sendaĵojn de drogaĉoj. (*originale, holandano*)

Kaj mi vere ne povas eltrovi kulturvaloron krom la literaturo, kiu povas **interĉeni** homojn diversnaciajn. (*originale, hungaro*)

KROM

Al ĝi (dometo) apartenis proksimume unu akreo da grundo kaj du-tri kadukaj **kromkonstruaĵoj**, kaj jen ĉio. (*el la skota*)

Do, tiu doktoro X aĉetis la dometon de maljuna sinjorino, kiu vidviniĝis kaj ne plu deziris havi tiun **kromdomon**, ŝi ja posedis domon en la urbo. (*originale, norvego*)

... private aĉetis nefunkciantan kinoteatron en Weferlingen... kun salono, koktelejoj kaj multaj **kromĉambretoj**. (*originale, germano*)

Doktoro Gulopez ridis.

– Mi ankoraŭ volus **kromdemandi**: ĉu ekzistas inventaro de la ŝip-apoteko? (*originale*)

La socia idearo (“filozofio”, se vi volas) de Zamenhof, Lanti, Privat – por mencii nur la plej gravajn – estis **kromtuŝaĵo** de iliaj biografioj, sed malofte objekto de apartaj studoj... (*originale*)

KUN

Al tomboj de la **kunsoldatoj** //Mi volas fari la viziton, //Ni en tranĉeo, kazematoj //Sakrante damnis la militon. (*originale, latvo*)

... tamen mi ne povis dormi, do por mallongigi la lacigan vojaĝtempon observadis mi la **kunpasaĝerojn**. (*originale, polino*)

Por ripari la mondon, oni devas obei la ordonojn de la Biblio, de la Torao. Oni devas amiasian **kunhomon** kaj afable konduki kun li/ŝi. (*originale, usonano*)

Post 71-hora aranĝo konstatigis, ke la plej longa kiso daŭris 54 horojn kaj du minutojn. La **kunlipuloj**, geedzoj Loreta kaj Linas... (*originale, litovo*)

La sveda lingvo estas **kunoficiala**, lernata en lernejo, sed la komuna nacia lingvo estas la finna. (*originale, hispano*)

Malfacile ne sonĝi //pri vivo **kunvia**, //pri amo de vi. (*originale, svedo*)

Laŭ la iom komplika ĉina registara sistemo ĈEN Haosu estas paralela ministro pri eksterlandaj aferoj, kiu **kundecidas** pri aferoj de la eksterlanda politiko. (*originale*)

Ĉi-foje ni vidas (en filmoj) la ĉiutagan mondon de droguloj el ilia vidpunkto, t.e. ni **kunvidas** kaj, certagrade, **kunvivas** ĝin. (*originale, hispano*)

Atendas min vivo en la domo..., kiun fraŭlino Partout kaj mi **kunaĉetis**. (*originale, francino*)

(Со-трудничать, со-ответствовать, со-держать, со-виновен – **kunkulpas**...)

NUR

SEASKA zorgas ne nur pri la edukado en la vaska lingvo kaj progresiva enkonduko de la

franca, sed ankaŭ pri la batalo kontraŭ **nur-franca** kultura etoso.

... oni povas esperi, ke **nur-galega** ĵurnalo povos vivi. (*originale, galego*)

Poste mi trovis kaj ekkonis grupojn... Poste provojn ideologii esperanton (eksterajn kaj internajn), ĉar la **nur-lingvo** estas spaco malplena, do neakceptebla... (*originale, polo*)

... la karaktero de Esperanto kiel tuto dekomence estis determinita. Ĝi ekzistas nur kiel kontribuo al paco, al internacia kompreniĝo kaj interreta toleremo. **Nurlingva** Esperantio ne ekzistas. (*originale, hungaro*)

Nuntempe la materiala kaj **nurekonomika** pensado de la homoj precipe en la industriaj landoj... (*originale, germano*)

Ĉe la fino de la volumo oni trovas 49-paĝan indekson, kun trovlokoj, kaj de la kapvortoj kaj de la vortoj **nurenartikolaj**. (*originale, ĉeĥo*)

PER

Mi ne subfalis al la malbona sorto! Mi evitis morton **permalsatan**, kaj vivon **peralmozan**... (*el la pola*)

... kies posedon, eron post ero, ŝi multjare **perstrebis**. (*el la hindia*)

Dum ŝi iris antaŭen senbrue, ŝajne senĝene, mi kun peno **perknaris** antaŭen sur antikva, iam-nigra rusto-riĉa praciklo. (*originale, svedo*)

– Sinjoro, – diris tiu panjo, kiam mi trankviligis ŝin iom, – vi estas poeto; pro via amo al homo mi **perĵuras** vin, savu mian filon. (*el la ĉeĥa*)

PLEJ

... des pli, ĉar vi devas esti **plejekzemplulo** por ĉiuj ni kaj por la popolo. (*el la serba*)

Tiom da tempo li estis droninta en tiun projekton, en sian **plejamon**. (*el la serba*)

Jen bela stilekzerco por gvidi tiujn sensacojn sur la literaturan terenon kaj elĉerpi la **plejsukon** tra kvar malsamaj filtroj. (*originale, hispano*)

Se ni ĉiuj aktivus, ni povos rapide iĝi la **plejklubo** de nia E-asocio. (*originale, ruso*)

PLU

La **pludono** de la torĉo. (*originale*)

Strikado estas laŭ ili strat-terorismo kaj eĉ **plustrikantoj** devas esti enkarcerigitaj laŭ ili. (*originale*)

... mi volus nun ligi la ĉi-suprajn ideojn de Daaŝ al du aliaj pensoj. Kaj peti vin **plupensi** prie. (*originale, hindiano*)

Kaj ĉu iom postulema leganto povus ignori lingvajn malglataĵojn kiuj malhelpas fluan **plulegon**? (*originale, hispano*)

POR

La **por-ŝtonuloj** venkis, sed kiu gvidos la konstruon. (*originale, skoto*)

... iuj lernantoj sukcesis akiri lektorecon, aliaj fariĝis **por-magistriĝaj** studentoj. (*originale, ĉino*)

Li ne kontraŭparolis al Hamada, sed ankaŭ ne **porparolis**. (*originale, japano*)

Unue li enmetis kompresoran tubon en **portruon**, kaj premaere liberigis kontaktilojn. (*el la serba*)

POST

Ankaŭ la **postmilito** ne finiĝos ĝis ĉiuj el la suferintoj ricevos la kompenson morale kaj fizike. (*originale, japano*)

– Kial vi ne faris viziton ĉe mi post la reveno?

– Pro **posttimo**. (*originale, ĉino*)

Jes, en la sama dato 20 jarojn post Pikka, pro la **postmalsano** de la atombombo. (*originale, japano*)

Tiuj scenoj saturas niajn filmojn celantajn memorigon de naciaj herooj kaj edifon al **postgeneracioj**. (*originale, ĉino*)

Posttagmeze la administracio, suferanta **postebrion**... (*el la angla*)

Postkomencanto estas – same kiel en tiu franca proverbo – io inter fiŝo kaj krabo, la plej komplika stato de Esperanto-estado. (*originale, kroatin*)

Ni manĝis iom. **Postbabilis**, komente pri la vespero, la nokto. (*originale, nederlandano*)

Doktoro Gulopez **postokulis** ŝin kun stranga esprimo... (*originale*)

Kion sciis tiu nana olduleto kun sia aĉa aldiviolono, per kiu li kiel la eterne dua persono ĉiam nur **postzumis** la muzikon luditan de aliaj. (*el la hungara*)

PRETER

... tio ne estas en la Fundamento, do estas **preterfundamenta**, estas ja kontraŭfundamenta. (*originale, italo*)

Marta kaj mi **preterlaboraj**. (*originale, ruso*)

Ho, Perlo! Mia principeto, mia **preterpreza** Perlo! Vi ja estas filino de reĝo. (*originale, anglingo*)

... iliaj estroj kaj armeoj, enpensigas paralelaĵojn niatere kaj donas al la libro **preterprezan** aktualecon. (*originale, novzelandano*)

Litova Demokrata Laborista Partio – **preterrapidis** kaj superis la Litovian Popolfronton. (*originale, litovo*)

La novelo, aliflanke, sorbis preskaŭ la tutan atenton de la prozistoj, dum la romanon oni **preterzorgis**. (*originale, hispano*)

Tutklare kaj surprize montriĝis ke la movado en Aŭstralio brile **pretervivis** la organizadon de la 82-a Universala Kongreso. (*originale*)

Dudek dolaroj ĉiusemajne ne **pretersufiĉas**. Elspezoj estas pli grandaj ol ŝi antaŭkalkulis. (*el la angla*)

Kompreneble oni povas certagrade ilin **pretervidi**... tamen ili ĉiam ekzistis kaj ĉiam ekzistos.

PRI

Kio do mi estas? De kie mi devenas? **Prirespondo** ne estas ebla. Aldone mi diru... (*originale, hispano*)

Ĝenerale la amo eĉ sen **pripreĝo** povas ricevi dian gracon... (*el la japana*)

Tina, la funebranta vidvino, sentis sin ankoraŭ juna, sentis sin ŝatinda floro. Ŝi estis **prikonscia** kaj ne rezignis velkadi en soleca melankolio. (*originale, hispano*)

– Sed kian laboron?

– Nenian **priideon** mi havas. (*originale, franco*)

Ili decidis **priscii** la aferon. Kvindeko da viroj kaj junuloj ekiris kun bonaj ĉevaloj... (*originale, brazilano*)

... oni spertis ke Esperanto fakte estas ideo de la dua speco – “sintrudema absurdnocio”, kies potencon **pripoemis** Ŝulhof, Kalocsay kaj Auld... (*originale, kanadano*)

Ŝi **priungis** mian vizaĝon. Mia peruko falis, kaj ŝi gapis al mia nuda kapo. (*el la angla*)

Kvin minutojn poste ŝi **prihurlis** al li piĝamon. “Senvestiĝu, vestu al vi la piĝamon...” (*originale*)

SEN

La omnibusoj staras en la arbara **senarbejo** sur la vojo. (*el la estona*)

Multaj **sendormis** tranokte, eluzante sian ŝancon ekkoni novajn homojn kaj amikumi.

(originale, koreo)

La vivo ŝajnas al ŝi peza kaj **senmorgaŭa**... *(el la pola)*

Marta. Tiu sola en la iama patra hejmo, kudras kaj teksas dum la tuta tago por vivteni sin, katenita al endemia **senĝojo**. *(originale)*

Estis la plago por Koreio – pereis multaj animaloj, mortadis pro **senakvo** legomoj, fruktoj... *(originale, ukraino)*

Usono, Aŭstralio, grandaj partoj de Afriko kaj Orienta Eŭropo liveras preskaŭ **senfinejon** da “libera” ebenaĵo, herbejoj k.s. por surteriĝi. *(originale, nederlandano)*

Mortkondamno ne ĉefe pro la mortigo sed grave pro mia **senlarmino** dum la entombigo de la patrino... kiu mortis ĵus antaŭ la kazo. *(originale, ĉino)*

SUB

Ŝiaj oreloj staris kaj ŝia vosto estis rigida. Poste ŝi **subbojis** kaj komencis snufi apud la pordo. *(el la skota)*

Kiom da faktoj mi malkovris... Kaj mi **subsentas** multon, kiun mi iam rivelos al la scienca mondo... *(originale, franco)*

– Kio okazis al vi?

Ŝuej diris **subvoĉe**:

– Morgaŭ mi aliĝos al la distrikta trupo. *(el la ĉina)*

... estas specifa problemo nepre ne **subestiminda**, ke islamo kiel religio estiĝis post la ekesto de kristanismo. *(originale, nederlandano)*

Tiun okazintaĵon la familio de ... tenis ĉiam sekreta. Pri tio **subsciis** nur malmulte da personoj. *(el la ĉina)*

– Ne moku. Kelkaj ideoj **subkuŝas** viajn novelojn, kaj ĉi-tiuj produktoj de via plumo ne ilustras ilin... *(originale, hispano)*

... la ordenaj gevivantoj interesiĝas krom pri esperantologio, nur pri **subjupo** kaj **subkalsono**. Ĉu la aŭtoro ne havis alion ol erotikon por priskribi homajn vivojn. *(originale, japano)*

SUR

Mi eltenadis ĝis la tago, kiam mi **survangis** mian mastron, kiu estis fortirinta min en keloangulon... *(originale)*

... mi persone toleris jam sufiĉe. Mi sopiregas doni al vi **surnazon**. *(originale, novzelandano)*

... mi brodis ĝin por vi antaŭlonge. Ĉu vi volas ĉion **surprovi**? *(el la franca)*

Sur la tersurfaco videblas multe da krateroj. Tio pruvas, ke tiaj elkosmaj **surtrafoj** ne estas maloftaj. *(originale, germano)*

... la sep plej grandaj pecoj trafis en oceanojn... Tiuj estas ŝtonoj, kiuj estiĝas pro la varmego kaŭzita de la **surbato**... *(originale, germano)*

TRA

Dum **tranakto**, li redaktis, printis, dissendis en la reton ĉiutagan konferencan informilon. *(originale, francino)*

Mi **tranazis** ĉiujn liajn verkojn. *(originale, anglo)*

Due mi ŝatas atentigi pri kelkaj koboldoj, kiuj **trapetolis** mian novelon *(originale, portugalo; temas pri preseraroj)*

Estis larmoj ĉie, sur la **trakuseno**, sur la ĉemizo, sur la rando de... *(el la franca)*

TRANS

Kaj **transdiru** al ili, ke en nia patrujo... (*originale, kroato*)

Male Manuel de Seabra venis al Barcelono, kie li vivas ekde 1954, kaj, lingva **transfuĝinto**, verkis... (*originale*)

Post nur dudek jaroj, la spertaj dezerto-militistoj... **transfuriozis** la limojn de siaj najbaroj... (*originale, germano*)

... la knabinoj mem, ĉiu el ili oferanta siajn vundojn, dolorojn, agoniojn; kaj ĉerpanta el la ofero dolĉan ĝojon **transtiman**. (*originale, hungaro, longege en-Francia*)

Sekve oni trovis la solvon disdoni al la gajnintoj portretojn de Hajoŝ kun lia propramana subskribo: jen denove io same **transformale** alia ol doni ordenojn. (*el la hungara*)

Por **transponti** la problemon li simple proponas majuskligi la “ĉapelitajn literojn”. (*originale*)

... por pridiskuti kandidatojn por diversaj postenoj kaj la aranĝojn farendajn por certigi **transponton** de la laboro de la malnova al nova stabanaro. (*originale, anglo, longege en-Usona*)

TUJ

La artisto Flers reprezentis ŝin sur flankmuro de domo, **tujproksima** al stratangulo. (*el la franca*)

En nov. 1986 la Eŭropa Parlamento akceptis rezolucion por asigni 50 mil ekuojn por starigi “**tuj-brigadon**” (*angle – flying squad*) de fraŭdkontrolistoj.

... kaj preparis por ili kaŝon el **tujpreparaĵo**. (*originale, japano*)

Antaŭ mi **tujtago** vole //Uzas ventojn – punkto pinta //Dige inter tempajn marojn... (*originale, ruso*)

... pri posedo de nur unu ĉifona vestaĵo kaj nasko de **tujmortontaj** beboj. (*originale*)

Li estas **tujfara** homo. (*originale, ruso*)

P.S. Kelkaj el tiuj ĉi trovaĵoj estas troveblaj ankaŭ en PIV aŭ eĉ ĉe Zamenhof, tamen ni decidis lasi ĉiujn ekzemplojn, ĉar ili estas vere interesaj kaj ĉar tiaspecaj esprimoj ankoraŭ ne ofte renkontiĝas en nia lingvo. (La red.)

MALFERMINDA LETERO

Al la maltaŭgепensuloj, s-roj LLZfoj

Al la RESEJManoj, s-roj Malgonĉarovenko

Altrespektaj ge(?)sinjoroj,

Mi atente tralegis vin en la abonata de mia spirrito REGo № 4. Kaj mi eĉ ne deziras paroli pri tio. Mi deziras krii! Mi ne scias kiom da vi estas, sed mi kriu, ke ĉiuj vi estas... ĉu-sobraj, jes-kompetentaj kaj eĉ-estimindaj bonaj homoj(?). Por pravigi tiun ĉi se-blasfeman aserton mi venu al Anna-Liiza. Ne, al ŝi mi planis jam por morgaŭ. Hodiaŭ, do, – al analizo. De viaj ek-revelacioj pri OkSEJT kaj RET. Ĉar mia spirrito ŝvebis tie kaj tie, mi naskis demandojn. Kaj respondojn – por ne forrabi vian ĉu-valoran tempon.

Do, vin, karaj LLZfoj, (mi citas) “vizitis simplega penso”. Ke nia movado ne pretas por havi du... ĉar ne sufiĉas esperantistoj. Aŭ, ĉar sufiĉas. Aŭ, ĉar oni ne kompetentas. Mi ne komprenis, kaj naskis la banale rusan demandon: tamen, kiu kulpas? Respondo (elektenda):

1. Kokolija; 2. Puŝkin; 3. mi.

Kaj vi, estimendaj RESEJManoj!? Vi (mi citas) ne estas “plene kontentaj pri la apero de novaj junaj esperantistoj”. Des pli – “se-venaj”. La demando estas eĉ pli simpla – ? Respondo (elektenda): 1. !; 2. !!; 3. !!!.

Ĉu ekzistas problemoj? Respondo (senduba): Jes!

Kiel la solvon LLZfoj (pli legokleraj) subŝovas demandon (mi citas): “Quousque tandem abutere, Catilina, patientia nostra?”. Respondo (elektenda): 1. “Qualis rex, talis grex”¹; 2. “Odi profanum vulgus”²; 3. “Lapsus calami”³.

Kiel la solvon RESEJManoj (pli sagacaj) se-kaptis la ideon pri nova koncipio. Aŭ koncepto. Pardonu – aĝo... Tamen, ĉu ili (vi) scias, ke la rado estas jam inventita? Ke en 1883, se mi ne eraras, VOLEJM (Volapuka entuziasmula junulara movado) patentigis kaj envivigis la ideon pri la Paroliga Periodo por ĉu-nulaj komencantoj kun samtempa VOLEJM-

Konferenco por aktivuloj? Des pli – kun posta veno de ambaŭ triboj al unu loko por kune festi! Respondo (elektenda): 1. Apenaŭ; 2. Ĉu-u?!; 3. Memkompreneble...

Tamen, OkSEJT okazis. Mia spirrito diras, ke pli-malpli sukcese. Ankaŭ dank’ al ĉeesto de la tri kavaliroj – Blinov, Gonĉarov, Samodaj. Se estus pli da kavaliroj – estus pli...

Tamen, okazis ankaŭ RET. Mia spirrito diras, ke pli-malpli amase. Ankaŭ dank’ al pri-PR-ita se-veno de Ĵomart kaj Nataŝa, ensemblo de Soroka k.a. geloguloj. Se estus malpli da – estus malpli...

Sed demandoj! Mi ŝatus prezenti almenaŭ kelkajn pliajn.

– En OkSEJT deficitis spertuloj, do, la kompatindaj kavaliroj nur trikape devis priservi la amason! Ĉu tiel? Kaj, ĉu venus pli da balenoj ĉe pli intensa persvado eĉ individua? Respondo (elektenda): 1. Venus; 2. Se-venus; 3. Al Diabolo!

– En RET deficitis komencantoj, do la kompatinda ruĝokula (ĉar ne dormis nokte) Pigo, venanta ĉiumatene al la deka por gvidi la unikan kurson, stertoris al mia spirrito: “Donu almenaŭ unu komencanton!” Kaj plej fervore venis lin aŭskulti ĉiutage nur V.Melnikov (ĉar dormis nokte), aroge rigardanta la Instruiston sen subteni la kantadon. Ĉu tiel? Kaj, kial do (se estis antaŭvidata la kurso de Soroka) mia (kaj via) amiko Alalaskin severe avertis pri neakcepto de nulaj komencantoj? Respondo (elektenda): 1. Li ne sciis... 2. Li ne supozis... 3. Li ne kulpas...

– Do, ĉu endas kunigi RET kaj SEJT? Respondo (elektenda): 1. Ne-e; 2. Je-es; 3. Eble – laŭ la patento de VOLEJM (vidu supre).

Kaj fine – kial en la sama loko? Ankaŭ mia naskiĝurbo Vidropuĵsk, i.a. situanta pli proksime de Moskvo ol tiu Kovorovo, pretendus...

MENADE BAL – PŬKI BAL!⁴

*plej respektplene – Johan Martinus Šlejerbah,
honora membro de SEJM ekde 1888 (vidu koncernan protokolon)*

¹ “Kia reĝo, tia grego” (lat.)

² “(Mi) malestimas profanan amason” (lat.)

³ “Misskribo”, aŭ “Eraro de la aŭtoro” (lat.)

⁴ “Al unu mondo – unu lingvon” (Volapuko)

ESPERANTO, KULTURO, EMOCIOJ KAJ ESTETIKO – KIOM KUNIGEBLAJ ILI ESTAS?

(*Lingvokulturologia studo; fino, vidu la komencon en REGo № 3(10), 4(11)*)

4. Estetika funkciado de Eo surbaze de ĝiaj strukturaj apartaĵoj

4.1. Enkonduko

Kompreneble, krom la universale homaj/lingvaj premisoj de apero de la estetika lingvo-funkcio, IPL-j povas havi la *specifajn*, bazitajn sur ties *konkreta strukturo*. C.Piron, ekzemple, elstarigas jenajn distingajn kvalitojn de Eo: ‘neŝanĝblo de la vortelementoj; senbara povo ilin kombini; emo al formaĵoj simplaj kaj koncizaj; elvokado (= metaforigo – A.M.) prefere ol difinado; eblo per-finaĵe alsigni al iu ajn vorto iun ajn gramatikan funkcion, kio igas la esprimon laŭvole analiza (li havas voĉon similan al tiu de Petro; li iris al la hotelo per takso) aŭ sinteza (li similas Petron voĉe; li taksii hotelen, li iris hotelen taksie).’

Se paroli pli larĝe (pri malsamaj principoj de IPL-konstruado), rilate la leksikon ni konstatas, ke eblas ĉerpi la leksikerojn de IPL *el etnaj lingvoj* (aposterioraj lingvoj: Eo, Ido, Interlingua k.a.) aŭ konstrui ilin laŭ iuj principoj de *formala logiko* (logikismaj, ‘filozofiaj’ lingvoj). Unuakaze, oni, krome, povas limigi sin nur per *unu lingvo* aŭ *pluraj*. La rezultoj en ĉiuj tiuj manifestiĝoj diversos.

4.2. Kulturaj asocioj en leksiko de aposterioraj E-tipaj IPL

Laŭ A.France, la vortoj de la artefaritaj lingvoj (=IPL-j) ne havas *asociojn nek nuancojn*; ili estas abstraktaj, tial ĉiu traduko en Eon povas esti nur pala kopio, por ne diri fuŝaĵo (kripligo), de la originalo. K.Kalocsay (plue KK) opone atentigis, ke la vortoj de Eo estas prenitaj el la internacia materialo, kaj tial ili jam dekomence havas ĉiujn *internaciajn asociojn kaj nuancojn el La Biblio, antikva mondo, komuna nuntempa kulturo*. Tute akorde kun la vortoj de KK pro la influo de la kulturo de la antikva mondo *laŭro* havas en Eo ne nur botanikan, sed ankaŭ figuran kromsignifon de venko, atingita alta pozicio ktp. (kp. ‘rikolti laŭrojn; ripozi sur siaj laŭroj’), kapro povas asociiĝi kun la Biblia senkulpe viktima ofera besto (kp. ‘propeka kapro’) ktp.

Konsentante kun KK principe, ni tamen ne akceptas, ke E-aj vortoj konservas *ĉiujn* internaciajn asociojn. V.G.Gak, kiu traktis bibliajn frazeologiaĵojn en la rusa kaj franca lingvoj rimarkis, ke inter ili ekzistas pluraj tipoj de malkoincido: diverĝo pro objektivaj kaj subjektivaj kaŭzoj (naturkondiĉa kaj kultura malsameco de la koncernaj landoj; diversa traktado de iu realaĵo, reliefigo de malsamaj eroj de la sama situacio); diverseco de leksika aparteno (frazeologiaĵo – neŭtrala vortkuno; alta – neŭtrala stilo ktp.) kaj gramatika kategoriigo. Ekzemple, la protagonisto de unu el la bibliaj libroj (Luko), kiu forlasis sian hejmon, vagabondis kaj prodigis sian havaĵon, estas nomata en la rusa ‘блудный сын’ (en la nuntempa rusa lingvo ĉi-adjektivo sonas ne nur kiel ‘vojerarinta’, sed ankaŭ kiel ‘malĉasta’), en la franca ‘le fils prodigue’ (‘filo-prodiginto’) kaj en la germana ‘der verlorene Sohn’ (‘la perdita filo’, ĉar li estis perdita por la patro). L.Zamenhof uzis en Eo ‘erarinata’ kaj ‘perdita’. En Eo kaj la franca ekzistas respektive ‘propeka kapro’ kaj ‘le bouc emissaire’ (frazeologiaĵoj), en la germana – ‘der Sundenbock’ (unuopa kunmetita vorto). Do, eblas diri, ke en Eo konserviĝas pluraj, sed *ne ĉiuj* asocioj kaj nuancoj de la Biblia mondo.

Asocioj, aludoj ktp. komunaj por la monda, kaj antaŭ ĉio – al la *eŭropa kulturo (almenaŭ tiu parto, kiu fariĝis iugrade tutmonda, komuna por la tuta ‘civilizita homaro’)*, konserviĝas ankaŭ en Eo. Ĉiu E-parolanto (plue EP) komprenos, ekzemple, la lingvan ludon esprimitan en la vortoj ‘kokakolonizado de la mondo’ (Coca-Cola + kolonizado) pro la nura fakto, ke tiu iom simbolkaraktara trinkaĵo estas konata ĉie. Kaj en la ŝerca frazo ‘mi venis, vidis kaj vicis’ (pri IJK en Krakovo kun longaj vicoj ĉe la akceptejo) ni vidas ilustraĵon de

tio, ke E-lingv(aj)o absorbas eŭrope konatajn citaĵojn kaj ‘flugilhavajn vortojn’ el diversaj kulturoj. Kompreneble, la estetika valoro de la supre citita frazo povas esti (kaj kutime ĝi ja estas!) apreciata nur se leganto memoras la latinajn ‘veni, vidi, vici’.

4.3. Specifaĵoj de la lingva fonemika, prozodia kaj leksika tavoloj

Kiel prave skribis M.Kopylenko (plue MK), al la esprim-rimadoj de Eo eblas klasifiki vortojn kun ‘esprimec-kvantumoj’ (ekz.: klaĉi, kviviti, luli k.a.). Ni aldonu al ili *stile markitajn* vortojn, kiel ‘olda’ (poezia), ‘kaĉo’ en la signifo ‘pelmelo’ (parola), terminojn ktp. Malkonsente kun MK, kiu opinias, ke *arkaika leksiko* en Eo forestas, ni oponu, ke malgraŭ la ‘juneco’ de Eo, en ĝi jam aperis aro da vortoj, kiuj estis aplikataj nur en la unua etapo de la lingvo-uzado. Tiel, anstataŭ ‘falŝirmilo, malverdiri, ĉevaliri, mirrakonto’ nun oni ĝenerale uzas ‘paraŝuto, trompi/mensogi, rajdi, fabelo’. Aperis ankaŭ tavolo de vortoj, kiuj etikedas malnovaĵojn (do, plia speco de arkaika leksiko). Nature (evoluezulte) arkaikiĝas ankaŭ vortkunoj kaj idiomajoj. Okazas kelkaj ŝanĝoj en la uzado de morfologiaj kategorioj (ekzemple, anstataŭ ‘danke ...-on’ nun oni kutime diras ‘dank’al’).

Ĉar la vortoj de Eo havas sufiĉan *redundancon*¹ (kiu eĉ plifortiĝas per la kunteksto) kaj *malgrandan entropion*, iĝas ebla ioma ‘kripligo’ de leksiko cele atingi certan estetikan efekton. Tio estas farata por lingvaĵa karakterizo de *eksterlandanoj, ebrtiĝintoj, dialektanoj, nesufiĉe kleraj esperantistoj* ktp. Ekzemploj: 1. Iu el la ĥinaj gardistoj malfermis la pordon kaj enkriis: Polti manĝaĵo al kuilejo! (anstataŭ la korekta: “Portu manĝaĵon al la kuirejo!”) 2. Vi pens’s, mi est’s ‘bria – jen kio?... Mi dev’s zorgi pri mia rep’taci’n... (estas ellasitaj la vokaloj ‘a, e, u, o’ kaj misuzita la akuzativo).

Simila ebleco estas uzata en humurcelaj aŭ protagonist-karakterizaj ‘*fremdlingveskigoj*’. Ekzemple, en la frazo ‘Subajti, la ĝunulo bikamas krejza...’ oni facile povas malkovri anglece misprononcitajn/skribitajn Eajn vortojn ‘subite, junulo’ kaj hibridojn de anglalingva radiko kun E-finaĵo (‘bikamas, krejza’).

Alternado de (*ne*)*akcentitaj silaboj* (cetere, ritmo estas unu el la fundamentaj kaj gravegaj fenomenoj de la homa vivo, biologia kaj socia), *vir(in)aj rimoj, aliteracio kaj onomatopeo* k.a. rimadoj ebligas uzadon de Eo por kreo de facile memoreblaj proverboj kaj diraĵoj: ‘tuŝe-fuŝe’, ‘dise-mise’, ‘se ne estus ‘se’ kaj ‘tamen’, mi al ĉio dirus amen’, ‘ne ŝovu la nazon en fremdan vazon’. La samaj faktoroj gravas por ekzisto de E-poezio. Nuntempe formiĝis jam certa lingvopoezia tradicio de Eo, priskribita en ‘Parnasa Gvidlibro’ de K.Kalocsay, G.Waringhien kaj R.Bernard. Aliflanke, uzo de rimaĵoj en neŭtrala prozo kaŭzas efekton de miseco aŭ komikeco.

4.4. Specifaĵoj de vortfarado

Por estetikaj/emociaj celoj, observe de MK, povas servi *ekspresivaj afiksoj* (MK nomas la pejorativajn ‘fi-, -aĉ-’; laŭ ni, al ili nepre necesas aldoni la mejorativajn: malofte uzatajn ‘-ĉj-, -nj-’ kaj sufiĉe disvastiĝintan ‘-et-’). Estetike valoras ankaŭ *ekspresiveco de la afiksitaj kaj kunmetitaj vortoj*. Kiel konate, dum formado de vortoj el morfemoj okazas ne simpla *adiciĝo* de l’ ingrediencaj sencoj, sed ilia *integrado* kun rezultata nova krom- aŭ nuanc-senco (aldona al la sumo de la originaj senceroj). Proksimeco de la formoj ‘radika-derivita/kunmetita’ formoj kun ebla disĝo de la signifoj donas potencon instrumenton por IPL-uzanto. Jen du ekzemploj el ordinara komunikado de EP-j: ‘necesas ne nur labori, sed ankaŭ perlabori’; ‘– En mia buŝo estas tero. – Verŝajne, vi manĝis terpomon: pomon formanĝis, kaj tero restis’. En la versoj ‘Morton ne timas mi... kio teruras, kio malbonas, estas mortado’ la sufiksita vorto signas ne nur la fakton de daŭra procezo, sed ankaŭ ĝian turmentecon, nedezirecon, malplaĉecon.

¹ Redundanco estas ‘superflueco’ (kiam io estas esprimita plursigne/plurmaniere).

Rilate al la E-aj afiksoj, oni aplikas la principon de *‘sufiĉo kaj neceso’* (‘se eblas esprimi ion sen afiksoj, oni faru tion’). Sed tiu principo estas iom arbitra, subjektiva. Tial en la E-aj tekstoj oni povas renkonti ambaŭ tendencojn (‘ŝpari’ kaj ‘malŝpari’ E-afiksojn, principe ‘-aĵ-’, ‘-ec-’, ‘-ad-’, ‘-iĝ-’, ‘ek-’). Kiel asertas R. Rossetti, Kabe kaj Lanti uzis ‘-ec-’ kaj ‘-aĵ-’ pli ŝpareme ol Lapenna kaj Zamenhof (kvankam tiu lasta fojfoje agis same kiel la unuaj). La varieblo kaŭzas diverĝon de *‘idiostiloj’*, kio kontribuas al la riĉiĝo en la paletro de kreaĵrimedoj.

Supla limo inter specoj de parolo [vortkategorioj] permesas grandan variecon de esprimo. Iuj el variaĵoj akceptas prioritatan (uzusan) staton. Aliaj estas aplikataj malpli ofte kaj jam pro tio ricevas esprimecon. ‘Jongle li vortas’ anstataŭ la kutima ‘li ĵonglas per vortoj’ kaj ‘ĝentile frazis hejme, sakris strate’ anstataŭ ‘li parolis per ĝentilaj frazoj...’ sendube havas estetikajn efikojn.

Al ‘sukeco’ de la lingvo kontribuas ankaŭ la *ebleco formi vortojn el ajnaj morfemoj*. Interesa ekzemplo de la dirito povus esti ŝerca frazo kiun ni aŭdis en unu el junularaj E-tendaroj de Sovetio: ‘Ina aro ekas iĝi ege aĉa’. Estetika valoro ĉi-kaze originas el la arigita uzo de la nekutima modelo ‘afikso+finajo’.

4.5. Specifaĵoj de internacia, sekundara kaj vast-norma karaktero de Eo

En Eo estas *permesita ĉio*, kion komprenas diverslingvaj EP-j kaj kio ne kontraŭas la Fundamenton de Eo. Tial la *individua krea emo/ivo* de ĉiu unuopa EP kaj malkoincido de la E-aj *modeloj* konstruitaj *influe de malsamaj gepatraj lingvoj* kondukas al *abundo de idiostiloj* kaj aperigas amasajn, eĉ pli multajn ol en la etnaj lingvoj, *porokazajn vortojn* (kp., ekzemple, la lorĵakajn idiostilajn ‘paŝari, scideziri, rideri’ anstataŭ respektive ‘iri, scivoli, rideti’). Samdirekte kontribuas ankaŭ la *sekundareco* de IPL, kiu sekvigas, cetere, ke la *lingva kompetenteco* de EP-j averaĝe devus esti iom *malpli* alta kompare kun etnolingvoparolantoj. Rezulte, porokaza vorto povas aperi *pro nura nescio* de iu vorto. Ĉi-kaze EP substituas al ĝenerale uzata radika vorto derivaĵon/kunmetaĵon de alia(j) radiko(j). Tiu fenomeno estis humurcele uzita de R. Schwartz en la rakonto ‘Simpligita anatomio’ kun ‘kapfadenoj (=haroj), kapfasado (=vizaĝo), vidiloj (=okuloj)’.

Plia ‘unuaco de Eo’ rilatas al *‘fremdaj vortoj’* – lokismoj (=anglismoj, rusismoj ktp.), kiuj donas specifan kromguston al tekstoj, ĉefe ligitaj kun kulturoj fremdaj por EP. Ekzemple, la vortoj ‘kimono, hibakuŝo k.s.’ kontribuas al kreo de aparta etoso en konatigo kun la japana kulturo. Konsiderante, ke: 1) tradukoj en Eon fontas el multe pli diversaj lingvoj ol tio estas praktikata monde (kie superregas translingvigoj el la angla kaj kelkaj aliaj ‘mondlingvoj’); 2) en la E-movado partoprenas membroj de centoj da kulturoj, – eblas atendi ke alfluo de diversaj lokismoj en la lingvon kaj al ĉiu unuopa EP prenas signifajn dimensiojn. (Iom deflankigante, ni rimarkigu, ke pro la menciita faktoro en Eon ensorbiĝas ne nur lokismoj, sed ankaŭ diversaj *literaturaj (sub)ĝenroj*, karakterizaj por diversaj kulturoj, ekzemple, hajkoj el la japana, skandinavaj runoj kaj sagaĵoj, portugalaĵ troboj k.s. Ili trovas sian lokon ne nur kiel tradukoj el la koncernaj lingvoj, sed ankaŭ kiel E-originaloj. Vd., ekzemple, la libron de Edwin de Kock ‘Japaneskoj: poemaro originale verkita en Esperanto’ (kolekto de hajkoj, utaĵoj kaj longutaĵoj).)

E-metaforoj ofte devenas el naciaj lingvoj, kie ili jam delonge perdis sian esprimecan signifon (t.n. ‘platiĝintaj’ aŭ ‘mortaj metaforoj’). Sed por la EP-j, ne posedantaj originan lingvon de la metaforoj, la esprimeco povas ‘reviviĝi’. Ĉar la aŭtoroj de la E-aj tekstoj estas reprezentantoj de centoj da etnaj lingvoj, por ĉiu E-isto la *‘reviviĝo’ de la ‘mortaj metaforoj’* povas okazi sufiĉe ofte.

¹ Idiostilo – stilo de unuopa persono.

En Eo formiĝis *naciaj interferolektoj*¹. Ilia ekzisto estas profitata estetike fare de verkistoj, ĵurnalistoj kaj aliaj EP-j. Krome, en la E-literaturo estis provoj krei koncernan lingvo-tavolon konscie. Ekzemple, personoj de Valan'aj verkoj (J.Valano. Ĉu vi kuiras ĉine?; Ĉu li bremsis sufiĉe? k.a.) fojfoje interkomunikas *en elpensita modifaĵo de Eo*. Ekzistas ankaŭ provoj proponi '*normajn*' (=ĝenerale akceptendajn) variantojn de la *dialektikaj devioj* de la modela Eo. Tamen elpensitaj dialektoj kutime *ne akceptiĝas* por vasta uzado en literaturo.

4.6. Sintaksaj specifajoj

Transdono de interferaj dialektoj kaj 'loka/etna koloreco' estas plifaciligita per la *granda libereco de la sintaksaj normoj* en Eo. (Cetere, P.Janton opinias, ke unu el la ĉefaj kriterioj de la IPLa internacieco devas esti ĝuste tia fleksebleco, ĉar ĝi ebligas adekvatan/plej sendifektan transdonon de sintaksaj modeloj de maksimume ebla kvanto de la etnaj lingvoj.)

Malgraŭ la libereco, en Eo pleje kutimiĝis la jenaj ordoj: '*subjekto-predikato-objekto*' (roloj en la propozicio) kaj '*adjektivo-substantivo*' (vortspecoj), adverba adjekto kaj negacio devas esti *antaŭ* la koncerna vorto (*ne li* faris tion; li faris *ne* tion; li *ne* faris tion; *ankaŭ li* laboras en la uzino; li *ankaŭ* laboras en la uzino; li laboras *ankaŭ* en la *uzino*). Krome, oni emas loki tuj-kune la plej senpere ligitajn frazerojn. Tamen, analoge al la slava tendenco, oni ne ĉiam rigide sekvas ĉi-regulon. Aperas variaĵoj kun estetika ŝarĝo. Ekzemple, retorike oni uzas '*hiperbaton*' kaj '*hipalagon*'. La unua estas renverso de la kutima vort- aŭ propozici-ordo: 'Homon mildan, homon grandan, homon noblan oni mortigis!'. (Objekto staras antaŭ subjekto.) La dua atribuas iun vorton al 'misadresato': 'Mortiginte homon per tiu tranĉilo *kulpa*, li...'. ('Kulpa' devus rilati al 'li', ne al 'tranĉilo'.)

Antitezoj, ripetoj, aliaj komponaj/sintaksaj iloj gravas kaj vaste uzatas en poezio kaj samtiel en prozo. Vd., ekzemple en 'Aŭtuna elegio' de N.Kurzens: '*Ja ĉiu tag*' forlavas rabe ion! / *Ja* ĉiu *nokto* portas ion for! / *Ja* de *l' pasinto* restas nur memor', / *Ja* por *estonto* havas mi nenion.' (Ripetoj de 'ja', de la fraz-konstruoj, konfronto de malaĵoj 'tago-nokto; pasinto-estonto'.)

4.7. Specifajoj sekve de la longtempa ekzistado de la E-movado

Antaŭ ol la homaro konsentus amase uzi novan komunikilon, ĝi devas ricevi certan minimumon da tekstoj en tiu lingvo kaj konvinkiĝi, ke la ilo estas praktike taŭga. Tio naskas koncernan movadon, kiu, ekzistante sufiĉe longan tempon, ekhavas kelkajn karakterizajn trajtojn distingantajn ĝin disde la aliaj sociaj kolektivoj.

Kvankam tio estis nek celo, nek kromcelo de la E-komunumo, ĝi fakte kreis *propran kulturon, unikan kaj specifan nur por la E-istaro* (respektive – komunajn fonajn sciojn). Eroj de tiu kulturo/fona sciaro iĝis rimedoj por estetikaj funkcioj de Eo. Ekzemple, multaj E-kliŝoj fontas el '*flugilhavaj vortoj*' (el verkoj originale verkitaj en Eo aŭ plej konataj tradukoj el alilingvaj literaturoj). Ke tiaj parolturnoj estas efektive vivaj atestas ilia apliko ne nur en beletraĵoj, sed ankaŭ en ĉiutaga lingvouzo de ordinara EP-j. Ni, ekzemple, aŭdis, kiel iu EP-ino kantis al sia bebo: 'En la buŝon venis nova dento'. (Kp. la aŭtentikan 'En la mondon venis nova sento' de L.Zamenhof.) Unikaj *fonaj scioj* de TE-j estas vaste uzataj en literaturo, publicistiko kaj ĵurnalistiko por krei '*esperantecan kolorecon*', *malrektan karakterizon de literatura protagonisto, efekton de 'trompita atendo (mikroŝoko)*', *rekono, kumpuŝigo 'realaĵo-elpensaĵo'*, '*nuntempo-iamo*' ktp.

En la ĉi-subaj citaĵoj nur TE kapablas trovi kaj adekvate apreci humuron, vortludojn kaj plurajn aliajn estetikajn de la teksto: '[li] disvastigis la *Manifurzon de Prago*' (kp. 'La Manifesto de Prago'); 'al Esperanto li tradukis *Eighteen-Eighty-Seven de George Orwell*'

¹ Interferolekto – modifaĵo de sekundara lingvo, aperanta pro interfero de domina lingvo.

(aludo je la verko ‘1984’, sed kun la jaro de la apero de la unua E-lernolibro – 1887); ‘kaj kiu rolo por la E-lingva edzino? Turismi dum lia kongreso aŭ *raŭmismi* (agi laŭ la ‘Manifesto de Raŭmo’ – A.M.) en kuna progreso?’. Ĉiuj kursive markitaj aŭtentikaj aŭ intence kripligitaj vortoj rilatas al tiuj “*kun specife E-kultura ingredienco*”.

La disvastigado de IPL plimultigas ĝiajn apliko-sferojn. Tio sekvigas *stilan diferencigon*, kio siavice plifaciligas uzadon de la koncerna IPL estetike-cele. Samtempe la plikomplikiĝon de IPL kontraŭstaras la postulo pri ĝiaj facileco kaj internacia komprenebleco. Rezulte atingiĝas certa kompromiso, manifestiĝanta, cetere, en multe pli vastaj/malstrikitaj normoj kaj limoj de stiloj, ol en la literaturaj etnaj lingvoj.

Ĉar EP-j estas diaspora lingvo-kultura *sociumo*, en la movado ellaboriĝas certaj *moralaj/aksiologiaj valoroj*. Sekvo de tio estas, interalie, tabuigo de certaj vortoj (ĉefe, ligitaj al homaj intimaĵoj/fiziologiaĵoj) kaj apero de eŭfemismoj. Aliflanke, formiĝas eĉ subĝenroj de maldecaj (sub)literaturaĵoj, kiel ‘*limeriko*’ (formo de ofte iom vulgara, plebeca, obsceneta versaĵo): ‘Fervora junulo el Boston / eterne melkadis la voston. / Junulo, sufiĉe! / Ne mane, sed piĉe / konvenas kolumi la foston!’ (R.Rossetti) (‘vosto’ kaj ‘fosto’ estas uzataj anstataŭ la tabua ‘kaco’), ‘*bervalajo*’ (maldec-vortluda frazo, en kiu oni devas inversigi literojn aŭ silabojn de du vortoj, ekzemple la substrekitaĵen en ‘Ŝi ĉiam puŝas siajn kunludantojn ĉe l’ teniso’).

4.8. Rimedoj por karakterizi literaturan protagoniston lingvaĵe

MK rimarkigas, ke en Eo *ne eblas difini laŭ la parolaj karakterizaĵoj la kulturen nivelon de la literaturaj herooj*. Ĉu vere? Ni traktu, kiel eblas montri E-e malklerecon. Unue, metante en la buŝon de fuŝulo la plej tipajn gramatikajn/prononcajn *erarojn* (internacie: misuzo de la akuzativo, ‘ig-ig’, ‘ul’, ‘an’, ‘ist’ – ekzemple, ‘bulgarano, hungarulo, tajloristo’, – la refleksivoj kiel ‘sia’, ‘si’, intermikso de ‘-a’/‘-e’-vortoj, paronimoj (‘konsili-konsoli’), mislokado de ‘nur’, ‘ankaŭ’, ‘ne’ k.a.; certagente: intermikso ‘l’/‘r’ por ĉinoj kaj japanoj k.s.). Tiuj estas analizitaj en pluraj verkoj. Ekzemple, en ‘Ne tiel, sed tiel ĉi!’ de F.Faulhaber. Ke tiaspecaj eraroj estas konsciaj de la TE-j, povas atesti, ekzemple, la tuj-sekva humura mencio pri ili: sur fotoj, faritaj de K.-D.Albrecht, estas jenaj bildoj kaj subskriboj: 1) bilde – homo strangolas skeleton; titolo – ‘Apliku ĝuste la akuzativon!’ 2) bilde – homo en lito kun tima mieno; titolo – ‘Mi nur timas la akuzativon!’ Apenaŭ ĉi-kreaĵoj elvokus adekvatan, se ian, emocion ĉe neE-istoj.

Aldona eblo priskribi literaturan agulon estas paroligi lin *gramatike korekte, sed plumpe, ne celkonforme, per tre limigita leksiko*. Ekzemple, en la ‘Praktika instrumentado’ de J.Baghy protagonisto *fuŝripetas* ‘p,r,o’ kaj uzas *patosan* esprim-manieron en *banalaj* situacioj: ‘Tiu ĉi prototipa protokolo helpas min en la alproprigo de mia propra propaganda, praktika paroliga metodo. (Ho, kiel bela estas nia lingvo!)’ (en la lasta frazo esprimiĝas, krome, ironio).

Due, por karakterizi ĝenerale nesufiĉan kulturen nivelon oni povas igi sian heroon *misuzi kulture ŝargitajn* vortojn. Ekzemple, en ‘La Spleno de Parizo’ (Ch.Baudelaire) en la frazaro ‘desegni por ŝi kostumon Venjusan’ enestas intenca eraro (devus esti ‘Venusan’, pri kio, cetere, komentas la tradukinto).

5. Konkludoj

Kompreneble, la menciitaj argumentoj favore al la ebleco kaj neceseco de la transdono kaj kreo de kulturo en IPL ne estas kompletaj. Tamen ili ebligas skize montri kelkajn ĉefajn kialojn kaj celojn de ĉi-fenomeno. Ilin konsistigas inter alio: 1) *mondera kontraŭdireco kaj interligiteco* komuna por la tuta homaro; 2) komunaj *psikaj trajtoj* de ajnetna homo; 3) *socia bezono*; 4) *socia moralo*; 5) lingvaj *universalizaĵoj/universalioj* komunaj por ajna viva multfunkcia internacia lingvo sendepende de ĝia origin-kielo; 6) *internaj, strukturaj eblecoj*

de aposteriora E-tipa IPL; 7) internacia kaj suplementa (=aldona al la ĉefa, t.e. denaska, gepatra aŭ plejofte uzata lingvo) karaktero de IPL; 8) ekzisto de integraj elementoj en la homara kulturo (kaj en ties historio, kaj en la moderna epoko); 9) ekzisto de sufiĉe granda kaj daŭre ekzistanta kolektivo (sociumo), uzanta IPL-on (partoprenantoj de la movado por akceptigo de ĉi IPL) kaj iom-post-ioma disvastiĝo de la apliko-sferoj; 10) neceso de unueciga rimedo (kontraŭ disfalo en dialektojn); 11) individua karaktero de kreado (unuavice arta); 12) postuloj de prestiĝeco kaj psikologia strebo al pozitiva memtakso de la EP-j.

Sendiskute, la *E-kulturo estas malpli riĉa* ol tiu de la lingvoj el la t.n. ‘mondlingva klubo’, ĉar tiuj lastaj havas nekompareble pli longan vivhistorion, pli abundan parolantaron, pli vastan regulan aplikseraron, potencan ‘promociiston’ (t.e. ion aŭ iun, kiu helpas al koncerna lingvo/kulturo akiri gvidajn poziciojn en la mondo aŭ regiono, ekzemple, prosperan ekonomion, militan forton ktp.). Respektive *estetikaj/emociaj ebloj de Eo malpli grandas* ol tiuj de etnaj mondlingvoj. Sed ni rajtas kompari Eon nur kun etna lingvo uzata de ĝiaj **nedenaskaj** parolantoj dum *interetna/interkultura komunikado*. Kaj en tia situacio *Eo estas absolute konkurenckapabla!*

Aleksandr Melnikov (Rostov-na-Donu)

KIEL GEEDZIGI SPORTON KAJ ESPERANTON

Ni scias, ke UEA deklaris tri ĉefajn, tri gravegajn celojn de la Movado: DISVASTIGADO, INSTRUADO, UTILIGADO. Ni ne devas pri tio forgesi. Tio estas nia ruĝa (pardonu! VERDA) gvidlinio. Mi memoras, en 1988-1989 H.Tonkin lanĉis la kampanjon DUE: *UNUE, ni vivigis Esperanton.*

LA UNUA JARCENTO de la internacia lingvo portis ĝin de surpapera projekto ĝis plenrajta, vivanta lingvo kun kulturo kaj komunumo.

Nek kulturo, nek lingvo, nek komunumo, tamen, estas jam plene universalaj. Tial Universala Esperanta Asocio komence de la dua jarcento plu laboras por ilia progreso laŭ tri prioritatoj:

disvastigo de Esperanto;

utiligo de Esperanto;

edukado al tutmonda konscio.

Kune, laŭ ĉi tiu programo, ni povos fari la venontan epokon la periodo de la vera tutmondigo de Esperanto. Sed nur per via helpo.

DUE, ni tutmondigu ĝin!

UEA petis siajn membrojn helpi fari la venontan epokon la periodo de la vera TUTMONDIGO de Esperanto. Mi ne scias, ĉu la anoj ne subtenis la kampanjon, ĉu la gvidantoj senentuziasmiĝis. Sed la kampanjo ŝrumpis kaj NUN oni tute forgesis pri ĝi.

Mi timas, ke simila sorto atendas ankaŭ la nunan alvokon “Al la lingva demokratio” kaj la t.n. labor-planon, kiu emfazas la jenajn prioritatojn: informado, instruado, utiligado, plijuniĝo, tutmondigo, profesiigo. Nenio konkreta estas proponata por la plej ĉefa en la plano – UTILIGADO. Utiligado estas ekonomio, kaj – estas konate – ĝuste ekonomio regas la mondon. Jen kion mi proponas por la komenco.

En ordinara vivo ni multan tempon dediĉas al nia laboro, kiu donas al ni vivrimedojn, vestojn, loĝejon ks. Nia laboro foje tute ne kontentigas niajn ambiciojn kaj preferojn. Foje oni devas vojaĝi al iu neagrabla loko por fari laboron monodonan. Post la laboro ni uzas nian tempon por nia pli-malpli agrabla tempopasigo. Uzante Esperanton ni devas labori ankaŭ post la laboro. Ni uzas ĝin idealisme, kiel noblan aferon, ĉe UK-oj, la kluboj, renkontiĝoj, havante ne tre malfacilajn, plejparte distrajn internaciajn rilatojn. Tiuj rilatoj estas

agrablega afero por ni, ĉiuj esperantistoj. Tio estas tradicia praktika uzado de Esperanto.

Mi volas paroli pri aplikado, kiu ne estas tiom agrabla – necesos fari tion, kion ne ŝatas fari esperantistoj. Foje iuj el ili ne estas kapablaj por tio, ne estas preparitaj. Ĝuste ili kutime trovas ĉiujn pretekstojn por eĉ ne paroli pri la VERE praktika utiligado de Esperanto en la EKSTERA MONDO. Se ni uzos Esperanton praktike, eble tio estos ne tre agrabla laboro, iom “malpura” laboro. Sed unu homo diris “nigra laboro donas blankan panon”.

Mi volas refoje veni al la temo “Sporto kaj Esperanto”. Havu paciencon kaj indulgon. Antaŭ ol fari ion ni devas longe paroli, interparoli pri tio por konvinki nin mem, unu la alian (ne nur vi min sed ankaŭ inverse).

Al mi skribis Trevor Steele (la nova Ĝenerala Direktoro de UEA): “Fakte la celoj kaj la pretendoj de nia movado multege superas niajn rimedojn kaj laborfortojn.” La rusa militestro Suvorov diris antaŭ ducent jaroj: “Oni devas batali ne per nombro, sed per scipovo, do, per la saĝo, per la kapo.” Mi citas la saman Trevor Steele: “Ni celas revolucii la lingvopolitikon de la mondo, kaj ni estas manpleno da homoj superŝutataj de taskoj, kiujn ni ne povas kontentige ĉiujn plenumi.”

Refoje mi diras alian maksimon: “Oni devas fari malmulton, sed bone.” Do, ni faru iun malgrandan, sed rimarkeblan aferon tute bone, aŭ almenaŭ kontentige.

Ĉiĉaĵo el Trevor: “Se ni vivus en saĝa mondo, UN transprenus la movadon kaj establis en ĉiu lando deko(j)n da oficejoj kun alte pagataj kaj spertaj oficistoj/instruistoj/publicistoj – nu, revo...”

Ni vivas en nia mondo. Ni ne povas ŝanĝi ĝin. Kiaj estas ni, tia estas la mondo. Niaj revoj povas realiĝi dum nia vivo. Eble UN, Unesko k.a. neniam atentis nin, la Movadon. Ni ankoraŭ per nenio pruvis taŭgecon de nia lingvo. Ni ne povas konvinki iun per nia bela neŭtraleco kaj postulado de la lingvaj rajtoj. Nun la sola pruvo de kapableco de la Lingvo Internacia estas niaj UK-oj, renkontiĝoj, neremarkataj de la mondo, ĉar tio fakte estas turismaĵoj kaj ripozejoj. Mi treege volas, ke oni komprenu nin, utilecon de nia lingvo. Sed el la teorio kaj la gramatiko oni ne povas pruvi al UN neceson establi la oficejojn. Nun (kaj ĉiam) oni donas monon ĝuste antaŭsciante la profiton, la rezulton de la financota afero. Krom ĉio niaj Asocioj, societoj, kluboj estas fermitaj por la ekstera mondo, fermitaj lingve – oni ne povas scii niajn sukcesojn, strebojn kaj klopodojn. Iu al mi skribis: “Malmultaj esperantistoj interesiĝas pri sporto kaj oni ial opinias, ke sportistojn ne interesas la problemo de interkompreno dum internaciaj sportaj konkuroj.” (Tion ankoraŭ neniu pruvis. Oni ne enketis pri tio.) “Saĝuloj” opinias, ke “la sportistojn interesas nur la medaloj, poentoj, venkoj. Ili veturas internacie, sed vere nur de hotelo al hotelo, de stadiono al stadiono. Ili eĉ ne havas senperajn kontaktojn kun la publiko, almenaŭ tre rare. Kvankam sur la stadionoj estas multaj homoj, la sportistoj estas soluloj [en solulaj sportoj] aŭ nur en strikta grupo. Ilia tago estas ekzercoj, stadiono, stadiono, ekzercoj ktp., ĉiam la samo... La sportistoj mem estas alienigitaj, separatitaj de la normala vivo.” La saĝuloj pravas kaj malpravas. Fakte la sportistoj estas normalaj homoj. Por ili la sporto estas ilia laboro kaj ili rilatas al ĝi adekvate. Inter ĉiuj homtavoloj estas honestuloj kaj malhonestuloj, kun vasta menshorizonto kaj kun la malvasta. Multaj normalaj homoj – laboristoj, intelektuloj, kamparanoj, artistoj k.a. – normale vivas kaj ne havas internaciajn rilatojn. Neniu ilin kulpigas, ke ili faras “ĉiam la samon”. Ankaŭ inter sportistoj estas intelektuloj aŭ, almenaŭ, pensantaj normale kiel vi kaj mi. Mi kontaktis diversajn sportistojn dum mia vivo. Mi ripetis, ili devas kaj volas interparoli kun siaj alilingvaj sportaj kolegoj. Ne nur futbalistoj kun futbalistoj, sed iam futbalisto kun gimnastikistino... Ili nun uzas por tio gestojn, “muĝadon” aŭ iun kripligitan fremdan (anglan) lingvon. La sportistoj tute hazarde trafis la internacian vivon. Ili ne preparis sin lingve kaj ne studis anticipe la anglan – tion faris multaj profesiuloj, kiuj planis sian internacian agadon. La sportistoj restis “surdmuta” tavolo en la internaciaj rilatoj. La sportistoj bezonegas inter-

nacian lingvon, ili devas havi ĝin kaj multe pagos por havi ĝin. Pagos al tiu, kiu havigos ĝin al ili. UEA devas labori kaj ricevi tiun pagon, se sukcesos bone labori, postuli kaj preni tiun pagon.

Ni devas rilati al ili kiel al normalaj homoj. Ni devas trovi saĝajn kapojn, kiuj verku bone argumentitan leteron, alvokon al ĉiuj sportistoj, konvinki ilin, ke Esperanto povas esti ilia lingvo. Ni devas montri al ili, kiel bone ili fartos kaj interagos, kiam ili havos komunan lingvon. Ni devas uzi la tutan nian retorikan arton. Poste ni traduku tiun ĉi leteron nacilingven kaj komisiu al koncernatoj liveri la leteron kaj (arde) proponi la lingvon al la sportistoj. La leterojn ni povas porti aŭ sendi al sportaj komitatoj, kluboj kaj similaj sportaj organizaĵoj. Ankaŭ al la sportaj gazetoj. Ni devas proponi niajn servojn en instruado, tradukado, interpretado dum la sportaj konkuroj. Ni devas trovi inter ni homojn, kiuj povas, volas kaj havas tempon por tion fari. Ni devas serĉi tiajn homojn, organizante niajn E-kursojn tra la mondo. Ne ĉiuj “kuraĝas” iri, do eblas nur dissendi, dissendadi ĝin...

Antaŭ ĉ. dudeko da jaroj al mi venis letero el Germanio. Iu esperantisto proponis ĝemeliĝi sportan klubon de saltistoj de Germanio kun la simila en Uzbekio. Mi vizitis la Sportan komitaton de la respubliko kaj serioze parolis kun la estraro pri la korespondado, ebla reciproka vizitado, pri Esperanto, instruado k.s. Mi estis favore aŭskultita, mi sendis konsenton al Germanio... Sed pasis tempo, la respondo el Germanio ne venis. Ial la germanoj eksilentis. Eble niaj leteroj perdiĝadis. La tempo estis nefavora, estis Breĵnev-stagnado. La internaciaj rilatoj de simplaj popoloj ne estis favorataj. Sed estis bone, ke en la Sporta Komitato neniuj rifuzis al mi kaj al miaj proponoj.

Ni povas mondscale rekomenci la kampanjon SPORTO KAJ ESPERANTO. Ni devas trovi la libron, eldonitan en sesdekaj jaroj en Hungario pri sporto kaj sportaj terminoj. Ni devas reeldoni ĝin. Ni devas kompili taŭgan lernolibron, uzeblan de normalaj homoj. Inter ni, esperantistoj, estas multaj “nerdoj” (angle kaj moke: okulvitraj saĝuloj kun maldika kolo), kiuj ellernis la lingvon el nura gramatiko kaj vortaro aŭ maldiketa lernolibreto. Ni devas kompili E-lernolibron por malnerdoj – ŝajne mi povus komenci tiun laboron. Kaj mi jam havas la bazon. Mi povas verki tiun libron.

Ni ne devas foriri de mia propono dirante “tio estas ne tiom simpla, kiom vi imagas”. Mi scias, ke tio estas ege komplika kaj tempoperda (eble sen tuja rezulto, eble kun postkelkajara rezulteto). Mi scias, ke estas malfacile aranĝi ĉion ĉi. Mi scias kaj vi scias. Sed necesas, diablo prenu ĉion, necesas ja iam komenci! Necesas paroli pri tio. Ni komencu paroli pri tio inter ni, dum ret-diskutoj, dum UK-oj, aliaj renkontiĝoj, en nia gazetaro. Ni, kelkaj iniciatin-toj kaj interesitoj, devas iel unuigi, ni devas daŭre paroli, plani la laboron, labori ĉi direkte, eĉ se neniuj esperantistoj tuj reeĥos niajn alvokojn. Ni daŭre parolu kaj feliĉegu, se troviĝos unu-du-tri landoj, kie pretos labori ĉe la sporta kampo almenaŭ po 1-2 sindonemuloj. Ni subtenu ilin, ni laŭdegu ilin, premii per iu pokalo aŭ io simila. Nur tiam, kiam ni faros iun venketon ĉe sporto, ni povos fiera diri, ke Esperanto funkcias internacie kaj ekstermovade. Ni havos precedencon.

Nuntempe ni havas tian precedencon preskaŭ nenie. Ĉio, pri kio ni nun fanfaronas, estas plej ofte blufo aŭ malvero. Trevor Steele diris la vortojn (miajn, ĉu ankaŭ la viajn?): “Ni devas fari tion, kio eblas. Eĉ sciante, ke ni certe ne atingos la celon, povantan kontentigi ĉiujn.”

VIVU ESPERANTO! VIVU LA IDEOJ DE ZAMENHOF! VIVU NI, SAMIDEANOJ!!!

Eŭg. Serg. Perevertajlo (Uzbekio)

P.S. La aŭtoro petas aperigi tiun ĉi artikolon en aliaj naciaj kaj internaciaj E-gazetoj. Vi rajas traduki ĝin nacilingven kaj aperigi ie ajn.

Bulteno de REU

(R)ESTU MEMBRO DE LA E-KOMUNUMO!

Mesaĝo de la Prezidanto de UEA

Mi volas rediri al vi, kial indas esti kaj resti membro de la Esperanto-komunumo. La samon pli-malpli mi jam diris pasintjare, kaj mi restas nun samopinianta. Esence al la ĉiama demando: “Kial finfine mi devus aliĝi al la loka Esperanto-klubo, al la nacia landa asocio, al la asocio de mia fako aŭ hobia, al Universala Esperanto-Asocio?” mi kutimas respondi, ke ekzistas almenaŭ du kialoj:

1) La Esperanto-asocioj je ĉiuj niveloj laboras por pli bona mondo, por mondo sen lingva kaj kultura diskriminacio; mallonge dirite, ili laboras por lingva demokratio. Se vi opinias, ke tiu estas bona celo, vi certe volas subteni ilin. Aliĝante al via loka klubo aŭ al monda, nacia aŭ faka asocio (eventuale eĉ al ĉiuj tiuj), vi estos parto de tiu tutmonda Esperanto-movado, kiu de pli ol unu jarcento laboras por homaj lingvaj rajtoj je ĉiuj niveloj, kaj kiu provas konvinki la mondon, ke ankaŭ en la lingva-kultura kampo justeco valoras pli ol forto.

2) Samtempe vi eble ŝatas simple esti parto de la komunumo, kiu parolas la internacian lingvon Esperanto. Vi eble ŝatas renkonti aliajn parolantojn de Esperanto, vi ŝatas aĉeti librojn en Esperanto, vi ŝatas vojaĝi al fremdaj landoj, koni ties loĝantojn kaj eventuale eĉ esti gastigata de lokaj esperantistoj. Ĉion ĉi la membroj de Esperanto-asocioj faras des pli nature, estante daŭre informataj per siaj asociaj ligoj pri la revuoj, la libroj, la kongresoj, la retlistoj kaj la retpaĝoj, la korespond-anoncoj kaj la vojaĝ-ebloj je sia dispono. Kaj se vi apartenas al la komunumo de tiuj, kiuj normale ŝaltas sian komputilon antaŭ la matenmanĝo, vi trovos (aŭ jam trovis), ke esperantistoj ĉeestas pli kaj pli en la tutmonda reto kaj serĉas kontaktojn kun similaj esperantistoj. La avantaĝoj de asocia membreco estas similaj ankaŭ ĉi-kaze. Ekzistas diversaj diskutgrupoj por UEA-membroj, ekzemple, kaj nuntempe ankaŭ eksperimenta eblo ricevi la revuon Esperanto per Interreto en komputila formato.

Do estas grave, ke vi klopodu aliĝi al Esperanto-organizaĵoj je ĉiuj niveloj (loka, landa, faka aŭ internacia). Ni kompreneble invitas vin aliĝi aŭ re-aliĝi al UEA, sed ankaŭ se vi aliĝas nur al faka asocio aŭ al via loka klubo, tio jam estas io bona; kaj se vi aliĝas ankaŭ al via landa asocio, tio estas io ankoraŭ pli bona, ktp.

UEA pretas ĉiukaze sendi al aranĝantoj de naciaj aŭ lokaj renkontiĝoj stokon da revuoj de UEA de la pasinta jaro kune kun cirkuleroj por disdonado al la partoprenantoj – oni devas tiurilate nur peti la Centran Oficejon. La celo de nia kampanjo estas “vastigi la komunumon”, tio estas vastigi la nombron de organizitaj kaj interligitaj esperantistoj je ĉiu nivelo. Nia ĉefa celo estas ke la membroj de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj pliiĝu kaj estu en kontakto inter si. Oni vastigas la komunumon ĉefe per informado pri Esperanto kaj instruado de Esperanto, sed ankaŭ tio estas senefika en la longa daŭro, se la parolantoj de Esperanto ne poste iel restas kune.

Ni restas je via dispono por kunlabori kun vi pri tiu ĉi celo.

Renato Corsetti (Italio)

KIAL ONI KABEAS?

Fama Kabe (Kazimierz Bein), tradukinta klasikaĵojn el la pola kaj rusa literaturo, “kreinto de la vera Esparanta stilo”, al kiu tiamaj poetoj dediĉis siajn verkojn, subite en 1911 for-

lasis ne nur siajn fekundajn literaturajn okupojn, sed ankaŭ E-on entute... De tiu tempo tias-pecajn kazojn (kiam iu tre aktiva esperantisto forlasas E-komunumon), ricevis la nomon “kabei”. Laŭ aserto de certaj teoriuloj de la movado, E-kulturo ĝis nun havas nur du tute proprajn nociojn: “kabei” kaj “krokodili”. Cetere, ambaŭ estas la ĉefaj plagoj de nia movado. Sed, se pri krokodilado kaj batalo kontraŭ ĝi oni diskutas tre multe (ankaŭ sur la paĝoj de REGo), pri kabeado regas silento.

Por lanĉi la diskuton pri tiu tre damaĝanta nian komunumon fenomeno, dum RET-02 estis organizita speciala ronda tablo, kiun partoprenis 18 personoj. Nemalmulte, kio montras, ke la problemo reale maltrankviligas la homojn... Verŝajne, nenion novan dum tiu diskuto ni malkovris, sed, almenaŭ kolektis tion, kion oni ĝenerale opinias tiurilate. Do, jen la listo de la kaŭzoj por kabeo, kompilita tiutage.

1. Seniluziiĝo pri la ideo de Esperanto.
2. Seniluziiĝo pri la realigebleco de la ideo de Esperanto.
3. Seniluziiĝo pri samideanoj (ilia lingva nivelo, aŭ ilia morala nivelo, ks.).
4. Ŝanĝoj de la propra opinio rilate al Esperanto (ĝia ideo, kultura valoro, lingvistikaj karakterizoj ktp.), simpla satoriĝo pri la agado kaj ĉeso de intereso al ĝi.
5. Familiaj kialoj, unuavice laŭ la skemo “edzino – fino”, aŭ “miaŭo” (la neesperantista vir[in]o diras al la edz[in]o: “mi aŭ E-o – elektu!”), ks.
6. Konflikto kun la lokaj (en la loka klubo) samideanoj, ekster kies rondo aktiva agado ŝajnas esti sensenca; ankaŭ disfalo de la loka klubo (grupo) – la kaŭzo ege gravas kaze de tre societemaj personoj.
7. Ŝanĝiĝo de valoraj prioritatoj, ofte depende de aĝaj periodoj – ekz., se por junulo esperantumado povas esti tre grava, por pli aĝa persono batalo por la laborposteno aŭ familiaj okupoj “ne lasas tempon” por priesperantaj okupoj.
8. Ekzistas kaŭzoj, kiam la ĉefoj en vertaj laborlokoj simple malpermesas okupiĝi pri E-o sub minaco de maldungo, aŭ moko de proksimuloj, malestimantaj E-on, fariĝas tro premaj.
9. Manko de mono: se por junulo petveturado povas esti facila, por pliaĝulo estas bezonataj relative grandaj monrimedoj por partopreni E-aranĝojn, speciale internaciajn (sen kio pluraj esperantistoj ne vidas la sencon esperantumi).

Por ĉiu el la supraj punktoj eblas doni ekzemplojn, ilustrati ilin per konduto de konataj personoj – sed ni dume ne faru tion (laŭdezire ĉiu povas rememori tiujn, kiujn li/ŝi mem konas/is).

Ĝenerale, averaĝa daŭro de aktiva vivo en Esperantio estas limigita je kelkaj jaroj, nur malmultaj pasigas en tiu “neekzistanta” lando la tutan vivon post la esperantiĝo... Kion fari por plilongigi tiun periodon? Ankaŭ okazas, ke iama aktivulo revenas al la agado post multjara paŭzo! Kion fari por stimuli tiajn revenojn? Ĉu ĝenerale eblas ion fari? Al mi ŝajnas, ke diskuto pri tiu ĉi temo povas esti utila, kaj preventado de kabeado (almenaŭ laŭ parto de ĝiaj kaŭzoj) povas fariĝi unu el gravaj taskoj de la asocia laboro.

Nikolao Gudskov (Moskvo)

NOVA RETA SERVO DE UEA

La kvarlitera UEA-kodo ekde nun estas pli ol datumbaza indiko. Dank’ al Joost Witteveen, la prizorganto de la oficejaj komputiloj, ĝi akiris plian funkcion – la retadresan.

Ĉiu individua membro de UEA, kies retadreson la CO posedas, ricevis personan adreson en la domajno <uea.org>, komenciĝantan per la kvarlitera UEA-kodo. Do, ekzemple ĉar la prezidanto de UEA Renato Corsetti havas la kodon ‘retk-v’, li ricevis personan adreson <retk@uea.org>.

La adreso estas nur plusenda, oni ne ricevas propran poŝtkeston en la servilo de UEA,

ajna poŝto veninta al ĝi simple redirektiĝas al la baza retadreso de la UEA-membro, sciata de la CO-datumbazo.

Tre gravas noti, ke la poŝto venanta al la personaj uea-retadresoj, estas kontrolata pri Esperanteco! Ne-E-aj leteroj ne estas plusendataj. La filtrado okazas surbaze de relative simpla kontrolo: se en la letero estas almenaŭ unu el kvin jenaj “magiaj” vortoj – Esperanto, saluton, estas, dankon, bonvolu – ĝi estas plusendata. Alikaze al la sendinto venas afabla E-lingva aŭtomata respondo (i.a. meze de la teksto mencianta la “magiajn vortojn”), ke ne-Esperantaj leteroj ne estas plusendataj.

Tamen, se la filtrado ne plaĉas, oni rajtas ĝin forŝalti. Peti pri tio vi povas, sendante mesaĝon al la sekretario de la CO Atie van Zeist <sekretario@co.uea.org>. Al la sama adreso vi estas petataj anonci, se via baza retadreso ŝanĝiĝis.

UEA petas zorgeme uzi la servon – ne uzi ĝin por amasaj sendadoj al esperantistoj, ne plusendi per ĝi grandegajn dosierojn.

La celo de la servo estas plifaciligi kontaktojn inter UEA-membroj kaj amikan kunlaboron. Ĝi estis kreita kadre de laboroj pri plia enretigo de UEA-agado kaj ĝiaj servoj.

(Gazetaraj komunikoj de UEA)

EL LA KONGRESA KOMUNIKO PRI UK EN GOTENBRUGO

Tre bela kaj informplena kolora broŝuro kun detala urbomapo, kun multaj utilaj detaloj, estas dissendita al ĉiuj individuaj membroj de UEA, kongresaj perantoj kaj al la landaj asocioj. Centra Oficejo de UEA sendos ĝin volonte kaj senpage ankaŭ al via grupo aŭ loka klubo, tuj post la akcepto de via peto. Se vi organizas iun E-aranĝon la Unua Bulteno estas la plej taŭga enmetaĵo en la dokumentujon de via aranĝo: bv. tiam peti pli grandajn kvantojn.

Jam estas produktita bela afiŝo (formato A1) de la UK-2003 en Gotenburgo. Ĝi estas havebla ĉe la Centra Oficejo kontraŭ pago de sendokostoj (3 EUR).

La kongresa glumarko estas ideala surgluaĵo por viaj kovertoj, dum tiu ĉi gotenburga jaro. Ĝi estas mendebla ĉe la Libroservo de UEA (1 folio kun 12 markoj) kontraŭ 1,2 EUR (plus la sendokostoj).

(Gazetaraj komunikoj de UEA)

INFORMO DE ĈALK

Dum RET-02 en Kovrov okazis ekzamenoj de ĈALK (Ĉefa Atesta kaj Lingva Komisiono de REU). Laŭ la elementa nivelo (“A”) ekzameniĝis Irina Zajceva (Vladimir) kun la noto “bone”. Laŭ la nivelo “B” (instruajtaĵa por elementnivelaĵoj) ekzameniĝis: Oleg Dadaev (Moskvo) – “perfekte”, Igorj Fejgin (Samara) – “perfekte”, Vadim Solovjov (Vladimir) – “bone”, Dmitrij Vronskij (Volograd) – “perfekte”. Ĉiuj ekzamenitoj ricevis koncernajn diplomojn. Gratulojn! Ĉiunivelaĵoj okazos decembre dum REK en Moskvo; ajna persono povas peti de ĈALK kolekti ekzamenan komisionon en oportunaj tempo kaj loko.

ESPERANTISTOJ EN “MIA FAMILIO”

La 28-an de septembro en la televida elsendo “Mia familio” (“Моя семья”), kiun regule emisias la kanalo “Rossija”, sonis Esperanto. Juna homo (prezentita kiel Anton Mirnij el Vologda, sed ege simila aspekte kaj voĉe al nia Oĉjo Dadaev) rakontis nialingve, ke li falis de la lito, forte kontuzis la kapon kaj pro tio perdis la kapablon paroli en ĉiuj lingvoj, krom la laste lernita. La ĉagrenita edzino de la junulo plendis, ke ne povas kompreni liajn dirojn, kvankam li plu normale komprenas la rusan. Tuj en la halo evidentiĝis “piano en arbustoj”: junulino el la publiko (tre simila al Maŝa Terjoĥina, kaj ĉar oni ne prezentis ŝin, ni rajtas su-

pozi ke estis Maŝa mem) klarigis, ke la nekomprenebla lingvo estas Esperanto – la internacia lingvo, parolata de milionoj. Kaj ŝi interpretis la ĵusajn kaj ĉiujn postajn vortojn de Oĉjo (pardonu – Anton). La publiko ne montris intereson al la lingvo mem, sed nur prisuĉis la situacion: ĉu la unudirekta komunikado estas pli avantaĝa por la edzo aŭ por la edzino, kion konsili al ili ks.

La tuta epizodo, konjekteble rolludita, aspektis sufiĉe malsprite. Des pli malsprita estis la klopodoj de la elsendo-vidanto V.Komissarov montri intereson kaj ŝerci pri Esperanto: jen li reage al la frazo “Mi amas vin” entuziasmiĝis: “Ho, *vin* – tion mi ja komprenas!”, jen al povra heroo de alia epizodo li konsilis: “Al vi restas nur fali de la lito kaj ekparoli en Esperanto”, jen li provis imiti E-vortojn, sed rezultis io simila al “muĉaĉos”...

Ĉu estas bone, ke Esperanto aperis en tia evidente porfilistra elsendo? Opinioj pri tio, se juĝi laŭ freŝaj impres-interŝanĝoj inter kolegoj, diversas.

Kompreneble, por ni estis agrable aŭdi la karan lingvon el la televida ekrano. Sed multe pli gravas, ke tre multaj homoj aŭ unuafoje eksciis pri la ekzisto de Esperanto, aŭ eventuale plifavorigis (certe, tiomgrade, kiom ebligis la elsendo) siajn primitivajn imagojn pri ĝi: ke la lingvo estas ne mortnaskita kabineta elpensajo de lingvistoj, sed reale parolata kaj belsona, ke ĝin uzas ne ovokraniaj stranguloj, sed modernaj, simpatiaj gejunuloj.

Tamen skeptikuloj rimarkas, ke apero en tia neserioza kunteksto stultigas Esperanton kaj esperantistojn, kaj dubas, ke post la elsendo povus aperi pliaj interesiĝantoj pri Esperanto. Ili argumentas, ke konstantaj spektantoj kaj ŝatantoj de tiu elsendo estas precipe hejm-mastrinoj kaj aliaj homoj de malalta kultur-intelektala nivelo; kun la spirita horizonto de tiaj etmensuloj Esperanto ne kongruas, do pri interesiĝantoj inter ili ni eĉ ne esperu. Al tio oni povas oponi, ke ajnan elsendon spektas ne nur ties adorantoj, sed ankaŭ tute hazardaj homoj: iu gastas ĉe la bopatrino kaj kontraŭvole kunspektas, alia troviĝas en flughavena aŭ frizsalona atendejo kun televidilo agordita laŭ gusto de la administracio, tria kuŝas sur hospitala lito kaj spektas laŭ elekto de plimulto de la samĉambranoj, kvara revenis post plurjara restado eksterlande kaj por li la elsendo estas tute nova, ks. La procentaĵo de tiaj okazaj vidintoj de la preparolata elsendo povas esti tre malgranda, eĉ ekz. 0,1%, sed se kalkuli ĝin laŭ la amasega aŭditorio (supozeble kelkaj milionoj aŭ eĉ miliondekoj), ni ricevos plurajn milojn – tio kompareblas kun eldonkvanto de distrikta gazeto aŭ kapacito de granda koncerta halo. Kaj inter tiuj miloj estas ja homoj tre diversaj – kaj senespere stultaj, kaj ne tute stultaj, kaj tute ne stultaj...

Certe, se en elsendo kun tiu nomo oni serioze traktus problemojn de la nunaj familioj, se tie aperadus kompetentaj sociologoj, demografoj, psikologoj ks, tiam esperantistoj ja povus vere interese kontribui – ekz. rakontante pri la rolo de Esperanto en internaciaj E-familioj ĉe pridiskuto de eventuala temo “Interretnaĝe gedziĝoj”. Sed tiuj “se” de ni ne dependas. Dume oni pretas publike prezenti Esperanton ne tiom ofte, ke ni povus elekti. Do esperantistoj venu ĉien, kie oni deziras vidi ilin. Uzindas ajna ŝanco – de Unesko ĝis burlesko.

Viktor Aroloviĉ (Moskvo)

ESPERANTO APLIKATA

“La internacia lingvo Esperanto estas taŭga en ĉiuj sferoj de la homa vivo same kiel iu ajn nacia lingvo” – asertas ni, rakontante al novuloj pri Esperanto dum varba vespero aŭ al konato ekinteresiĝinta pri la lingvo. Sed kie ni uzas ordinare la lingvon? Vespere dum kluba

Joĉjo de Bervalo vizitis la grandurbon. Subite li estis atakita de du fortikaj rabistoj. Joĉjo batalis kiel tigro, sed finfine estis venkita. Tiam liaj atakantoj forprenis ĉion el liaj poŝoj.

– Ĉu vi vere tiel feroce batalis nur por konservi 57 cendojn? – nekredeme demandis unu el la malbuloj.

– Ho, ĉu nur tiom vi volis? – ĝemis Joĉjo. – Mi supozis, ke vi volis ŝteli la 400 dolarojn el mia boteto!

(esperanto-anekdotoj)

kunveno, dum libertempo legante E-libron aŭ revuon, dum ferio vojaĝante al E-renkontiĝo. Nia vivo kvazaŭ dividiĝas al du partoj: esperantista kaj neesperantista. Dum la unua ni ĝuas la lingvon, renkontojn kun amikoj-esperantistoj kaj tute ne rememoras pri niaj ĉiutagaj laboraj aŭ studaj problemoj, familiaj aferoj; kaj male – dum labortempo aŭ studado en universitato ni ne rememoras pri Esperanto. Ĉe pluraj jam enradikiĝis opinio, ke tiuj du partoj de nia vivo ne kunigeblas. Malofte ni interesiĝas pri eksteresperantaj okupoj de niaj konatoj-esperantistoj, kvankam konas ilin dum pluraj jaroj; kaj inverse – solvante oficajn problemojn, serĉante partnerojn kaj kolegojn, ni malofte pensas pri kolegoj-esperantistoj. Tio okazas ankaŭ ĉar ni simple ne konas niajn kolegojn inter esperantistoj.

Enkadre de la projekto “Esperanto-Servocentro” estas kompilata listo de firmaoj Esperante parolantaj. Tio estas firmaoj, organizaĵoj, institucioj, kie almenaŭ unu laboranto volas kaj povas praktike uzi Esperanton por interesoj de la firmao, kie li laboras. Ĉu vi konsentus enlistigi vian firmaon? Se, jes, do plenigu la formularon, kiu troviĝas en <www.comail.ru/~esperanto/servocentro> (en la esperantlingva parto elektu “Listo de firmaoj esperante parolantaj”). Aŭ sendu rete aŭ poŝte mallongan informon pri vi kaj via firmao al adreso de la centro: <esperanto@email.ru>, *Эсперанто-Сервисцентр, Украинский бул. 15, 4 эт., к.8, 121059 Москва.*

Mikaelo Ĉertilov (Odincovo)

NOVSTILA JARLIBRO – ĈU LASTA MALFRUO?



Aperis kaj estas dissendita al la membroj la Jarlibro de UEA por 2002. Ĉi-jare ĝi ŝanĝis la multjaran aspekton kaj anstataŭ abstrakta fono sur la kovrilo ŝvebas aerbalono kun surskribo “Esperanto”.

La enhavo de la baza movada manlibro restas fidele al la plurjardekaĵa tradicioj – informoj pri la Asocio, pri Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA, pri TEJO... Kaj, certe, la Delegita Reto, en kiu ĉi-jare oni trovos 1934 delegitojn el 95 landoj.

La okuloj de la multjaraj uzintoj de JL tuj kaptos aron da novaĵoj ankaŭ en la prezento de la enhavo. Ŝanĝiĝis la litertipo, alimaniere estas prezentitaj la telefonkodoj – sed ĉefe la retadresoj. “Ne estas la mia!” – jen la unuaj reagoj de pluraj. Ja anstataŭ iliaj kutimaj retadresoj estas indikitaj plusendaj adresoj <kodo@uea.org>. Tiuj adresoj, kies la unua parto kreiĝas el la UEA-kodo de la membro, redirektas la senditan al ĝi poŝton al la aktuala retadreso, registrita en la datumbazoj de UEA. La CO esperas, ke la redirektaj retadresoj estos pli oportunaj kaj longvivaj ol sufiĉe efemeraj oficaj aŭ hejmaj retadresoj, pluraj el kiuj malvalidiĝas baldaŭ post la publikigo de la nova Jarlibro – jen pro ŝanĝo de retprovizanto, jen pro tro granda kvanto da spamo, jen pro misfunkcioj de la antaŭa poŝtservilo, jen pro multaj aliaj kialoj.

Bedaŭrinde, la libro aperis kelkajn monatojn pli malfrue ol estis esperite. La Ĝenerala Direktoro de UEA Trevor Steele klarigis la kaŭzojn tiel: “Pro la ŝanĝiĝo de oficejoj la Jarlibro eĉ ne havis fiksitan redaktanton ĝis aprilo. Alia problemoj estis, ke informoj senditaj al an-

taŭaj oficistoj de landaj asocioj ne ĉiam estis facile troveblaj, kaj ni devis en kelkaj kazoj ripeti petojn pri adresoj, estraroj ktp. Ne ĉiu landa asocio respondis tiel rapide, kiel ni esperis. Sed la plej grava kaŭzo de la prokrasto estis la bezono modernigi la datumbazon, kies reformado okupis pli da tempo ol estis planite. Ĉi-jare ni faris serion da mispaŝoj, kiel ofte okazas al novuloj. Tamen ni lernis de tiuj spertoj, kaj venontjare la Jarlibro venos al siaj legantoj multe pli frue. Cetere, la konvertado de la datumbazo montriĝos ege utila en nia estonta agado, ne nur por pretigo de la Jarlibro. Ni baldaŭ anoncos gravajn ŝanĝojn de la financa servo”.

La estraro de UEA kaj la Centra Oficejo estas vere ĉagrenitaj pro la okazinta malfruo kaj petas pardonon kaj komprenemon pri tio al la membroj. Ni penos fari, ke tiu malfruo estu la lasta dum la proksimaj jaroj.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

KOREKTO PRI LA MEMBROSTATISTIKO

La CO informas, ke la statistiko de UEA pri la asociaj membroj, anoncita en julio ne estis ĝusta. Aŭ pli konkrete: ĝi ne estis ĝusta vidpunkte de la tradicia metodo kalkuli la asociajn membrojn. Laŭ tiu metodo oni kalkulas la asociajn membrojn ne en tiu jaro por kiu la landaj asocioj pagis, sed en tiu dum kiu venis la mono. Laŭ la tradicia kalkulmetodo la tuta membraro en 2001 devus esti 19263, sed ne la anoncitaj 21317.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

NOVAJ REU-KOTIZINTOJ POR 2002

ALIĜINTAJ KOLEKTIVOJ

Samara E-klubo (+4 novaj membroj: *Tatjana Gorbunova, Oleg Kukoba, Emilija Purigina, Anatolij Radaĵev*)

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Roman Bolŝakov (Moskvo), Jevgenij Delcov (Irkutsk), Abdurahman Junusov (Maĥaĉkala), Tatjana Koljaeva (Novokuzneck), Jurij Matusov (Sankt-Peterburg), Eduard Miĥajlov (Ĉita), Taisija Ŝelkova (Talica, Sverdlovska reg.), Vera Zlotnikova (Moskvo)

REU-kotizoj por la jaro 2002:

100 rub. (por eksterrusianoj – 15 eŭroj) – individua kotizo (inkluzivas la membrokarton, REGon kaj aliajn informojn, voĉdonrajton en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj);

2500 rub. (por eksterrusianoj – 375 eŭroj) – dumviva kotizo (ĉio la sama dum la tuta vivo);

20 rub. – familia kotizo (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco);

100 rub. + 20 rub. por ĉiu membro – kolektiva kotizo (REGo kaj aliaj informoj de REU por la klubo, la membrokartoj kaj voĉdonrajtoj en REU-Konferenco por la klubanoj).

*La rublaj kotizoj sendendas al **G.Kokolija** (la adreso estas en la lasta kovrilpaĝo), la eŭra kotizo pagendas al la konto **reu-a-p** ĉe UEA.*

ATENTIGO: *REU-kotizoj por 2003 estos publikigitaj decembre en sekva numero de REGo. Bonvolu antaŭ tio ne sendi viajn kotizojn, ĉar ili iom ŝanĝiĝos.*

REJM-info

redaktas Sonjo Ŝejnina, Vitalij Malenko

Saluton, karaj legantoj! Ĝoja novaĵo aperis en la redakcio de REJM-info: aperis dua redaktoro – Sonjo Ŝejnina. Espereble nun la artikoloj estos pli abundaj, nepre pli profesiaj kaj certe pli interesaj. En ĉi numero multe da loko okupos impresoj pri la pasinta OkSEJT-42. Kaj certe vi ne evitos informon pri REJM-a agado. Do:

La 42-a Okcidenta Somera Esperantista Junulara Tendaro (OkSEJT-42) okazis de la 28-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto en Niĵnij-Novgoroda regiono. La tendaron kunorganizis REJM kaj Niĵnij-Novgoroda Esperanto-klubo “Ĉapelo”. En la tendaro partoprenis 94 geesperantistoj el Ukrainio, Francio, Nederlando kaj 27 urboj de Rusio.

Sed prefere la partoprenintoj mem rakontu pri siaj impresoj!

Ĉe Vetluga

Ĉi-jara OkSEJT estis anoncita kiel nekutima, originala kaj elstara. Kaj la anoncoj evidentiĝis vero, OkSEJT-42 tute malsimilas ĉiujn aliajn OkSEJT-ojn, kiujn memoris la partoprenantoj. Ĝi estas jam nova OkSEJT. Eble laŭ ĝi disvolviĝos la koncepto pri SEJT-oj en nia lando estonte.

La tendaro komenciĝis la 28-an de julio kaj daŭris tute tradician dektagan periodon (la tagoj mem tute ne estis tradiciaj). Estis elektita bonega loko: arbareto ĉe la rivero Vetluga. La tendaro estis vera tendaro en tiu senco, ke la tendarejo aspektis ĝuste kiel aro de tendoj, sed ne moderna ripozejo kun televidiloj (kiel ofte okazis en la antaŭaj jaroj). Tamen apud la tendaro situis ripozejo (ĝi nomiĝis “Kristall”, se tio povas iun interesi) – kaj sekve estis eblo preni tie trinkeblan akvon, uzi duŝejon kaj aliajn “necesaĵojn” kaj eĉ loĝi en brikaĵ domoj. La simbiozo sukcesis.

Ĉiuj programeroj (krom kelkaj grandaj koncertoj) pasis ekster ajnaj konstruaĵoj, “en la freŝa aero”, inter trunkoj de pinoj kaj betuloj, ĉe frambarbustoj. Estas tute neforgesebla etoso – kuŝi sur herbo, maĉeti frambon kaj aŭskulti prelegon aŭ ion pridiskuti. Por ion klarigi homoj (dank’ al infekta ekzemplo de Kostja Viĥrov) uzis strobilojn, kiuj ja abundas en la loko, – strobile oni, interalie, pridiskutis la novan strukturon de REJM kaj la novan koncepton de SEJT.

Vesperaj programeroj estis paroligaj kaj gajaj. Preskaŭ ĉiutage iu teamo faris “radielsendon” – 10-15-minutan sonbendon kun resumo de la tago. Ege bone funkciis! Indas tion transpreni al aliaj renkontiĝoj. La slava pagana festo de Ivan Kupala pasis plene en Esperanto. Dum unu el la vesperoj okazis ludo “Ho, feliĉulo!” – per si mem ne tro freŝa invento en Esperantujo, multaj ludas ĝin eĉ en siaj lokaj kluboj. Tamen la gvidanto (talenta artisto Danil Kapitonov) sukcesis fari veran spektaklon el la konkurso. Rezulte Kostik Malasajev el Tomsk gajnis 50 kopekojn (li, aĉ!, ne sciis, ke SEJT-oj iam nomiĝis BET-oj), Slavik Ivanov el Peterburgo gajnis 10 rublojn (la ulo pridubis, ke Valentin Melnikov sukcesis traduki la romanon “Eŭgeno Onegin”) kaj Aleks Kadar el Epinal (Francio) iĝis la absoluta gajninto, respondis ĉiujn demandojn kaj ricevis 50 (imagu vi nur!) rublojn. Tute elstara (konsiderante la prepartempon) estis KGS, kiun la organizantoj plivigligis per elementoj de “Kuru-Kuru”. Impresis ankaŭ la adiaŭa koncerto (tute malkutime

neendormiga: Kostik la Tomska kaj Etulinka brile sukcesis fari ĝin tia per siaj gajaj voĉoj kaj neatenditaj – eĉ por la artistoj – koncerteroj).

Multaj esperantistoj estas grandaj ŝatantoj de folkloro kaj lokaj kulturoj – do ĉe Vetluga ni havis bonegan interkulturan koncerton. Al la tendaro, iam mez-OkSEJT-e, venis el Niĵnij Novgorod muzikbando “Prociono” (“Racoons”) – la knaboj (kaj la bando konsistis ĝuste el tri knaboj) ludis gajajn melodiojn de foraj Irlando kaj Skotlando. La tuta halo dancis, aldanciĝis ankaŭ la ripozejanoj, kiuj ekŝatis esperantistojn dank’ al la gaja vespero, kiun ni donacis al la ripozejo. Fakte ni multe amuzis la lokanojn: sen OkSEJT la vivo en la ripozejo estus tute teda...

Kelkaj “livaj” ripozejanoj tiom sukcesis en siaj etnografiaj studoj pri la Esperanto-medio, ke fakte iĝis tendaranoj. La plej fama el ili estas Anton el Niĵnij Novgorod, kiu hazarde trafis nian feston de Ivan Kupala kaj evidente enamiĝis al Esperanto (aŭ al niaj knabinoj) tiom forte, ke poste venadis ĉiutage al ĉiuj tendaraj programeroj (kaj speciale al la kurso de Esperanto).



Slavik Ivanov laboris ankaŭ fizike

Tamen pri Esperanto. OkSEJT-42 iĝis sendube unu el la plej esperantistaj tendaroj de la lastaj jaroj. En la intertendejo kaj ĉe la ĉefa lignofajro regis strikta lingva disciplino. Dank’ al severaj riproĉoj de Vitalik Malenko kaj (certe!) dank’ al la kurso de Ljoŝa Beŝĉastnov eĉ komencantoj iel-tiel parolis. La disciplinon helpis ĉeesto de du eksterlandanoj: Aleks (Francio) kaj Ivo (Nederlando). Ilia ĉeesto forigis la stultan sloganon de krokodiloj kaj iliaj kunsopirantoj: “Ni praktiku Esperanton nur en internacia medio! Lingvojn lernu la lingvisto!” Gravas, ke Aleks ĉiam insistis je traduko de krokodilaĵoj (dum Ivo ŝajne jam al kutimiĝis al sonado de la fremda lingvo – espereble tio okazis dum liaj biciklaj vojaĝoj, sed ne dum rusiaj E-aranĝoj).

Ĝuste la lingva sukceso de la tendaro kondukis REJMon al la decido ŝanĝi la koncepton de SEJT, fari ĝin sekvjare pli tenda, pli instrua, pli lingva. Tiun ideon subtenis, inter aliaj, ankaŭ la Paĉjo de SEJM/REJM Anatolo Gonĉarov. Indas emfazi, ke post la enkonduko de REJM-ekzameno (nepra por ĉiuj aliĝantoj al REJM) lingva sukceso eksignifis ankaŭ la movadan sukceson – dum ĉi-OkSEJT REJM sukcesis kelkobligi siajn vicojn kaj en tiu granda konsisto fari eble la plej sukcesan konferencon dum kelkaj lastaj jaroj.

La Amikan Rondon oni faris vespere, ĉar multaj planis forveturi la sepan jam frumatene. Matene ne sufiĉis aŭtoj, multaj hastis, kelkaj foriris perpiede – la disiĝo estis hela, samkiel la mateno, sen larmoj, nur kun bona tristo en la koro. Ja ni ankoraŭ renkontiĝos. Ja ni faros multe da utilaj aferoj kune. Ĝis revido! Ĝis revido! Ĝis revido...

Lena Maslova (Dimitrovgrad), Tanja Melnikova (Ĉeboksari), Varja Muraŝova (Peterburgo) kompilis, prilaboris kaj aldonis la tekston Sl.Ivanov (Peterburgo)

OkSEJT kun arbaraj spicoj

Al mi tre plaĉis la OkSEJT-a vivo. Mi bedaŭras tamen, ke ĝi daŭris nur 10 tagojn. Ĉiu tago pleniĝis per interesaj eventoj, konatiĝoj kaj agado. La loko mem estis rimarkebla – kvieta rivero, sabla plaĝo, arbaro kaj forbrulinta kampo, kie ni renkontis sunsubiron. Tre bonegas, ke la tendaranoj loĝis en tendoj. Kaj eĉ pli mi sopiras pri lignofajra manĝaĵo kun branĉetoj, folietoj kaj aliaj arbaraj spicoj. Mi plej bone memorfiksis la kurson de Ljoŝa Beŝĉastnov kaj malplej bone – REJM-lernejon.

Grandan dankon al tiuj, kiuj organizis vesperon de irlanda muziko – ĝi estas neforgesebla, ĝi restos kun mi por la tuta vivo! Kaj tiu belega nokto de la “Angla klubo”! Sub la stelplena ĉielo aŭdeblis angla parolado kaj kantoj de “Beatles”. Dum tiu OkSEJT-a vivo kreskadis grandega sento de dankemo al Vitalik Malenko por...

Ĉiu alia KGS kompare al la OkSEJT-a simple “ripozas”, des pli ke nia teamo “TERO” superis ĉiujn! Tamen dum KGS nin tre timigis Danilka Kapitonov – li foriris kolekti strobilojn, kaj aperis penso, ke li... batalas kun lokanoj. Sed feliĉe onidiro evidentiĝis malvero: Danilka revenis viva kaj sana. El ĉiuj prelegoj la plej interesa por mi estis tiu de Vladimir Samodaj. Tre belegis la fotoekspozicio. Kaj kiom multe da masaĝo estis dum la aranĝo! Por iu ajn parto de korpo!

Jelena Alopina (Kovrov)

“Aha, tiu... kun REJM-lernejo...”

1. Ĉio estis pli-malpli la sama, sed ial la aranĝo estis mirakle bona. Mi ne jam scias, kiu estis la senco de la afero por mi – sed la espero, ke la senco aperis kaj maturiĝis, lulas mian koron. Ĝi estas, verŝajne, la plej grava por mi rezulto: mi eĉ ne volas dume elspiri vortojn pri iuj estontaj agoj – por ne fortimigi la sencon.

2. Al mi plaĉas, ke rememorante la aranĝon oni tuj diros “aha, estis tiu... nu... kun REJM-lernejo”. Krome, min ĝojigas rememoroj pri – jam nekutime – multhoraj (kaj/sed fruktodonaj) E-kursoj. Laŭvoje mi volus refoje danki ĉiun mian kursanon pro la entuziasmo kaj pacienco (kvankam la du aferoj antaŭe ŝajnis al mi iom nekunigeblaj).

3. Fari ion ajn kun/en tiu varma teamo estis interese kaj agrable – duoble pli agrablas la sukceso de tiu “io ajn”. Temas, certe, ne nur pri TOK kaj pri Vitalik persone, kun kiu(j) mi kunpasis multan tempon, – kaj ne nur pri Anatolo Gončarov, kun kiu mi ne multe konversaciis, sed kies ĉeesto sentebelis por mi kaj multe helpis. Temas preskaŭ pri ĉiu homo en la adres-listo.

4. Pri la okazintaĵo oni rajtas uzi la vorton “etoso”, sed mi dirus, ke certe evidentiĝis specife bonaj kondiĉoj por certaj specifaj bonaj trajtoj de la homoj. Nemultaj kaj certaj trajtoj de multaj homoj samtempe. Relative multaj, memkompreneble, sed valoras ankaŭ la kvalito. Kompare kun la etoso mi povus tute ne mencii la malbonaĵojn, sed...

5. Mi finu, tamen, per iom da minusaj impresoj – ĉefe la organizaj: dum kaj antaŭ la tendara tempo nemalmultas marĉecaj makuloj sur la organiza vojo – tio povus esti rimarkenda kaj akuzenda, sed kulpigi la gajnon malutilas (ĉar ne eblas disŝiri la gajnon de ties cirkonstancoj). Inter sendube streĉigaj ĉirkaŭaĵoj de la tendaro mi nomus, verŝajne, nur ebrian intereson de lokanoj – feliĉe, estis ne tiom da agoj, kiom da streĉoj kaj prizorgoj. La problemoj jam iĝis kutima por niaj aranĝoj – kaj tio respegulas ne nur la distancon inter la medioj, sed ankaŭ la distanciĝon – ni ofte similas al beboj, kiuj kaŝas sin sub litkovrilo en brulanta domo... brulanta lando... brulanta mondo.

Aleksej Besĉastnov (Moskvo)

MLM-oj el la tendaro

Antaŭa rimarko: MLM estas mia Esperanta traduko de la angla SMS, kaj tiu mallongigo signifas MalLonga Mesaĝo. Jena raporto formiĝas el pluraj MLM-j, kiujn mi povintus skribi dum la aranĝo, se tie eblintus havi aliron al telefonreto por poŝtelefonoj.

De la 28.07 ĝis la 07.08.2002 mi pasigis 10 tagojn en OkSEJT-42, Okcidenta Somera Esperantista Junulara Tendaro. Kvankam tiu aranĝo al mi malpli plaĉis ol EoLA-14 en Ĉeboksari, mi tre ŝatis multajn aferojn, elinter kiuj mi priskribos la sekvajn:

La kadron. La tendaro estis tre proksime de la rivero Vetluga, unu horon piede de la stacidomo Vetluĝskaja, kiu situas 3 horojn for de Niĵnij Novgorod (kiu estas 7 horojn for de Moskvo per la nokta trajno). Resume la vojaĝo tre longis kaj tre daŭris, sed la ejo tre belis,

kiam la vetero bonis.

La vesperan programon. Kiam vespere estis io programita, tio estis tre plaĉa. Estis interalie team-ludoj, konkurso “Ek, knabinoj!”, KGS, “Ho, Feliĉulo!” (tiu ludo en Francio nomiĝas “Kiu deziras gajni milionojn?”), Ivan Kupala kaj kostuma vespero, gitar-kantoj kaj -muziko ĉe lignofajro, konkurso de MalbelLegado...

La rusajn trinkaĵojn. Vi certe pensas pri vodko. Tute ne! Bedaŭrinde aŭ ne, mi trinkis ege malmulte da vodko tie, nur la lastan tagon eblis drinki iom da. Ĝenerale dum manĝoj trinkeblis teo, “ĉaj”, kiun mi tre ŝategas nun, kaj kafo, ĉokolado, kompoto ktp.

Konatigon kun pluraj konindaj homoj. Ĉiujn ilin citi ne eblus, kaj incitus la aliajn. Cetere, multe da in-citado necesus.

Novajn Esperanto-kantojn, kiujn mi tie plezure aŭdis, ekz. tiun, kiu enhavas “sonas ja ja jupi jupi ja”.

La eblon ajna-momente baniĝi kaj naĝi en la tut-proksima rivero, tage aŭ nokte, kiam programo ne plaĉis aŭ simple ne estis.

La gean ŝvitbanejon. Sen drinkaĵoj ĉi-foje, sed gea! Domaĝe, mi ne povis porti okulvitrojn ene. Tamen tre agrablis ŝviti, laviĝi kaj puriĝi tie.

La diligentecon de rusaj samideanoj. Plej ofte ili ne krokodilas. Onidire, nur unufoje krokodilis la ĉeforganizanto, kaj post tiam aĉiĝis la vetero.

Minusaj punktoj estas i.a. la multegaj kuloj, kiuj min atakis de la komenco; la vetero, pro kies aĉiĝo aŭguste mi malvarmumis; la foje iom malriĉa taga programo; la foresto de diskoteko; kaj aliaj ne citindaj. Sed certe pri la du ĉefaj minusoj, ne alriproĉu la georganizintojn, ili ne kulpas! Do, estis mia frapista raporto pri aranĝo, kiun mi tiamaniere resumus: interesa, plusa kaj minusa, varma kaj malvarma, ne okcidenteca, sed somera, Esperantista, junulara, tendara. Unuvorte: spertinda !

Aleks Kadar (Francio)

Tio similis la jarojn 1960-ajn...

Dum la lastaj du jardekoj mi tre malofte vizitadis E-tendarojn. Kaj jen tute hazarde, ĉar subite ricevis dusemajnajn feriojn, mi vizitis OkSEJT-42. Ĝi devus jam esti la 44-a, tamen pro diversaj kaŭzoj du tendaroj ne okazis... Ĉu ĝi plaĉis al mi aŭ ne plaĉis, jen la demand'. Mi diru sincere: plaĉis.

Kial plaĉis? Ĉar ĝi memorigis al mi la mirindan pasinton de niaj junularaj tendaroj en la jaroj 1960-70-aj.

Veninte en la tendaron mi trovis, ke konas preskaŭ neniun. En ĝi estis multaj novuloj, kiuj preskaŭ ne posedas E-on. Sed estis ankaŭ multaj aliaj, kiuj posedas ĝin bonege, kiuj kreas la saman – jam forgesatan etoson de amika atmosfero, de serioza laboro kaj ripozo, diskutoj, lekcioj, lernado lingva kaj primovada, distroj, ĉelignofajra kantado, koncertoj...

La nuna E-junularo en tute novaj kondiĉoj estas ne malpli inventema, ol estis nia generacio antaŭ 3-4 jardekoj, kaj ne malpli agrablaj personoj ĝin konsistigas. Nur unu momento estas malaprobinda – la nedisciplinemo organiza. Oni perdas troan tempon pro la konstanta malfruiĝo de la planataj programeroj. Mi opinias, ke komenci necesas ĉiam je la planita horo-minuto. Se atendi malfruiĝantojn por pliarigi la partoprenantojn, oni al kutimiĝas al la penso: mi ne rapidu, ĉar egale oni komencos pli malfrue. Iuj grumblis pri tio, ke estas en la tendaro tro da ruslingvaj programeroj. Mi diru malgrumble: kial ne? Kial ne klarigi al la novuloj ruslingve ion el niaj movadaj principoj, el nia historio kaj kulturo, por ke ili pli bone komprenu la esencon de nia sankta afero, se ili dume ne maturas aŭdi tion en E-o? Oni grumbas ankaŭ pri tio, ke organizo de aparta junulara tendaro splitas la koheran rusian E-movadon, ke ne sufiĉas fortoj por tendaroj apartaj. Tamen la fortoj sufiĉis. Krom tio, tiuj apartaj tendaroj havas diversajn taskojn kaj permesas al pli da personoj plonĝi en la

tendaran atmosferon. Ekzemple mi ne havis tempan eblon aperi en EoLA, nek en IvERo, nek en RET, sed malgraŭ la nekongruo aĝa, ĉar mi ja estas samtempulo de dinosaŭroj en junulara tendaro, mi ĝuis la bonaniman etoson en la nova generacio de esperantistoj.

Mi dankas la organizintojn kaj la partoprenintojn.

Vladimir Samodaj, esperantisto ekde 1958 (Moskvo)

EĈ pli serioze...

Mi plej ŝatis REJM-lernejon – en tiu parto, kiu interesas min: pri Esperanto en Interreto kaj publikaj rilatoj. Laŭ mi, la ideo de Vitalik Malenko pri instrua tendaro ekrealiĝis jam ĉi-foje. Al mi plaĉis, ke OkSEJT estis tenda – tiel pli gajas, kiam ne tro malvarmas. La distra programo estis tamen malriĉa. Por sekva fojo mi proponus eĉ pli serioze rilati al preparado – komenci ĝin ne en majo, sed antaŭ jaro, kiel oni kutime faras organizante aranĝojn en eksterlando. Tiam ĉio estos vere bone preparita.

Stas Tolokoljnikov (Ivanovo)

REJM ANONCAS 2 KONKURSOJN!

ĈU VI VOLAS ESTI SCENARISTO DE FILMO?

Tio estas ebla afero, ĉar sekvasomere, dum RET-03 okazos surbendigado de filmo en Esperanto! Iu el ni iĝos reĝisoro, tiu homo kolektos aktorojn, iu iĝos teknika redaktoro, iu – sufloro, kostum- kaj ŝminkfaranto... Sed loko, kostumoj, aktoroj – tute ĉio dependos de la scenaro! Do nun ni anoncas konkurson pri la plej interesa scenaro! Pensu, pri kio povas esti la filmo – ĉu pri nunaj tagoj, ĉu pri foraj tempoj? Kie okazos ĉio? Aŭ, eble, ni ludos nin mem? Sendu al <sony@mail.icomtex.ru> VIAN SCENARON! La aŭtorojn atendas FORFLUGIGAJ PREMIOJ!

TASKO POR KREEMAJ HOMOJ

Arta sekcio de REJM ekas novan projekton – periodaĵon, kiu enhavos verkojn de junaj esperantistoj – versaĵojn, prozaĵojn, desegnaĵojn, scenarojn kaj tiel plu. Sed dume nia estonta almanako ne havas nomon. Ĉu vi havas iujn ideojn? Sendu ilin al ni! La aŭtoro de la plej bona nomo ricevos premion! La adreso estas: <sony@mail.icomtex.ru>.

Amike via, arta sekcio de REJM

Post REJM-konferenco en OkSEJT aperis multe da novaj REJM-membroj, kaj estis elektitaj kelkaj agadkampoj. Nun ĉefoj de la agadkampoj rakontas pri siaj ideoj kaj planoj.

Sonjo Ŝejnina, kunordiganto de la arta sekcio <sony@mail.icomtex.ru>

Se vi ŝatas arton, ni invitas vin al la arta sekcio de REJM! Kreado estas, verŝajne, unu el la plej interesaj aferoj en la vivo. Pro tio aliĝu kaj ĝuu! Jam aperis kelkaj ideoj. La unua estas eldonado de periodaĵo kun kreado de junaj esperantistoj. Se vi verkas, pentras, desegnas – bonvolu sendi al ni viajn verkaĵojn! La dua projekto estas surbendigado de filmo dum RET (legu plian informon supre). Aperis ankaŭ penso pri la interurbaj koncertoj (ĉu dum iuj E-renkontiĝoj?). Se vi havas ankoraŭ ideojn, proponojn, preton interese kunlabori – bonvenon, geamikoj! Speciale por komunikado de la arta sekcio funkcias dissendolisto ĉe <yahoogroups>.

Lena Maslova, kunordiganto de la agadkampo Novaj membroj

Karaj gesamideanoj! *Novaj membroj* estas nova agadkampo en REJM. Ĝia celo estas helpi al homoj, kiuj volas realigi sin en E-agado, fari tion pere de REJM kaj por REJM. Laŭ

mi ĝi havas 2 laborliniojn: 1. kun membroj de REJM; 2. kun potencialaj membroj. En la unua laborlinio vi havas grandan teritorion por agado – gravega afero estas kunigi REJM-anojn por ke ili sentu sin komforte, estu aktivaj. Rezulte la homoj kreskos kaj REJM iĝos pli laborema, pli kapabla. Por tio vi povas esti aktiva mem kaj aktivigi homojn por viaj projektoj. Eblas organizi diskutklubojn, dissendi gratulojn al REJM-anoj okaze de festoj, elpensi iniciadojn kaj organizi ilin por la novuloj. Por la dua laborlinio vi povas elekti laboron kun eksmembroj de REJM (estos bonege, se ili revenos kaj aktivos!) aŭ laboron kun potencialaj membroj. Eblas trovi homojn en viaj kluboj kaj dum E-aranĝoj kaj rakonti al ili, kio estas REJM, por kiuj celoj ĝi estis kreita, kiel ĝi povas helpi al siaj membroj kaj kiel ili povas helpi al REJM. Ĝis la fino de 2002 estas planate: 1. verki gvidlibron por REJM-anoj; 2. kolekti homojn por 2003 (nunajn, novajn kaj eks-membrojn). Ĉu vi povas proponi ion interesan? Ni kapablas fari REJM-on pli forta kaj helpi al homoj trovi sin en ĝi. Ideoj bonvenas!

Slava Ivanov, kunordiganto de la agadkampo Informado

Kion celas nia informado? Ĝi celas la internan publikon (esperantistaron) kaj la “eksteran” mondon – do pro tio REJM havas du agadkampojn: pri interna informado kaj pri la ekstera. La du tipoj sufiĉe diversas:

- Ekstera informado postulas bonan regon de etna(j) lingvo(j) (enlande plej ofte bezonatas la rusa, sed funkcias nemalbone ankaŭ informado en “minoritataj” lingvoj). La informanto devas logi la publikon, sed ne forpuŝi ĝin per nelertaj frazoj, politikeskaj esprimoj kaj simile.

- Interna informado postulas bonan posedon de Esperanto. Samtempe la informanto devas bone koni ĉiujn realaĵojn de E-mondo. Krome li estu bona “familia” verkanto – la tekstoj devas esti varmaj kaj etosplenaj. Se temas pri aranĝoj de REJM, bezonatas loga reklama stilo.

Ne nur spertuloj estas valoraj en nia informado. Pensoj de ajna persono, bone prilaboritaj, povas iĝi bona loĝaĵo por la ekstera publiko aŭ substreki gravajn punktojn dum la informado interna. Ekzemple skribaj mallongaj impresoj de OkSEJT-partoprenintoj multe helpis en kompilado de informartikoloj pri la aranĝo.

Kion ni nomas “informado”? Temas ne nur, ekz., pri gazetaj artikoloj. Vi povas identigi vin kiel anon de nia agadkampo, se vi rakontas pri Esperanto al viaj geamikoj, parencoj, konatoj ktp. Vi povas mencii Esperanton en amika babilado, en retaj forumoj ktp. Certe necesas tion fari lerte kaj atente. Por akiri tian sperton ekzistas pluraj “lerniloj”, kelkajn disvastigos ankaŭ ni inter niaj REJM-membroj.

Se vi almenaŭ iam revetis iĝi ĵurnalisto, realigu vian revon: iĝu ano de informaj agadkampoj de REJM. Ajna via materialo povas trovi lokon en esperantlingvaj aŭ etnolingvaj informiloj. Ne preteratentu eblojn publikigi ion en loka kaj regiona gazetaro. Verki kapablas ĉiuj. Tamen, se vi ne kredas je viaj fortoj, vi povas peti viajn sam-REJM-anojn helpi post-glatigi vian tekston.

Ne estu avaraj egoistoj. Inventu novajn vojojn. Kreu novajn ideojn. Popularigu REJM-on kaj Esperanton.

Danil Kapitonov, kunordiganto de Financa agadkampo

Jen planoj de la Financ-grupo.

- 1) Aktivigi REJM-financon grupon. Enigi tien multajn amikojn kaj volontulojn: Kapitonov D., Kozlov A., Viŝrov K., Lisina A., Sudakova A., Panina J., Ĵuravljova J., Grigorjevskaja N.

- 2) Kontribui al pli rapida registriĝo de la organizo por posta verkado de projektoj.

- 3) Varbado de patronoj kaj sponsoroj.

4) Ellabori kotizsistemon.

5) Ekigi laboron por aperigo de diverscelaj fondusoj (OkSEJT, Evoluo, Helpo al novaj grupoj).

6) Vivigi sistemon de Aŭkcioj dum E-aranĝoj por enspezado.

7) Pripensi aliajn monakirajn eblojn.

8) Elekti kasiston.

9) Verki la libron “Financa politiko”.

Nun la plej grava tasko estas kunlaborigi homojn, funkciigi la financgrupon. Kaj tiam ni kune laboros por efektivigo de la plano. Viaj ideoj/proponoj?

Aleksandr Blinov, respondeculo pri la agadkampoj Instruado

Prioritate:

1. varbi gejunulojn por instruado de Esperanto (dum la jaro), kreante kun tiuj laborteammon aŭ komisionon pri instruado (dum la jaro);

2. establi retan (kaj eventuale ĉeestan) kurseton pri bazaj principoj de lingva instruado (dum aŭtuno);

3. kunlabore kun la seminaria laborgrupo okazigi seminarion pri instruado;

4. informi junajn instruistojn pri novaj metodlibroj por instruado (dum la jaro);

5. zorgi pri la instruado dum OkSEJT.

Vitalik Malenko, kunordiganto de REJM,

respondeculo pri la agadkampoj Amasaj aranĝoj, Seminarioj, Kluba laboro

Karaj amikoj!

Mi ŝatas prezenti miajn ideojn ligitajn kun 3 agadkampoj de REJM: Amasaj aranĝoj, Aktivul-Trejnaj Seminarioj (ATS) kaj Kluba laboro, kiujn mi nun estras; plus iom pri la planoj ligitaj kun REJM ĝenerale.

Amasaj aranĝoj. Inter kelkaj amasaj aranĝoj de la jaroj 2002-2003, nome REK, EoLA, OkSEJT, RET REJM intencas ĉeforganizi OkSEJT kaj kunlabori pri junulara programo de RET. Certe ni ankaŭ ŝatus helpi pri EoLA, sed dume ne vidas realajn eblojn tion fari (krom informaj). Jam ni komencis labori pri OkSEJT. La koncepton ni priskribis en la antaŭa numero de REJM-info. En septembro ni pridiskutas la lokon kaj datojn kaj en oktobro parolos pri instruado (ĉefa linio de la aranĝo). Ni strebos inviti komencantojn de eksterlando (plus bonvenas eksterlandaj esperantistoj). Certe la tendaro estos ne tradicia. Pli proksime al vintro ni ekigos laboron pri RET. Dum TERO ni pridiskutos interesojn de junularo kaj apogante sin je tiuj scioj provos jam ellabori kelkajn programerojn. Ajnaj proponoj bonvenas. Bonvolu memori, ke por OkSEJT bezonatas instruistoj plus organizantoj. Via helpo estas bonvena!

ATS. Por la sekva jaro estas planataj minimume du seminarioj por aktivuloj: unu – por instruistoj (februare) kaj unu – por ontaj organizantoj de OkSEJT-RET (maje). Estas tre grave por ni, ke OkSEJT-43 pasu sukcese. Kaj sukcesa ĝi estos, se sukcesos instruado, aperos novaj esperantistoj. Pro tio ni multe da atento donos al nivelo de la instruado. Por tio servos ATS por instruistoj, kiun ni organizos februare (en oportuna periodo). Kaj por homoj, kiuj pretas organizi OkSEJT kaj helporganizi RET, ni faros specialan seminarion komence de majo. Tie ni detale pridiskutos la programon de OkSEJT kaj niajn programerojn de RET. Certe vi povas helpi organizi ambaŭ ATS. Denove bonvenas volontuloj!

Kluba laboro. Unu el la plej gravaj taskoj de REJM estas plifortigi laboron de lokaj kluboj kaj anoj. Kaj ĉi tasko estas la plej malfacila. En la planoj estas komuna (kun Aleksej Kuznecov) laboro pri speciala dissendo por klubgvidantoj kun pretaj materialoj por interesaj kunvenoj. Nun ni esploras Esperantujon por ekscii, kie povas esti bezona tiu helpo. Sed tempoj ŝanĝiĝas kaj ni devas per aliaj okuloj rigardi al kluba laboro, ol ni (oni) rigardis

antaŭ 20 jaroj.

Ĝenerale. Kiel ĉefan taskon de ĉi-jara komitato mi vidas jenan: fari ĉiun REJM-anon aktiva esperantisto. Mi ŝatus, ke ĉiu juna esperantisto komprenu la celojn de Esperanto, trovu por ĝi ĝustan lokon en sia vivo. Pluse mi ŝatus, ke Esperanto montru sian internacian signifon. Kaj tio eblos, se ni sukcesos pli aktive kunlabori kun diversaj eksterlandaj E-organizaĵoj, se eksterlandanoj venos al niaj aranĝoj. Kaj se ni tamen decidus organizi IJK, tio ankaŭ estus serioza ŝtupo por evoluo de Esperanto en nia lando kaj en junulara E-mondo.

KION MI FAROS EN REJM

*Dum OkSEJT post sukcesa pasigo de ekzamenoj al REJM aliĝis multe da novaj membroj. Multajn interesas la demandoj: Kio estas REJM? Ĉu iu formala organizaĵo? Ĉu seriozaj pridiskutindaj demandoj? Ĉu ĉiujara konferenco? Eble, ĉio tio estas vero, sed se pli ĝenerale diri, **REJM estas ni ĉiuj**. Kaj REJM-a agado estas ĝuste tio, kion faras NI. Jen kion REJM-anoj diras pri siaj planoj en REJM-a aktivado.*

Polina Vasilejko (Nijnij Novgorod): Mi volas verki Esperanto-kantojn kaj elpensi E-ludojn. Mi povas kontribui al prilaborado de muziko por E-muzikaĵoj.

Ulĵana Ŝmarova (Kostroma): Mi ŝatas simple propagandi Esperanton ĉie. Ankaŭ min allogas instruado. Mi jam provis gvidi paroligajn E-kursojn kaj kursojn por komencantoj en nia Kostroma klubo, kaj volas daŭre aktivati tiudirekte.

Sergej Tureckij (Novoĉeboksarsk): Mi povas helpi pri realigado de projektoj en labordirektoj de REJM. Mi jam pretas kunlabori en la arta sekcio. Mi povas helpi pri teknika parto en organizado de io. Simple proponu al mi!

Anja Mustafina (Ĉeboksari): Min interesas instruado. Mi ŝatus ekscii pri diversaj metodoj de lingva instruado, kaj en estonto okupiĝi pri ellaborado de novaj instrumentoj. Ankaŭ arto tre allogas min. Se estos tiu surbendigado de filmo dum sekva RET, mi volus aktori tie.

Aleksandr Gerasimov (Nijnij Novgorod): Mi ŝatus labori en du direktoj: lingva instruado kaj eksteraj rilatoj. Ekzemple, mi proponus pli intense allogi eksterlandanojn al niaj aranĝoj – provi tiel kontakti ilin, ke ili ekvolu veni.

Maŝa Ĵukolina (Ivanovo): Mi volus pere de Esperanto instrui aŭ organizi ion ligitan kun filozofio, historio kaj komunikado – mi pensas, tiuj kampoj estas interesaj al multaj homoj. Ekzemple nun ni realigas la projekton “HIERAŬ” – tio estos historia E-renkontiĝo far nia klubo (atendu plian informon baldaŭ!). Kaj mi ŝatus ankaŭ okupiĝi pri io arta.

ĈU ESPERANTUJO ESTAS LOKO POR RIPOZI AŬ POR LABORI?

Tiun-ĉi demandon ni pridiskutis rete. Legu kaj konsentu aŭ malkonsentu! Viajn opiniojn bonvolu sendi al <sony@mail.icomtex.ru>.

Aleks Kadar (Francio): Tiu ĉi demando memorigas al mi unu el la temoj, kiuj estis pridiskutata dum la pasinta OkSEJT-42 pri la venonta OkSEJT... Laŭ mi Esperantio estas loko por amuziĝi! Sed por amuziĝi inter Esperanto-parolantoj. Tio estas, la baza kondiĉo estu ke homoj sufiĉe bone parolas Esperanton. Tamen, dependas ankaŭ, kion oni nomas Esperantio. Ĉu estas aranĝo? aŭ ĉu estas nia ĉiutaga mondo? En ĉiutaga mondo endas esperantigi homojn, por ke ili partoprenu en aranĝo. Tio estas, endas labori. Kaj poste, dum la aranĝo, la homoj rajtos ripozi. Sed ni ne forgesu, ke se kelkaj homoj deziras amuziĝi, labori, pigrumi, devas esti aliaj homoj, kiuj laboros, preparos, organizos la aranĝon, helpos. Se ĉiuj ripozus kaj neniuj laborus, kio okazus? Ĝenerala fuŝado! Ne ĉiu povas samtempe ripozi. Solvo al tiu problemo estus, ke alternus ripozantoj kaj laborantoj. Unu tagon iu

laboras, sekvan tagon ŝli ripozas, kaj farus inverse alia homo.

Laci Neniam (Dolgoprudnij): Ĉu Esperantujo estas loko por ripozi aŭ por labori? Por mi ĝi estas, unue, la ebleco labori lige kun mia cerbo. Tio signifas, ke mi multon povas ĉerpi el amikado kun esperantistoj, ĉar pluraj el ili estas tre kapablaj kaj talentaj – kaj pro tio laboro kun tiuj homoj ebligas multon fari kaj por mia cerbo kaj ankaŭ por nia societo... Kaj certe de tempo al tempo ankaŭ ni ripozas en Esperantujo. Tio normalas, ja esperantistoj plejparte preferas amiki nur kun esperantistoj kaj absolute ne ligi sin kun aliaj organizaĵoj, tamen kiel normalaj (pli-malpli) homoj ili certe devas ripozi. Kaj se ili ne volas ŝanĝi la organizaĵon ili ripozas inter esperantistoj...

Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja): Esperantujo estas loko por ripozi laborante por agrabla afero.

Nirab Kayastha (Nepalo): Mi persone pensas, ke Esperantujo devas esti, plejparte, laborloko, sed ne en iu peza senco. Lernante E-on, ni ĉiuj (ĉu ne?) kantas, ludas, partoprenas diversajn aranĝojn, mallonge dirante – ripozas. Sed post bazaj kursoj, por tiuj, kiuj ĝis fino restas, aperas la demando – kion fari kun la kono de tiu ĉi nova lingvo? Kie uzi ĝin? La problemo, kiu koncernas la malaperadon de gelnantoj el kursoj, realas ankaŭ ĉi tie, en Kathmandu, Nepalo. Sed alia problemo estas tio, ke eĉ komence la dezirantoj lerni E-on ne multas. Do, kiel ni povus iel montri – al tiuj, kiuj venas kaj restas – ke post la lernado/kantado/ripozado E-o fakte estas serioza afero? Bv korekti min, se mi malpravas, sed mi pensas ke ni ne faru E-klubojn kaj kunvenejojn babilejoj. Ŝanĝi ion en la granda skalo, povas esti, malfacilas; ni faru ion loke. Kaj ne nur ni dancu kaj ludu. Sed ankaŭ ripozo tre gravas por la konstruiva pensado. Kiel diris Mark Tven “Laboro kaj ripozo estas vortoj uzataj por difini la saman aferon en diversaj kondiĉoj”.

Irina Gonĉarova (Odincovo): Esperanto estas loko por ripozi per Esperanto kaj labori por Esperanto. Kaj ambaŭ okupoj servu por memevoluo, akiro de nova sperto kaj perfektigo. Fakte, tion celas StrIGO.

Stas Tolokolnikov (Ivanovo): Mi pensas, ke realo estas tia ke por plimulto de homoj (ekzemple por mi) Esperantujo estas loko por ripozi, por refleksiĝi, por amužiĝi... loko kie ni povas kaŝiĝi de la ĉiutagaj problemoj... Kaj por malmultenombra grupo de homoj tio estas loko por ĉiama laboro... Ideale ĉiuj homoj devas ion fari por aliaj, por la movado... tamen estas pli facile nenion fari, nenion scii, nenion voli... simple deziri ripozadon, amuzadon... Denove tamen... tio estas ilia rajto nenion fari... Do, tio ne estas problemo de Esperantujo – estas problemo de la homaro: malmulteco de aktivaj homoj kaj multeco de pasivaj konsumantoj... Feliĉe en Esperantujo tiaj pigruloj ne restas por longa periodo... kaj ni iam povos atingi tian idealon, kiam ĉiuj laboros kaj ripozos samtempe.

Danil Kapitonov (Ĉeboksari): Esperanto estas vasta mondo. Oni povas trovi lokon tie kaj por ripozi kaj por labori. Sed la ideo de E-o instigas nin (verajn E-istojn) aktivigi laŭ niaj principoj kaj je ili. Kelkaj povas aktivigi ĝojante kaj ripozante, aliaj – nur plene doni ĉiun tempon al E-o. Respondo al la demando diferencas depende de persono. Mi mem respondas jene: mi ĝojas labori en E-ujo kaj laboras tie ripozante.

Ljoŝa Kozlov (Niĵnij Novgorod): Por mi Esperantujo estas vere ripozujo, kaj tie mi povas ripozi aktive per komunikado kun interesaj homoj, per amuzaj aranĝoj. Sed por tio necesas: 1. mem iĝi interesa homo; 2. prepari amuzaĵojn; 3. disvastigi Esperanton kaj E-kulturon por allogi homojn. Por plenumadi ĉiun punkton necesas labori bedaŭrinde. (Eble mi estas pigrulaĉo?)

Ĵenja Ĵuravljova (Ĉeboksari): Laŭ mi homoj pli ofte venas al Esperantaj renkontiĝoj por ripozo. Tion eblas klarigi tiel, ke unue iuj konatiĝas kun Esperanto kaj kun homoj kaj nur poste al ili plaĉas tio kaj ili eniras la E-an movadon. Due, kelkaj homoj simple ne volas ion fari kaj venas tien nur por ripozo kaj amužiĝo. Mi opinias, se oni venas al Esperantujo

nur por ripozo, ĝi perdos ĝian signifon kaj ekestos kiel simpla “tusovka”, kaj finfine ĝi malaperos, ĉar komuna laboro kaj komunaj celoj kunigas homojn. Sed laŭ mi Esperantaj renkontiĝoj estas ankaŭ bona afero.

Gudvin (Nijnij Novgorod): ... Jen mi legis la antaŭajn respondojn. Homoj tiel bone scias, kia loko estas Esperantujo. Kaj mi pripensadis la demandon kaj ne povis klare respondi. Do, miaj pensoj: Ĉu Esperantujo estas loko por ripozi aŭ por labori? Kaj loko por ripozi de kio? Loko por labori pri kio? Kaj kio estas ripozo? Kaj laboro? Entute, la unua ideo, kiu venas mian kapon – Esperantujo estas loko por ripozi. Por ripozi de ordinara vivo, de kutimaj aferoj k.t.p., por fari bonajn renkontiĝojn kaj interesajn, amuzajn aranĝojn. Sed ne ĉio estas tiel simpla, kiel ŝajnas de unua vido! Ja renkontiĝ-gastigantoj aktive prepariĝas, gastoj ankaŭ volas prezenti ian interesajon, tra ĉiuj frontoj oni aktive esperantigas amasojn. Kvazaŭ laboro? Homoj lernas Esperanton. Ankaŭ laboras. Ĉu ne? Sed kio estas laboro? Mi alkitimiĝis nomi aferojn laboro, se ili streĉas, malmulte agrablas, tre lacigas, ne plezurigas. Ĉu eblas nomi ion laboro, se ĝi lacigas, kaj ne plezurigas? Ne! Ja estas la vorto “ripozo”. Tiam mi komprenas nenion. Aŭ estas multe da masohistoj, kiuj volonte igas sin fari laboron, aŭ oni eknomis agrablan tempopasigadon laboro (do, mi ĉiun tagon iras por ke de la 7-a ĝis la 16-a horo agrable pasigi tempon, t.e. labori – bonege). Kaj verŝajne Esperantujo estas loko por vivi, vivi bone, vivi memdezire?

ŜERCE

Kiel tradukiĝas “Vojkovskaja” en Esperanto?

Mi kaj mia koramikino parolas nur en Esperanto inter ni. Iam ni interkonsentis renkontiĝi la sekvan tagon ĉe la metrostacio “Vojkovskaja”. Vespere, akompaninte ŝin hejmen kaj dezirante certigi pri niaj morgaŭaj planoj, mi diris: “Do, kara, ni revidos unu la alian morgaŭ ĉe “Savjolvovskaja” je la 14-a, ĉu?” (mi evidente misdiris la nomon de la metrostacio). Ŝi miris kaj respondis: “Ĉu vere ĉe “Savjolvovskaja”? Ĉu ne “Vojkovskaja”?” Mi, konciĝinte pri mia eraro, provis ŝerci: “Sed en Esperanto “Vojkovskaja” tradukiĝas kiel “Savjolvovskaja”, vi povas kontroli en la vortaro!” Ni ĉiam portas Esperanto-rusajn vortarojn kun ni – kaj, kvankam la ŝerco estis tute stulta, ŝi malfermis sian saketon kaj elprenis la vortaron. Mi ege miris kaj tuj diris ke mi ja ŝercis! Poste ni longe ridegis pri tio, sed mi estis ĝoja scii, ke ŝi kredas al mi eĉ kiam temas pri la plej nekredeblaj aferoj.

Oleg Izjumenko (Moskvo)

EMOCIE

Antaŭnelonge en la peterburga Rusia Nacia Biblioteko mi tenis en la manoj kaj foliumis lernolibron de Esperanto, eldonitan en la 1930 (aŭtoro E.K.Drezen)¹. La libro plaĉis al mi, transdonis bonan etoson de socialisma entuziasmo... sed subite ie ĉe la vortkunmeto “Sennacieca Asocio Tutmonda” min kaptis estimego al la libro.

Mi ne plu povis vidi libron antaŭ mi, sed vidis pecon de historio. Kies manoj tuŝis la libron en la komenco de la 30-aj? Kiom da homoj la libro alkondukis al mallibero? Kie ĝi pasigis la Sieĝon? Kiam ĝi denove iĝis mendebla?...

Leviĝu, en mizer' dronanta //Sklavar' malsata de la ter'! //Raci' nin vokas indignanta //Al moribatalo pro l' liber'... (kanto el tiu lernolibro).

Slava Ivanov (Peterburgo)

¹ Supozeble temas pri la libro: Эсперанто. Самоучитель международного вспомогательного языка, под ред. Э.К.Дрезена. 2-е [или 3-е] испр. и доп. изд. М.-Л., 1923, 112 с. (Rim. de la red.)

Eksciu, ke...

SKRIBU AL AVO FROSTO, LI RESPONDOS... ANKAŬ EN ESPERANTO!

Kristnasko 2002 alvenas kaj, kiel ĉiujare, miloj da infanoj el Kanado kaj la tuta mondo skribos al Avo Frosto. Tradicie en Kanado infanoj, kiuj skribas al li en la franca, angla aŭ en dudeko da aliaj lingvoj, ricevas respondon el la norda poluso. Nove ĉi-jare la infanoj, kiuj skribos al Avo Frosto, ricevos respondon en Esperanto.

En 2001 la Esperanto-Societo Kebekia (ESK) traktis kun la Kanada Poŝta Servo sugestante la uzon de Esperanto por komuniki kun la esperantlingvaj infanoj de la mondo. La Kanada Poŝta Servo jesis al la propono de ESK kaj ekde Kristnasko 2002, Esperanto estos inter la korespondaj lingvoj, uzataj de Avo Frosto kaj liaj helpantoj, la volontuloj de la Kanada Poŝta Servo, por subteni alfabetigon.

La Esperanto-Societo Kebekia invitas ĉiujn esperantistojn, junajn kaj junkorajn, malkovri tiun kristnaskan tradicion skribi al Avo Frosto. Simple sendu manskribitan leteron al la sekva adreso: AVO FROSTO, NORDA POLUSO, HOH OHO, KANADO – CANADA.

Avo Frosto preferas manskribitajn leterojn, eĉ se skribitaj de etaj manoj kiuj lernas skribi. Ne forgesu klare skribi vian nomon kaj adreson por certigi ricevon de respondo.

Ni ankaŭ invitas la esperantistojn kaj la esperantistajn organizojn tra la mondo varbi pri tio, tiel ke la esperantlingvaj infanoj povu skribi al Avo Frosto ĉi-jare. Por ricevi pliajn informojn kontaktu nin je <avofrosto@yahoo.ca>.

Normand Fleury (Kanado)

P.S. Estas la unua Kristnasko kiam Avo Frosto uzos Esperanton kaj, ĉar li laboras multe dum tiu jarperiodo, povas esti ke li iom eraros en la liverado de siaj korespondaĵoj. Ekzemple, li povus erari pri lingvoj aŭ perdi leterojn. Se bedaŭrinde tio okazos al vi, ne estu tro malgaja rilate lin. Anstataŭe sendu retmesaĝon al <avofrosto@yahoo.ca> kaj la Esperanto-Societo Kebekia transdonos viajn komentojn al la Kanada Poŝta Servo. Ni bonvenigas ankaŭ aliajn komentojn. Feliĉan Kristnaskon! Ho! Ho! Ho!

RAKONTU PRI KURACLOKOJ EN ESPERANTO

En aprilo 2003 en Sankt-Peterburgo okazos la 12-a Internacia scienc-praktika konferenco “Kuraclokoj, ekologio, klerigo”, dediĉita al la 300-jariĝo de la urbo. La Konferenco havos 3 sekciojn: “Kuraclokoj kaj sanigo”, “Ekologio kaj turismo”, “Klerigo kaj entreprenismo [en la kuracloka-turisma sfero]”. La organizantoj invitas fakulojn fari en la Konferenco **prelegojn en Esperanto**, la tekstoj estas akceptataj ĝis 31.01.03. Interesitoj (precipe en kuraclokaj centroj aŭ/kaj havantaj kontaktojn kun ĉi-profilaj fakuloj) petu pliajn detalojn (Informa letero № 1) laŭ jenaj kontaktabloj: poŝta adreso – profesoro Jurij Aleksandroviĉ Matusov, a/ĵa 9, RU-192281 Sankt-Peterburgo; telefono/fakso – (812) 1782378; reta adreso – “por P.I.Zelikman” <bmit@mail.wplus.net>.

NE PLU FUNKCIOS “MONDA TURISMO”

Dum 20-29-a de septembro 2002 okazis en Bydgoszcz la 28-a Internacia Forumo pri Turismo, Edukado kaj Kulturo (IFTEK), kiun vizitis pli ol 100 gestudentoj kaj prelegantoj el 12 landoj de Eŭropo, Azio kaj Afriko (Albanio, Belgio, Bulgario, Germanio, Hispanio, Kenjo, DR Kongo, Mongolio, Latvio, Litovio, Pollando kaj Rusio).

Kadre de la 28-a IFTEK okazis la 4-a Bakalaŭriga Universitata Sesio (BUS) kaj la 22-a Pola Studadsesio de la Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino (AIS). La 8-horajn kursojn, preskaŭ ĉiuj en Esperanto, gvidis: OProf. Günter Lobin, OProf. Hans-Dietrich Quednaŭ, OProf. Remigiusz Mielcarek, ADoc. Bojdar Leonov, ADoc. Alicja Lewanderska-Quednaŭ, ASci. Ewa Bondar, ASci. Regina Grzebowska, ASci. Andrzej Grzebowski, Aneta Bedkowska, Aŭgusto Casquero de la Cruz; krome prelegis kelkaj aliaj. Oni diskutis ankaŭ pri Eŭropa integriĝo kaj pri malintegriĝo de la Esperanto-movado. Rezulte de la 4-a BUS pliaj dek gestudentoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz (ISTK) sukcese finekzameniĝis kaj fariĝis bakalaŭroj de AIS. En la studumo studas ĉi-jare pli ol 100 gestudentoj el ses landoj de Eŭropo, Afriko kaj Azio – kaj pliaj kandidatoj, kiuj volus studi turismikon kaj kulturon aŭ almenaŭ lerni Esperanton, la hispanan kaj polan lingvojn estas bonvenaj, ĉu por la tuta studjaro 2002/2003, ĉu por nur unu aŭ kelkaj semajnoj. Elkoran bonvenon!

La 22-an de septembro 2002 en Bydgoszcz okazis Eksterordinara (13-a) Ĝenerala Kunveno de la Internacia Asocio “Monda Turismo” (MT). La asocio fondiĝis en Vieno en 1970, kaj ekde 1975 (do dum 27 jaroj, dekfoje elektita) prezidis ĝin Andrzej Grzebowski. Pasintjare pro la septembra terorisma atako en Novjorko malgrandiĝis aviadila turismo. Ĉi-jare – pro ekonomia krizo en Pollando, pro falo de la kurzo de zloto rilate al eksterlandaj valutoj kaj pro okazintaj julie kvar tragikaj katastrofoj de polaj busoj eksterlande – je 50% malkreskis ankaŭ busa turismo, pro kio multaj vojaĝoficejoj en Pollando bankrotis. Ankaŭ ĉe “Esperantotur” (Turisma Servo de MT) multaj klientoj rezignis pri la vojaĝoj, kaj aldone la buskompanioj plialtigis prezojn – kio kaŭzis, ke aŭguste ses busgrupoj de “Esperantotur” ne forvojaĝis kaj MT fariĝis nepagipova kaj devis tion anonci al juĝejo petante verdikton pri bankroto. Do, ne plu eblis funkciado de MT, kiun 80-procente financis polaj turistoj de “Esperantotur-MT”. Tamen al ĉiuj turistoj, kiuj ne vojaĝis, la asekurkompanio redonis la tutan enpagitan monon, kio estis la plej granda subvencio por MT. Dume por daŭrigi internacian Esperanto-turismon estis fondita Internacia Klubo “Esperantotur” ĉe Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz, kiu klopodos transpreni la agadon. Oni elektis jenan konsilion de la klubo: prezidanto Andrzej Grzebowski (PL), vicprezidantoj Aŭgusto Casquero de la Cruz (ES) kaj Marcel Delforge (BE), sekretario Alojzy Szulc (PL), kasisto Paŭlina Barska (PL), membroj Daniela Emler (PL), Anna Gabanska (PL), Halina Gorecka (RU) kaj Mara Timermane (LV). Jam aŭtune flugos grupoj al Aŭstralio, Suda Azio, Ĉinio, Suda Ameriko kaj Meza Ameriko. Do, la Internacia Klubo “Esperantotur” (str.M.Sklodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz, tel./fakso (48-52) 3461151) atendas Viajn proponojn pri Internacia Esperanto-turismo.

Andrzej Grzebowski (Pollando)

KOMARNO: NOVAJ EBLOJ EN PERESPERANTA KLERIGADO

La 6-an de septembro, dum SUS-25 – la jubilea Studadsesio de AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino), estis solene startigita laboro de la nova universitato, havanta senperan rilaton al Esperanto, funkciaanta surkampe de internacia multkultura klerigado. Temas pri la neŝtata Libera Eŭropa Universitato “Akademia Kelemantia” (UNI-KEL), kiun AIS San-Marino fondas en la antikva, sed pretende evoluanta urbo Komarno, situanta en centro de Eŭropo, ĉelime de Slovakio kaj Hungario.

Celoj de UNI-KEL estas:

- subteni evoluon de minoritataj kulturoj kaj lingvoj;
- realigi interdisciplinajn, malfermitajn studojn en kombino kun elektronika lernado;
- disvolvi sciencan tradukan agadon;
- evoluigi la teorion de interlingvistiko kaj esploron de planlingvoj kaj en perspektivo

flegi superkonfesian religio-politologion.

Konforme al tiuj celoj UNI-KEL havos memstarajn fakultatojn.

Fakultato pri interdisciplinaj studoj, funkcionta surbaze de la sciencostrukturo de AIS, plej forte reprezentos komunikadkibernetikon, sed realigos ankaŭ esplorojn pri universitata pedagogio kaj pri revizio de pedagogia scienco.

Fakultato pri minoritataj kulturoj, respondonte sociajn interesojn de Slovaka Respubliko pri evoluo de minoritataj kulturoj, zorgos pri preparo de faka instruado en minoritataj lingvoj kaj klerigado de fakuloj pri eŭrologio, ekonomiko kaj manaĝerado (kadre de Eŭropo), kultura antropologio kaj ekologio. La unuavice formataj katedroj estas: 1. Katedro pri minoritataj kulturoj; 2. Katedro pri eŭrologio (eŭropaj studoj); 3. Katedro pri manaĝerado; 4. Katedro pri psikologio; 5. Instituto de kultura-societa monitorado (operacia esplorado).

Fakultato pri interlingvistiko, okupiĝonte pri kompara esploro de uzado de klasikaj lingvoj kaj planlingvoj, kaj eventuale pri evoluigo de nova planlingvo, atentos ankaŭ teorion de aŭtomata tradukado kaj efektivigos realajn tradukojn kaj eldonadon de studmaterialoj laŭ la postuloj de unuopaj fakultatoj. La Fakultaton konsistigos: 1. Katedro pri interlingvistiko kaj tradukado; 2. Katedro pri slavaj lingvoj; 3. Katedro pri neslavaj lingvoj; 4. Instituto de aplika lingvistiko; 5. Instituto de religio-politologio.

En UNI-KEL oni studos konforme al la eŭropa kreditsistemo, komence nur en eksterna, sed poste ankaŭ en normala (ĉiutaga, ĉeesta), klasika kaj elektronika formoj.

La malĉeesta (elektronika) instruado subkomprenas tamen almenaŭ unufoje dum studjaro plensemajnan ĉeestan kurson.

La oficialaj lingvoj de UNI-KEL estas ILo (tiel Esperanto estas nomata en AIS – La red.) kaj la germana, la laboraj lingvoj – la slovaka, la hungara kaj, laŭ bezono de la instruado, – aliaj oficialaj lingvoj de AIS: la angla, franca kaj itala.

La nova universitato invitas studentojn por lerni kaj instruistojn por instrui, fakte, ajnajn fakajn studobjektojn en Esperanto. Interesiĝantoj povas turni sin al la kunordiganto de Rusia ILEI-sekcio

Irina Gonĉarova (Odincovo)

<mirina@online.ru>, tel. (095) 5930575

Viro iras al stadiono por vidi la finalon de futbalo, kaj sidas en unu el la plej bonaj lokoj de la stadiono. Alia viro vidas, ke la sidejo flanke de la unua viro ne estas okupita, kaj demandas:

– Ĉu tiu sidejo estas malokupita?

– Ĝi ja estas malokupita.

– Nekredeble! Kiu havus sidejon kiel ĉi tiu por la finalo de la futbalo, la plej grava afero de la mondo, kaj ne uzus ĝin???

La viro respondas:

– Fakte, la sidejo estas mia. Antaŭ du jaroj mi aĉetis du sidejojn, unu por mi kaj unu por mia edzino. Ŝi venus kun mi, sed ŝi mortis.

– Mi pardonpetas. Tio estas terura, sed ĉu vi ne trovis iun alian, kiu povus veni anstataŭ via edzino? Amiko, parenco, aŭ iu alia?


Li kapneas kaj diras:

– Ne, ĉiuj preferis iri al la enterigo.

(esperanto-anekdotoj)

LIBRA REVUO

FINFINE NI HAVAS EPITOMON



REU kune kun la eldonejo “Impeto” aperigis la libron de Nikolao Gudskov “Epitomo de esperantologio”. La 152-paĝa libro estas tre valora por ĉiuj dezirantoj ion ekscii aŭ pliprofundiĝi siajn sciojn pri esperantologio. Jen estas enhavo de la eldonaĵo: *Enkonduko; Interlingvistiko; Historio de Esperanto; Ideologio de Esperanto-komunumo; Literaturo kaj kulturo en Esperanto; Gazetaro kaj libroeldonado; Organizoj; Aranĝoj kaj renkontiĝoj; Esperanto-centroj; Instruado de Esperanto; Suplemento 1. Historiaj listoj de E-kongresoj kaj kelkaj tradiciaj aranĝoj; Suplemento 2. Gravaj dokumentoj pri esperantismo; Persona indekso*. Unu el la celoj de “Epitomo” estas helpi prepariĝi al B-kaj C-nivelaj ekzamenoj de la Ĉefa Atesta kaj Lingva Komisiono de REU. Sed la informoj, troveblaj en la libro, estas utilaj al ĉiu

konscia esperantisto, eĉ se li ne intencas ekzameniĝi. La libro haveblas en la Libroservo de REU (vidu la adreson en la tria kovrilpaĝo).

NOVA “VOJAĜO EN ESPERANTO-LANDO”

Kiel ni jam informis en la antaŭa numero de REGO, aperis nova eldono de la libro de Boris Kolker “Vojaĝo en Esperanto-lando” (Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta kulturo). Por pli bone konatigi la interesigantojn kun tiu ĉi sendube elstara libro ni represas ĉi tie intervjuon kun la aŭtoro el Internacia Pedagogia Revuo, № 3, 2002, kaj la tekston “La avantaĝo paroli angle”, aperintan en Leciono 18 de “Vojaĝo...”. Es-pereble baldaŭ la libro estos akirebla en Rusio, kaj dume ni ŝatus memorigi, ke la unua el-dono daŭre aĉeteblas en la Libroservo de REU (vidu la adreson en la tria kovrilpaĝo).

Gratulojn okaze de la apero de tiu, certe furora kaj sukcesa libro. Kial vi decidis verki tiun neordinaran libron?

Mi opinias, ke la homo, kiu perfekte regas Esperanton, profunde konas ĝian kulturon kaj idearon, ne nur havas pro tio utilon kaj plezuron dum tuta sia esperantista vivo, sed ankaŭ neniam forlasos Esperantujojn. Mi decidis kontribui al tiu interproksimiĝo de esperantistoj kaj Esperantujo, tiel ke la interproksimiĝo okazu libervole kaj per facila vojo.

Kiel naskiĝis la libro?

Malklara ideo aperis ĉe mi komence de la 70-aj jaroj. Ĝi kristaliĝis meze de la jaro 1987, okaze de la centjariĝo de Esperanto. En la jaro 1990 mi finverkis la unuan version por la fama moskva eldonejo “Progreso”. Ĝuste tiam Sovet-Unio kolapsis. Pro la ekonomia haoso en la lando la libro aperis nur en 1992 en kvanto de nur 4000 ekzempleroj (preskaŭ ĉiuj jam disvenditaj) kaj kun sufiĉe modesta ekstera aspekto. Ekde tiam mia vivo kaj la mondo ĉirkaŭ mi ege ŝanĝiĝis, i.a. en 1993 nia familio transloĝiĝis en Usonon. Tiu ŝanĝiĝo nepre devis reflektiĝi en la nova versio de “Vojaĝo”. Mi eklaboris pri ĝi en 1995, malnete finis en 1998 kaj faris la lastajn amendojn en majo 2002, kelkajn tagojn antaŭ la ekspreso de la libro.

Kion vi sentis ekvidinte la novan eldonon de la libro? Ĉu ĝi superis viajn imagojn?

La libro povis aperi du-tri jarojn pli frue, se mi ne proponus abunde ilustritajn ĝin. Mi antaŭsciis, ke ĝi estos eldonita bele. Sed la realo superis ĉiajn atendojn. Por la eksa grafikisto de UEA Francisco Veuthey kaj por la eksa Ĝenerala Direktoro de UEA Osmo Buller “Vojaĝo” estis cigna kanto, do ili (same kiel mi) enmetis en ĝin siajn animojn. La rezulton mi sentas kiel miraklon.

“Vojaĝo” prezentas al ni modelan klubvivon, tiom modelan, ke oni pensas: tia klubo ekzistas nur en fabeloj. Ĉu vi iam spertis, gvidis simile bonan kaj aktivan klubvivon, aŭ en la libro ricevis spacon nur viaj revoj?

Unuavice revoj, sed ankaŭ sperto de multaj Esperanto-kluboj en la eksa Sovet-Unio. Mi esperas, ke “Vojaĝo” helpas radikale ŝanĝi la kluban vivon en la tuta Esperantujo. Komunaj intereso, komuna laboro, komuna tempopasigo estas la sekretoj de bona klubo vivo.



Boris Kolker dum UK en Brazilo

Ĉu vi vidas diferencon inter la Esperanta vivo de la eksa Sovet-Unio, de kie vi devenas, kaj tiu de la nuna Usono, kie vi nun loĝas?

Usono estas MALSAMA lando, ankaŭ koncerne Esperanto-movadon. Unuavice, oni ne forgesu, ke Usono estas citadelo de la angla lingvo kiel internacia lingvo. Malgraŭ tio, la usona Esperanto-movado estas sufiĉe forta kaj originala. Laŭ mia opinio, ĝi multe gajnas per plibonigo de la klubo vivo. Sed tio estas malfacile efektivebla en la usona vivoritmo.

Krom esti bona ĉiĉerono, kio estas via profesio kaj viaj hobiaj?

Mi estas ĉiĉerono ne nur en Esperantujo, sed ankaŭ en nia urbo. Profesie – mi instruis la francan lingvon en fakultatoj de fremdaj lingvoj, laboris kiel interpretisto kaj poste, dum multaj jaroj, kiel tradukisto de scienc-teknika literaturo el kelkaj lingvoj. Mi estas doktoro pri lingvoscienco. Mi ŝatas vojaĝi kaj okupiĝi pri Interreto.

Jes, tion mi suspektis pro via retroŝta kurso, Internacia Perfektiga Korespondanta Kurso (IPKK) kiun vi gvidas per “Vojaĝo”. Kiom da personoj el kiuj landoj partoprenas tiun formon de lernado, kiuj estas viaj spertoj?

Al la kurso aliĝis dudeko da personoj el sep landoj; aparte multas brazilanoj. Sep personoj jam diplomigis. La krea regado de la lingvo ĉe la lernantoj okulfrape kreskas de leciono al leciono.

Ĉu vi gvidis ankaŭ ĉeestajn kursojn, havas ankaŭ tiukampe spertojn? Kiujn metodojn vi uzis dum viaj kursoj? Kiujn materialojn, krom la propraj?

Eble vi miros, eksciinte, ke plurajn ĉeestajn elementajn kursojn mi gvidis per Ĉe-metodo, kiun mi tre ŝatas, kvankam konscias pri iuj ĝiaj mankoj en la nuna tempo. Ĉeestajn paroligajn kaj perfektigajn kursojn mi gvidis ĉefe per materialoj de “Vojaĝo”.

Kiaj estas, laŭ vi, la bonaj instruistoj kaj kiel vi trejnas ilin?

Bona Esperanto-instruisto perfekte scias la lingvon, amas ĝin kaj strebas transdoni al la lernantoj sian amon al Esperanto kaj strebon regi ĝin perfekte. Unuavice, ili trastudu la novan eldonon de “Vojaĝo”. Poste ili trastudu kurson de metodiko de instruado, vizitu

lecionojn de spertaj instruistoj, donu plurajn lecionojn sub gvido de spertaj instruistoj, kun posta analizo de la lecionoj.

Kiuj estas tiuj 3 esperantistoj, de kiuj vi lernis, kiuj signife influis vin kaj iusence estis viaj INSTRUISTOJ?

Profesoro Jevgenij Bokarjov (Rusio) – kiu enkondukis min en interlingvistikon kaj esperantologion. *Profesoro Gaston Waringhien* (Francio) – li estis la plej erudicia homo en Esperantujo kaj ĉiam preta helpi. *Ito Kanzi*, pseŭdonime Ludovikito (Japanio), – kiu kolektis kaj eldonis 55 volumojn de Plena verkaro de Zamenhof – kun kiu mi laŭeble kunlaboris.

Kiujn konsilojn vi donus, kiujn eblojn vi vidas por plibonigi la prestiĝon kaj uzteremon de Esperanto?

Oni agu en diversaj terenoj. Ŝajnas al mi, ke hodiaŭ apartan gravecon havas ĝia vasta uzado en Interreto.

Planoj, deziroj por la estonteco?

Mi ŝatus havi pli da tempo por ŝatataj okupoj. Verki libron pri Ludoviko Zamenhof. Resti sana kaj havi sanajn proksimumojn.

Ni denove gratulas vin kaj deziras, ke viaj planoj kaj revoj efektiviĝu.

intervjuis Katalin Kováts

LA AVANTAĜO PAROLI ANGLE

Lastatempe mi bonŝansas multe vojaĝi en Eŭropo pro mia laboro. Mi estas usonano, kaj tial mia amiko en Germanio diris al mi, ke mi havas avantaĝon, ĉar mi jam denaske parolas en tiu lingvo, kiu estas la plej proksima al io konsiderebla kiel internacia lingvo: la angla. Mi supozas, ke li pravas; tamen, mi tute ne deziras havi tiun avantaĝon.

Mi estas civitano de Usono, kaj mi fieras pri tio. Mi fieras ankaŭ pri tio, ke nia lando estas tre grava en la hodiaŭa mondo. Tio, pri kio mi ne fieras, estas la maniero, per kiu ni subtenas tiun gravecon. Temas ĉi tie pri la uzado de la angla lingvo kiel internacia komunikilo. Mi havas avantaĝon. Ni, usonanoj, havas avantaĝon. Ni estas la elito, ni regas tra la tuta mondo, kaj ni plu regos, ĉar ili, la ceteraj, neniam povos komunikiĝi tiel bone kiel ni. Ili devas lerni internacian komunikiĝon dum jaroj, eĉ jardekoj. Ili atingos nian nivelon neniam.

La alilingvuloj? Ili ofte pensas, ke ili perfekte uzas nian lingvon, sed, inter ni, ni kaŝe komentas kaj ŝercas pri iliaj eraroj. Mi volas kriegi al ili: “Ĉu vi ne kapablas vidi, kion vi faras? Estas vi mem, kiuj forigas vian povon komunikiĝi! Estas vi, kiuj daŭre metas nin super vin.” Kaj super ili ni restos. Ni estas la elito kaj ni regas la mondon.

Mi ne deziras esti elito. Jen ĉi tie estas usonano, kiu ne emas esti mondreganto. Mi estas civitano de Usono, sed super tio – jes, super tio – mi estas civitano de la mondo. Homoj ĉieaj, mi rigardas vin kiel geamikojn kaj eĉ kiel gefratojn. Mi ne volas stari super vi pro maljusta avantaĝo. Mi multe pli ĝuus marŝi apud vi. Tiel ni povus kundiĉi niajn kulturojn. Tiel ni povus esti egaluloj. Tiel ni povus respekti unu la alian.

Tamen vi, alilingvuloj, rifuzas. Mi opinias, ke vi blindigas vin mem antaŭ la vero. La homoj ŝajnas malpli inteligentaj ol ili vere estas, kiam ili parolas kun iu per ties gepatra lingvo. Mi trovis tiun ideon ĉe Claude Piron, esperantisto, kaj de tempo al tempo mi konvinkiĝas pri ĝia praveco, kiam mi laboras eksterlande. Esperanto estas kreita kiel rapide lernebla kaj, eĉ pli grave, fleksebla, tiel ke ĉiuj homoj povu uzi ĝin sen ŝajni alilandanoj, sen ŝajni stultuloj. La angla – ne! Se vi ne loĝas dum pluraj jaroj en angle-parolanta lando, vi neniam majstros la nepriskribitajn regulojn, la sennombrajn esprimojn kaj la subtilajn nuancojn de tiu lingvo.

La nacia lingvo estas labirinto, konfuza por la fremdulo. Ĝi estas kiel la tavoloj de cepo:

kiam vi komprenas unu aspekton de la lingvo, vi povas certi, ke sub ĝi troveblas esceptoj kaj nekomprenitaj nuancoj.

Lernu la anglan! Ĝi estas riĉa kaj belega lingvo, parolata en pluraj landoj kun homoj amikemaj kaj kulturoj interesege. Sed komprenu nepre, ke ĝi tute ne taŭgas kiel internacia komunikilo. Pensu pri la homoj en via lando, kiuj parolas sian propran lingvon mise. Pensu pri eraroj, kiujn vi mem faras en via gepatra lingvo. Ĉu vi opinias, ke nenenaskaj parolantoj kapablas juste konkuri? Ĉu tian maljustan mondon vi volas krei? Ĉu kiel civitanoj de la mondo, kiel anoj de la homaro, ni fieru pri TIA mondo?

Fine mi volus aldoni pensigaĵojn pri tiu mondo, kiun ni kreas. Mi komencis per parolo pri Usono, mia lando, kaj pri tio, kiel grava lando ĝi estas. Kial ĝi tiel gravas? Mi opinias, ke unu el la ĉefaj kaŭzoj estas nia forto. Ne specife milita forto, sed forto en scienco, industrio, komerco, diplomaciaj rilatoj, belartoj, sporto kaj en multaj aliaj sferoj. Kial ni fortas en tiel diversaj sferoj? Laŭ mi, estas tial, ke ni estas lando, konsistanta el 50 ŝtatoj. Tiuj ŝtatoj kunlaboras, interkomunikas, kundividigas siajn diversajn fortojn kaj tiel formas union, kiu estas multe pli forta ol la sumo de la 50 apartaj ŝtatoj. Nuntempe ni vidas, ke la Eŭropa Unio havas la saman konsciigon.

Mi invitas vin pensi pri nia mondo. Kia mondo ĝi estas? Kia mondo ĝi povus esti, se ni, la civitanoj de la mondo, povus efike interkomuniki, interkompreni kaj kundividi niajn diversajn fortojn? Mi diras al vi, ke ni ne kapablas krei tian mondon per nacia lingvo kiel interkomunikilo. Bonŝance, ni havas lingvon kiu taŭgas, kiu justas, kiu ebligas al ĉiu homo deklari: “Jen mi, civitano de la mondo, ano de la homaro. Lasu min montri, kio estas mi.” Jen kion signifas interkompreno. Jen kio eblas pere de Esperanto. Jen nia komuna mondo.

Den Drown (Usono)



maltaŭgaj pensoj:

BIER

Ĉi-somere SAT emisiis vican eldonon de PIV. Verŝajne, tuj bezonatas glosoj. *SAT*: organizo, kiu ekzistas por eldonadi PIV-on, kaj kies ĉefa fierindaĵo estas PIV. *PIV*: Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto.

En nia mejloŝtona artikolo “Kredenco” (REGo № 2(2), decembro 2000, p.41) ni sentime starigis jenajn demandojn: “Kiu verkis vian PIV-on? Kiu legis tiun PIV-on? Kaj, finfine, kiu vidis tiun PIV-on?”. Respondu ni poparte: 1) grupo de gesamideanoj gvidataj de Michel Duc Goninaz (emerita docento, Universitato de Provenco); 2) ni du (pri la ceteraj ni ne scias); 3) la redakta stabo (kelkaj dekoj da personoj) devus, sed tio estas dubenda.

Leginte la 1268-paĝan verkon, ni *tostis kaj terurigiĝis*¹. Kvankam, “terurigi” estas ne tute taŭga vorto. Ni iom embarasiĝis, ĉar tute ne ĉion komprenis. Ekz., estas neniu dubo pri la vorto “nevo”, kio estas “filo de frato aŭ fratino”. Sed en kelkaj aliaj okazoj la afero aspektas vere strange. Ni konkretigu.

Ekzistas eterna problemo pri la difinado (diferencigo) de la vortoj “animalo” kaj “besto”. Kio estas vere interesa – ke la malnova eldono (MELD), kaj la nova (NELD), havas mal-

¹ Tostis kaj terurigiĝis: Выпили и схватились за голову (В.Ерофеев, Москва-Петушки).

samajn difinojn. Legu:

animalo (MEld): komuna vorto por bestoj kaj homoj.

besto (MEld): vivanta estaĵo sen klorofilo, kies ĉelparietoj ne konsistas el celulozo, kaj kiu estas plejofte kapabla senti kaj sin movi, sed ne posedas homan racion.

animalo (NEld): eŭkariota vivulo (ss plurĉela, vs kaj ark. ankaŭ unuĉela) sen klorofilo, kies ĉelmuroj ne konsistas el celulozo, ĝenerale kapabla senti kaj sin movi; kn de bestoj kaj homoj.

besto (NEld): ĉiu animalo escepte de homo.

Estas vere strange, ĉu vi konsentas? Laŭ la banala SEV (*Sovetia enciklopedia vortaro*) “звери” (bestoj) estas “la samo, kio estas *mamuloj*”. La difino de “животные” (animaloj) estas tro longa por citi ĝin ĉi tie. Kaj ni ial (pardonu nian arogantecon!) opinias, ke SEV pli pravas. Ĉu ne ŝajnas al vi, ke la PIV-istoj profane ne konsideris la bazajn leĝojn de biologio, kiam faris la difinon de “besto”?

(Por amuzi legantojn ni citu la difinojn el PV (*Plena Vortaro*): *animalo*: besto, vivanta estaĵo, esceptante la vegetaĵojn; *besto*: vivanta estaĵo kapabla senti kaj sin movi, sed ne posedanta racion. Kiom simpla kaj klara ĉio estis en 1934!)

Alia nekompreneblaĵo estas sporta. Jen estas futbala matĉo CSKA – “Spartak”. La rezulto estas 3:0 favore al CSKA. Do, CSKA spertis *gajnon*; “Spartak”, sekve, – *malgajnon*. Sed se la rezulto estus 1:1? Kiel nomi ĉi rezulton? Ruslingve estas *ничья*, angle – *draw* (aŭ *drawn game*), germane – *Unentschieden*, pole – *remis* (aŭ *nierozegrana*). Sed en Esperanto? Mankas la respond’ kaj en la malnova, kaj en la nova eldonoj de PIV.

Plia afero, kiun ni siatempe jam priskribis en nia artikolo (REGo № 3(5), junio 2001, pp.2-3), koncernas personajn nomojn. Ni tute ne scias, kiel prononci la nomon de la ĉefredaktoro de la nova PIV (ĉu efektive [duc goninaz]?), ankaŭ plurajn aliajn. Sed la PIV-uloj decidis faciligi la vivon de simplaj esperantistoj, kaj anstataŭ pliklarigi la aferon “animalo-besto”, aŭ aldoni iun kapvorton por “ничья”, ili esperantigis kaj envortarigis ĉi-sekvajn teruraĵojn: *Tolstoj* (temas pri nia kara Lev Nikolajevič!) kaj eĉ *Mendelevo* (horore, sed vi pravas, temas pri Dmitrij Ivanoviĉ Mendelejev)!!! Kial, tiukaze, ne naski la vorton *Ĉeĥovo*? Kvankam ni komprenas, ke tio povus kaŭzi ambiguan komprenon de ĉi vorto...

Kaj fine. En nia artikolo “Novaj gravaj vortoj” (REGo, № 2(4), aprilo 2001, pp. 40-41) ni proponis al la monda esperantistaro amaseton da novaj kaj gravaj vortoj. Nu, ke la gebuboj el PIV-stabo ne uzis la proponitajn de ni vortojn, restu je ties konscienco. Sed! En la MEld sur la p.521 troveblis:

kodako: portebla fotoaparato, ŝargata per kartoĉfilmo; *kodaki*: rapide foti per kodako.

Ni, certe, kiam legis tion, terurigiĝis. Sed esperis, ke en la NEld ĉi galimatia vorto ne plu aperos – ĉar neniu ja uzas ĝin! Vanis la esper’. En la NEld, sur la p.566., ni trovis la saman vorton kun la sama signifo, sed estis aldonita ekzemplo:

Ŝi kodakas siajn feblojn^{GN}. (La “GN” estas Gonsalo Neveŝ, antaŭ nelonge kabeinta poeto el Portugalio. Liaj poeziaj meritoj estas vaste konataj.)

Kial restis ĉi vorto? Ĉu eble la firmao “Kodak” koruptis PIV-teamon? Se tamen ne, kial ne aldoni eĉ plian vorton *fuĝi*: rapide foti per japana fotobendo... Hm, momenton, ŝajne, la radiko *fuĝ-* jam ekzistas...

Tiukaze proponendas jenaj neologismoj: “ferari” (tio, kion faras stiristoj de “Formula-1”), “eriksoni” (paroli per portebla telefono), “intelo” (komputila procesilo), kaj, fine, “tampakso” (...)?

Resumu ni jene: nia sinprizorga E-medio ricevis novigitan, sed ne multe plibonigitan vortaron, ĉar la menciitaj mankoj estas, tradicie, nur la pinto de la glacimonto. Do, ek al eĉ pli nova PIV! Es-pe-ran-to estas la lingvo por ni, por ni!

lingvistike, viaj Ludovikoj Lazaroj Zamenhofoj <zamenhofoj@mail.ru>

CERBE KAJ KORE



EL KOVROV

Saluton! Kiel vi jam scias, la 15-25-an de aŭgusto 2002 apud Kovrov okazis RET-02, la Rusiaj Esperanto-Tagoj. Do ĉi-foje nian rubrikon okupas plejparte tiu evento.

Unu el la tagoj estis dediĉita al Vladimir Varankin, kies centjariĝon ni festas ĉi-jare, kaj al lia ĉefverko “Metropoliteno”. Okazis kvizo pri la libro kaj pri metropoliteno mem, kaj la programeron kronis ĉarma poemo de Klara Ilutoviĉ.

Dum la tago de humuro okazis la Konkurso de Gajaj kaj Spritaj (KGS), kie unu el la teamoj prezentis duonekspromptan ŝercan kanton kun mencio de pluraj tendaraj rimarkindaĵoj. Neniaj pretendoj pri arta valoro, nur la preteksto por iom rideti... La aŭtoroj estas Igorj Fejgin (Samara), Viktor Kudrjavcev (Jekaterinburg) kaj Anatolij Radajev (Samara).

Dum la lasttaga komuna koncerto Alla Fridman deklamis la versaĵon, verkitan dum la tendaro (pardonu, tiu vorto ĉiam restas pli kutima). Dmitrij Vronskij premiere prezentis la poemeton, devigantan serioze pensi... Kaj la adiaŭa vespero finiĝis per verkita de Grigorij Arosev speciala nova kanto, kiun vi povas legi komence de tiu ĉi REGo apud la impresoj pri RET-02. Do, se vi partoprenis RET-02 – rememoru ĝin, se ne partoprenis – do provu imagi, kio tie estis. Kaj nepre venu al Kovrov sekvajare!

Valentin Melnikov, la literatura redaktoro

OMAĜE

Klara Ilutoviĉ

OMAĜE AL “METROPOLITENO” DE V.V.VARANKIN

Distancoj moskvaj plu ne ĝenas.
Ne kuru gasto kaj urbano.
Metroo plej fidele venas –
La viva rev’ de la romano.

L’ enhavo krias kaj rumoras
Pri sortoj de la nova trajno.
Metroo nun majeste gloras
Paŝadon sian al la gajno.

Esperoj, faloj, venkoj fluas.
La tempo estas mensmalsana.
Metroo nun ĝojige bruas,
Ke ĝia voĵ’ ne estas vana.

Ĉu la subtera trajn’ similas
Al magiaĵo revopinte?
Metroo nun impone brilas,
La revon efektiviginte.

Trafik' la moskva plu aktivas,
Konsternas ĝia kresk-insisto,
Kaj "Metropoliteno" vivas
Kun fama nomo de l' verkisto.

RESUME-HUMURE

Kaptis ni la verdan fiŝon
ĉe l' urbet' Kovrov' tapiŝo.

Refreno: Dua RETo, dua RETo –
я люблю тебя за это!
(ripeti post ĉiuj du linioj)

Sonas kantoj en tendaro
kun gitaro, sen gitaro.

Libervolas deĵorado,
sed pli gravas la manĝado.

Bela paro el Svedio
estis najloj de l' podio.

Nin instruis Bruna Ŝtono
de l' parnasa alta trono.

Eksterlanda gasto unu
estas nia kara Bruno.

Jen Gudskov kun funda kono
epitomas sur balkono.

Ĉiam paŝas kun edzino
nudpieda Valentino.

Griŝa kun edzino Lena
nin salutas de mateno.

Venas al la fin' tendaro,
ĝis revido, niaj karaj!

IMPRESE

Alla Fridman (Belorusio)

Laŭ vojetoj de arbaroj
aŭ laŭ bordo de river'
vagas mi dum multaj jaroj
ne por trovi fungojn rarajn,

ne por fuĝi de amaraj
pensoj kaj de la afer’.

Mi parolas jen kun floro
kaj salutas birdoj min,
sentas ĉion mia koro –
jenas forto kaj doloro,
jenas ĝuo kaj angoro –
mi perdiĝas en Senfin’.

Dissolviĝas en fabeloj,
dronas en la sorĉa for’,
kaj al mi donacas steloj
kaj betulaj brilaj ŝeloj,
kaj mirindaj floroj belaj
la trankvilon por la kor’.

FILOZOFIE

Dmitrij Vronskij

KUTRO: SOPIRADO IOM RAŬM-MANIFESTESKA

(poemeto dediĉita al la teoria disputo, kun antaŭa kaj postaŭa paroloj)

Antaŭaĵo

*Mi mem ne fidis la diroton tuj far mi,
Ne kredu ankaŭ vij, bon-ge-sam-anoj!
Ja vivo estas flam’, sed ne glaci’:
Do vivu ni, sed ne kalkulu vanojn.*

Jen nia kutro glit-navigas per brueg’
Puŝanta posten pompan ŝaŭman voston.
La kutro por la ondoj estas reg’
Ne avaranta ag-potencan koston.

La kutro salte kuras tra herbar’.
Al kutroj decas movo senprokrasta.
La “flako” estas ĝia Nigra Mar’:
Ĝi ĝin posedas sen-perante mastre.

Kaj dissaltigas la obstinan akvan baron
Per sia fere akcipitra beko.
Kaj ŝajnas disŝiriĝo por miljaroj –
Aŭ eble eĉ por miliardaj dekoj.

Sed maĉe konsumiĝas l’ energi’,
Kaj ĝin post-sekvas nur glateco trista.
Kaj kiam dronos kutro tiu ĉi,
Ĝin oni nomos nur laŭ ŝipa listo.

Ĉu eblas: same agas mi, poet'?

Idaron mian el-korigas mi per-mane,
Eldonas oni, ĝin posedas bret',
Kaj poste profundejo en ŝranket',
Kaj poste angulaĉo de kortet'...

Kaj poste: senkonscia alumet'
Aŭ ies tut-hazarda cigared'
Bruligos ĉion – kaj la vivo vanos?

Postaŭaĵo

*Mi mem ne kredas la diriton ĵus far mi,
Ne fidu ankaŭ vij, bon-ge-sam-anoj,
Ja vivo estas flam', sed ne glaci',
Kaj movo estas viv', sed ne noci',
Do agu ni – kaj dronu ni ne vanaj!*



EL CETERA MONDO

HI-HI KAJ HM...

nekonata aŭtoro

Estimata doktoro Laŭra,

Multajn dankojn pro viaj klopodoj informi homojn pri la Leĝoj de Dio. Mi lernis multon de vi, kaj mi provas disdoni tiun saĝecon al tiom multe da homoj kiom mi povas. Kiam iu provas defendi samseksamon, ekzemple, mi simple montras al li ke Levidoj 18:22 klare asertas ke ĝi estas abomenaĵo. Fino de diskuto. Tamen, mi bezonas iom da viaj konsiloj, pri iuj specifaj leĝoj kaj kiel plej bone obei ilin.

Kiam mi bruligas virbovon sur altaro kiel oferon, mi scias ke ĝiaodoro estas plaĉa al Dio (Lev. 1:9). La problemo estas miaj najbaroj. Ili diras ke laodoro ne plaĉas al ili. Kion mi faru?

Mi ŝatus vendi mian filinon en sklavecon, kiel sugestis Eliro 21:7. En nia moderna tempo, kiom, laŭ vi, estus justa prezo por ŝi?

Mi scias, ke kontakto kun virino dum ŝia tempo de menstrua malpureco estas malpermesita (Lev. 15:19-24). La problemo estas, kiel scii? Mi provis demandi, sed plejmulto ofendiĝas.

Lev. 25:44 asertas, ke mi rajtas aĉeti sklavojn el la nacioj kiuj ĉirkaŭas nin. Amiko diris, ke tio aplikigas al meksikanoj, sed ne al kanadanoj. Ĉu vi povas klarigi?

Mi havas najbaron, kiu obstine laboras dum la Sabato. Eliro 35:2 klare asertas ke li meritas morton. Ĉu estas mia devo mortigi lin?

Amiko opinias, ke kvankam manĝado de konkuloj estas abomeninda (Lev. 10:10), ĝi estas malpli abomeninda ol samseksamo. Mi malkonsentas. Ĉu vi povas solvi ĉi tiun disputon?

Lev. 20:20 asertas ke oni ne rajtas proksimiĝi al la altaro de Dio, se onia vidkapablo estas difektita. Mi devas konfesi, ke mi uzas okulvitrojn. Ĉu mia vidkapablo devas esti 20/20,

aŭ ĉu estas iom da flekseblo?

Mi scias, ke vi multe studis ĉi tiujn aferojn, kaj tial mi fidus ke vi povas helpi. Dankon denove pro viaj admonoĵ, ke la Dia vorto estas eterna kaj neŝanĝebla.

*la teksto cirkulas en Interreto
tradukis el la angla Rodoliko*

NIA DEKAMERONO

Jefim Zajdman (Ukrainio)

BATALO

(laŭ buŝrakonto de Aleksandr Zajdman; bone legebla en marĉa loko)

Ne estis kaj ne estas sur la Tero iu pli forta ol Homo.

Ĉiuj rekonitaj majstroj de dentoj kaj ungoj el la animala regno malvenkis Homon, kaj kruda fizika forto elmodiĝis. Tial kavernajn ursojn ŝanĝis pli eta militistaro.

La malamikoj iĝis pli saĝaj, ili komprenis, ke estas pli bone uzi konfidon: apuddormi, manĝi, figure parolante, el la sama ujo, pasigi ĉiutagecon en komforto.

Ni trafis stultegan situacion! Ĉiuj kemiaj kontraŭiloj timigas – ni jam estas samfamiliianoj. Niaj oldaj gloraj kanonoj falspafis, bedaŭrinde, ankoraŭ kontraŭ paseroj.

Malhelpas ankaŭ la difektitaj pro la multjarcenta batalo nervoj. Tial en la nunaj cirkonstancoj tre gravas interŝanĝi personan sperton. Kaj ĉiu venko, akirita de frato sammensa en senespera situacio, devas iĝi ĉies propraĵo.

* * *

La unuan nokton en la ĉambrego, kie dormis ĉ. dek samideanoj, Leo enlitiĝante ĝiskape kovris sin. La kaŭzo estis banala: unu el la veteranoj ronkegis, la apudkuŝanta pro tio ne povis ekdormi, sin turnis senĉese, la lito knaris – ridige, sed... maldormige.

La sekvan tagon varmego pelis Leon, same kiel multajn aliajn, al la proksima malprofunda rivereto, kie oni trovis areon je du kvadrataj metroj, permesantan stari en la akvo ĝisgorgo. Terura varmego faris muŝegojn kaj kulojn tre agresemaj, homaj korpoj kovriĝis per dekoj da etaj sangantaj vundetoj, kiuj nokte provokis kulojn daŭrigi la ekzekutadojn.

Jam kelkajn noktojn Leo malŝaltis elektron, ŝirmis sin per kovrilo kaj atendis.

– Eble hodiaŭ bonŝancos, – pensis li, ekdormiĝante, – eble hodiaŭ mi satdormos?

Kaj tiumomente aperis ĜI.

– I-i-i-i – aŭdiĝis ie apude. La lasta espero estingiĝis. Leo decidis batali kaj levis la kovrilon, malsekan pro ŝvito.

– I-i-i-i – ekdancis super la orelo kaj eksilentis.

– Jen, – senespere konstatis Leo, – sidiĝis. Se nur scii kien? Sur la frunton? – kaj miloj da pingloj ekdancis sur lia frunto. – Sed eble sur la kolon? – kaj la kolo terure ekjukis pro la penso. – Sed se ĝi estas enorele? – terurigi Leo, kaj lia grandega manplato kuglis al la kapo kaj forte frapis la frunton, kolon kaj oreleon.

– Silento, – notis Leo, – do, mortigis.

Sed plena certeco ne estis.

– I-i-i-i – aŭdiĝis post kelkaj longaj kaj lacigaj minutoj de la streĉa atendo.

Leo kuntiriĝis pro la ĉagreno. Denove silentiĝis.

– Sekundo, du, tri... – nombris la cerbo, – mi ne plu atendu!!!

Leo akre, kiel ciganino endance, ekskuis la bruston.

– I-i-i-i – aŭdiĝis responde.

– Ha, – ĝoje ekrikanis Leo, – do, ĝi tamen sur mi sidis, preparis sin...

La pepo tuj ĉesis.

– Denove ĝi preparas sin? Sekundo, du, tri... Sed ĉu mi estas sangdonanto? – ekjelpis pro la ĉagreno Leo, svingis la kapon kaj dolorige frapis ĝin al la lito.

– I-i-i-i – pepis ĉie kaj nenie.

– Ultrasone ĝi finmortigas – decidis Leo kaj altiris la kovrilon surkapen.

Ekis silento, kiun ŝiris nur profunda spirado. Baldaŭ iĝis sufoke: Leo ĉesis senti diferencon inter en- kaj elspiro. Lin komencis viziti altruda penso pri ebla ĉeesto de la malamiko sub la kovrilo.

– Kial do ne, – maltrankviliĝis li, – ĉu ne eblas, ke tiu ĉi viglulo trasaltis al mi?

Leo elŝovis la kapon.

– I-i-i-i – pepaĉis la abomenulo.

– Eraro – enspiris freŝan aeron Leo, – serĉas min ĉi tie, stultuleto.

Sed reŝovi sin sub la kovrilon li ne deziris. Li decidis ataki. Ambaŭ manplatoj elsaltis el sub la kovrilo kaj surdigis la aeron per klakeksplodoj, kiel festaj salutoj. La ronkego ĉesis, sed kelkaj litoj ekknaris.

– I-i-i-i – primokis liajn strebojn la kulo.

– Ĉu eblas diveni, kie ĉi pepuleto estas? Mallumas ja. – Leo pene enspiris kaj leviĝis: dormi li ne plu volis. Jam mateniĝis. La horloĝo ne tiktakis, la kapo doloris ĉe la orelo. Leo komencis skrupule traserĉi la ĉambron: duonhoron sur la piedpintoj, por ne vekti la aliajn, li moviĝis tra la ĉambro, serĉante la kulon.

– Malaperis! – histerie ekridis li, – malaperis! Timas min, aĉulo!

Kaj pro tiu penso la animo varmiĝis. Sed ne por longe.

Leo enlitiĝis sur la kovrilon, la korpon restigis kiel la allogilon. La kulo ne montris sin viva.

– Jen kia ruzulo, – ekmiris Leo, – komprenas, ke jam iom lumiĝis kaj mi estas preta ĝin kapti. Sed se mi fermos la okulojn, ĝi tuj sidiĝos, kien ekdeziros. Kaj pro la penso la korpo ekjukis sin en kelkaj lokoj samtempe.

– I-i-i-i – aperis ĉe la nazo la kulo. Leo reagis tuj. La manplatoj kuniĝis, la eksplodondo ĵetis la kulon al la plafono, kie ĝi ekpendis medite. Leo kaptis balailon kaj per akraj puŝoj al la plafono komencis la persekuton. La kulo lerte elturniĝis, la puŝoj iĝis ĉiam pli kaj pli furiozaj. La litoj knaris, sed Leo nenion rimarkis.

Kaj jen ĝi – feliĉa trafo!!!

– Tuj mi dormos, – ĝojis li, penante ne rimarki la ĉielon, kiu pliheliĝis. Sed ekdormi neniel eblis. La korpo en morditaj lokoj postulis atenton, Leo ĉiusekunde gratis ĝin.

– I-i-i-i – aŭdiĝis ĉe la orelo kaj ĉesis. Leo ektemis.

– Ĉu ŝajnis aŭ... la dua? – ŝtonigis la konjekto. La kulo komencis flirti. Kaj tiumomente aperis brila penso.

– Trinku ĝi, fiulo!!! – kriis lia interno, – sed mi baldaŭ fiŝkapti iros. Mi prenos ĝian ideon, larvon, kaj diros: “Ĉu vi memoras, fraĉjo? Ekis respondeco!” – kaj sur la hokon senprokraste. Li sin turnis al la muro kaj fermis la okulojn.

– Kvitiĝos ni, ĉarmulo, kvitiĝos, – flustris li duondorme, – ne estas en la naturo io pli forta ol la Homo! Ni estas mastroj de la Tero!

Tiumomente la kulo faris koleregan mordon...

ENIGMOJ. *La solvojn necesas sendi dum 2 semajnoj post ricevo de la gazeto al Tatjana Auderskaja rete (<zoo@te.net.ua>, <verda99@mail.ru>) aŭ poŝte (Ukrainio, 65026 Odessa-26, p/k 71).*

PROVERBOJ

Vi vidas proverbojn, kiuj estas skribitaj laŭ speciala maniero: en ĉiu vorto literoj staras en alfabeto. Via celo estas transformi la kodon al norma Esperanto.

1. EN ĈIO AABST IKO ADNORST.
2. ANUU AOPŜ INOR ADEIKRST.
3. EIILRS ADEINRT, EENORSV AELNOPRT.
4. IKU ABIR AEILRS, EFOT ADNU AEENRSV.
5. EN AOPRR AGLNOU ĈIU AESST FLOORTU.

...+ n LITEROJ...

Aldonu al la vortoj po 1-2-3 literoj, por ricevi novajn vortojn. En krampoj estas indikita nombro de literoj, kiujn vi povas aldoni. Ekz., ERO(2) = FERO-AFERO

ERO (3)
INO (3)
IRO (3)
ENUO (1)
VENO (2)
ANO (2)

La solvoj de la enigmoj en REGO № 4(11):
ANAGRAMOJ. SEMINARIO, DESTINO, EKSKURSO,
DEZIRO, AKOMPANI, RAFINITA, KOLERIS
MALŜARADOJ. AS-TERO, ROS-MARO, IN-SEKTO,
VAL-ORO, LITERA-TURO
KOMPRENU LA IDEON. 1. Monatoj; 2. Kalkulo;
3. Orkestr; 4. Kazoj; 5. Ĉielarko.

PERDITAJ FINAĴOJ

Mi proponas al vi komencajn partojn de vortoj. Vi devas kompletigi ilin ĉiujn per la sama vorto. Ekz., B, F, M - ARĈO

B, F, G, K, V
P, R, T, V
F, K, P
KOM, Ŝ
DI, KOT, ST, T, VIB
FEN, ORK, SEM
B, SK
KL, R

preparis Tatjana Auderskaja (Odeso)

UTILAJ ADRESOJ

REU: p/k 57, 105318 Moskvo; retadreso <esperanto@au.ru>;
ttt-ejo <<http://www.reu.newmail.ru>>.

Libroservo de REU: p/k 4716, 432063 Uljanovsk; retadreso <yuka@vens.ru>;
plena katalogo <<http://reu.da.ru/rus/katalogo.htm>>.

REJM: str.Dugina 17 – 62, 140180 Ĵukovskij, Moskva reg.;
retadreso <rejm@euro.ru>; ttt-ejo <www.tejo.org/rejm>.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando;
retadreso <uea@uea.org>; ttt-ejo <<http://www.uea.org>>.



**Ĉu vi ne forgesis, ke
decembre, en vintra Moskvo
okazos REK-22?**

**Ĉu vi scias, kio estas planata
por la programo?**

La 19-a Konferenco
de REU kun la elekto
de Prezidanto kaj Estraro; voĉdonado
pri la Atingoj de la Jaro 2002 en Rusia
E-Movado; diversaj kursoj, prelegoj,
diskutoj; kultura programo: koncertoj,
prezentoj, konkursoj, ekskursoj;
Zamenhof-tago la 15-an de decembro!

Kun ĉi REGo vi ricevos Informilon pri la
Kongreso kun ĉiuj bezonaj informoj kaj
priskribo de la programo.



Ni festu Zamenhof-tagon kune!

REGo (Rusia Esperanto-Gazeto) № 5 (12) oktobro 2002

komuna eldono de REU kaj REJM

redaktas Garik Kokolija *retadreso* <gazeto@mail.ru>

poŝta adreso Pjatinickoje ŝosse 45 – 105, 125310 Moskvo, Rusio

por tiu ĉi numero kunlaboris Viktor Aroloviĉ

la gazeto estas produktita en la presejo “Policvet” (Klin)

abontarifoj por 2003:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KŜŜ – 120 rubloj sendendaj al:

Георгий Владимирович Коколия, Пятницкое шоссе 45 – 105, 125310 Москва

*por loĝantoj de aliaj landoj – 15 eŭroj pagendaj al la konto **kklg-r** ĉe UEA*